

V-19034/1995  
Esperanto

EL POPOLA 中國新道

# CINIO



5

1995  
ISSN 0032-4361

- EPĈ HIERAŬ KAJ HODIAŬ
- NI POVOS HELPI PLENIGI TIUN VAKAN SPACON
- SUB LA STANDARDO DE "JUNAJ VOLONTULOJ"
- POR KE KNABINETOJ REAKIRU ŜANCON DE LERNADO

45-JARA JUBILEO DE  
"EL POPOLA ĈINIO"



Reflugo en vespero Foto de LIU SIGONG

## INTER NI

### Ni ĉiam marŝu mano en mano

*En ĉi monato estas la 45-jariĝo de EPĈ.*

*Nia revuo pasigis tiujn 45 jarojn en malfacilo kaj sukceso. Se oni demandas nin, kio estas la plej kara por ni, ni respondos: "Nenio pli kara ol la amo de la legantoj al ni."*

*Tio ne estas komplimento, ĉar ĉiu progreso de la revuo ja estas nedisigebla de la solida*

*subteno de niaj legantoj. Iuj legantoj rigardas EPĈ kiel sian propran revuon, aliaj laboras kiel ĝiaj perantoj, triaj rekomendas ĝin al siaj parencoj kaj amikoj kaj kvaraj bone konservas ĉiujn ĝiajn jarkolektojn. Kaj multaj el la legantoj estas ĝiaj konstantaj abonantoj.*

*Niaj legantoj ĉiam tenas intiman rilaton kun ni. Ĉiutage ni ricevas iliajn leterojn. En la leteroj ili laŭdis progreson de la revuo eĉ malgrandan, montris ĝiajn mankojn aŭ prezen-*

*tis proponojn por plibonigi ĝin. Kun plena amo ili flegas ĝin kiel arbeton.*

*Ni bone scias, ke estas malfacile por ni trovi taŭgajn vortojn por esprimi nian dankon al niaj legantoj. Ni pensas, ke la plej bona rekompenco por ili estas nia diligenta laboro. Ni devas tiel fari, por ke la arbo donu pli da fruktoj.*

*Karaj legantoj, por nia lingvo, por nia afero, ni ĉiam marŝu mano en mano!*


**La Red.**

**ENHAVO**

- 2 *INTER NI*
- 4 EPĈ hieraŭ kaj hodiaŭ
- 6 Varmaj gratuloj
- 15 Ni povos helpi plenigi tiun vakan spacon
- 16 EPĈ kaj mi
- 17 45 ne estas magia cifero
- 18 De l' Arĝenta al la Ora
- 20 *ĈINAJ E-ISTOJ:*  
Li ĉiam staras en la antaŭa vico de E-movado
- 24 Gratulon al vi, d-ro Reinhard Selten
- 25 *ESP-NOVAĴOJ*
- 26 Feriado de EPĈ-anoj
- 28 *REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO:*  
Adiaŭ al la malnova sistemo
- 32 *VOĈO DE E-ISTOJ:*  
Komunikado, lingvo kaj la 4-a Monda Virina Konferenco
- 34 *MULTNACIA ĈINIO:*  
Buji-nacianoj sub ardezoj
- 36 Agrikultura ekologia eksperimento sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo
- 37 *BELECO DE ĈINIO:*  
Arta trezorejo sur la monda tegmento
- 40 Nova azi-eŭropa kontinenta ponto
- 41 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 42 Brokatoj de Nankino
- 44 *EKONOMIE:*  
Perspektivo de la personaŭta industrio de Ĉinio
- 45 Kemi-industria urbo sur alkala marĉo
- 46 Sub la standardo de "Junaj Volontuloj"
- 48 *POR KOMENCANTOJ:*  
Por varmigi ilian koron
- 49 Muzikludo sur la vangoj
- 50 Denove sonis la voĉo de Volgo
- 52 Ĉina medicino servas al eksterlandanoj
- 54 Karikaturisto Ding Cong
- 56 *VIRINOJ KAJ INFANOJ:*  
Por ke knabinoj reakiru ŝancon de lernado
- 58 *ĈINA KULTURO:*  
Antikvaj ĉinaj pontoj
- 60 Por esplori spurojn de la homaro en la ŝtonepoko
- 62 Sportemaj Zibo-anoj
- 64 *KURANTAJ AFEROJ*
- 66 *GALERIO:*  
Drako skulptita el jado  
*SUR LA KOVRILLO: Peonio*  
Foto de Liu Sigong  
*SUR LA DORSKOVRILO:*  
"Verda Monto" (Ĉinstila pentraĵo)

**LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO**

1. Zibo (p. 62)
2. Cangzhou (p. 45)
3. Liuzhou (p. 60)
4. Gansu-provinco (p. 56)
5. Guizhou-provinco (p. 56)



96/182/d

# EPĈ hieraŭ

de HOU ZHIPING\*

**J**AM pasis 45 jaroj de post la apero de El Popola Ĉinio. Mi pasigis kune kun ĝi 32 jarojn. Kiam mi eklaboris en la redakcio de EPĈ, mi estis junulo, kaj nun mi jam proksimiĝas al la aĝo por emeritiĝo.

En la 32 jaroj mi laboris ĉefe kiel redaktoro kaj raportisto kaj poste okupiĝis pri korespondado. Mi persone spertis multajn ŝanĝiĝojn de la redakcio.

## POR DISVASTIGI ESPERANTON

En la komenco post la fondiĝo de EPĈ, en ĝia redakcio laboris nur 3 personoj. En 1963, kiam mi aniĝis al la redakcio, tie laboris 14 personoj, kiuj plejparte zorgis pri tradukado kaj korespondado. Tiam EPĈ estis dumonata revuo. Ĝiaj artikoloj kaj bildoj plejparte estis elektitaj el ĉinaj revuoj kaj ĵurnaloj. En 1967 EPĈ fariĝis monata revuo, sekve la laborkvanto duobligis. Kaj poste aro da junuloj eklaboris en la redakcio. Labordivido en la redakcio pli kaj pli detaliĝis: iuj okupiĝis pri redaktado kaj raportado, aliaj pri fotado kaj pagarango, triaj pri tradukado kaj korespondado kaj kvaraj pri administrado.

Komence de la 80-aj jaroj la Esperanto-sekcio de Fremdlingva Eldonejo estis aneksita al la redakcio de EPĈ, kaj fondiĝis la Ĉina Esperanto-Eldonejo. En 1994 la redakcio de EPĈ kaj ĈEE transprenis de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio la distribuon laboron de esperantaĵoj. De tiam la redakcio de EPĈ kaj ĈEE jam fariĝis Esperanto-organizo, kiuj plenumas redaktadon, eldonadon kaj distribuadon de ĉinaj esperantaĵoj kaj kontribuas por disvastigo de Esperanto.

## FENESTRO DE ĈINIO

Ekde sia fondiĝo EPĈ jam difinis sian orientilon: per Esperanto konigi Ĉinion al diverslandaj e-istoj, akceli amikecon inter la ĉina popolo kaj alilandaj popoloj kaj kontribui al la mondpaco kaj homa progreso. En la dek jaroj antaŭ 1976, influate de la "kultura revolucio", la redakcio deviis de sia orientilo, tamen, kun komenciĝo de la nova etapo de reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio, ekde 1979 ĝi daŭrigis sian antaŭan redaktan orientilon, kaj la enlanda E-movado senprecedence vigliĝis. Ni faris reformadon al nia revuo kaj ĝi ekhavis aspekton kiel la nunan. Jes, ekde tiam EPĈ iris denove sur la vojon, deziratan de niaj legantoj.

De 1979 nia revuo starigis sinsekve pli ol 60 rubrikojn. La rubrikoj "Malfermitaj Urboj", "Reformado", "Ĉe Yangzi-rivero", "Regiono ĉirkaŭ Bohai-mar" kaj koncernaj artikoloj raportis pri la reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio; "5 000 jaroj de Ĉinio", "La Imperiestra Palaco", "Sude kaj Norde de la Granda Muro", "Laŭ Antikva Vojo al Tibeto" kaj "Laŭ la Suda Silka Vojo" prezentis longan historion de Ĉinio; "Ĉina Literaturo", "Historia Mistero" kaj "Ĉinaj Artoj" kaj la artikoloj pri kulturo kaj edukado konigis brilan kulturon de Ĉinio; "Tibeto Hieraŭ kaj Hodiaŭ", "Multnacia Ĉinio" kaj "Ĝenroj de Nacimalplimulto" konigis la historion kaj buntajn morojn de diversaj ĉinaj nacimalplimulto; "Vidindaj Lokoj", "Vojaĝo tra Ĉinio" kaj "Famaj Urboj" prezentis la vastan teritorion de Ĉinio kaj ĝiajn ĉarmajn pejzaĝojn; "Facetoj de la Ĉina Socio", "Nunaj Ĉinoj" kaj "Sur Stratoj" prezentis la vivon, penson kaj deziron de ordinaraj ĉinoj; "Ĉina Medicino", "Medicina Konsultejo" kaj "Por Via Sano" rekomendis tradiciajn ĉinajn sanigajn metodojn, resumitajn en longtempa praktikado; ktp.

Pri ĉio ĉi supre menciita niaj legantoj ĝenerale havas pozitivan opinion. La estraro de Universala Esperanto-Asocio skribis al ni antaŭ 5 jaroj: "Ekde la komenco de sia aperado en Esperanto El Popola Ĉinio okupis tute specialan lokon en la koroj de la tutmonda esperantistaro. Pere de via revuo, multaj dekmiloj da homoj tra la tuta mondo povis akiri intiman rigardon en la kulturon, historion kaj ekonomian disvolviĝon de via granda lando. El Popola Ĉinio tutcerte kreis milojn da amikoj de Ĉinio en ĉiuj anguloj de la mondo."

Mi kaj miaj kolegoj ĝojas pro niaj sukcesoj en la laboro, kaj samtempe, ni ĉiam rigardas ĉiun aprobon kaj laŭdon de niaj legantoj kiel kuragiĝon kaj strebas por pli bone fari nian laboron.

## PONTO DE AMIKECO

De sia naskiĝo EPĈ alte taksas fortigon de amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, inter la ĉinaj kaj eksterlandaj e-istoj. Pere de la revuo ni adresas bondezirojn de la ĉina popolo al diverslandaj popoloj kaj profundan amikecon de ĉinaj e-istoj al la alilandaj.

Ĉiujare nia revuo raportas pri UK, pri amika kontakto inter la ĉinaj kaj alilandaj e-istoj dum UK. La rubriko "Inter ni" ofte publikigas diskutojn inter ni kaj la legantoj pri la komune zorgataj problemoj. La

# kaj hodiaŭ

rubriko “Korespondi Deziras” funkcias kiel amikeca ponto inter la ĉinaj kaj alilandaj samideanoj.

“Nia Mondo” kaj “Tra la Mondo” plivastigis la vidkampon de la ĉinaj e-istoj kaj intimigis la diverslandajn e-istojn.

“Mi kaj Ĉinio” kaj “Alilandanoj pri Ĉinio”, kiel bonaj interkomunikiloj, malfermitaj laŭ la bezono de iuj legantoj, aperigis iliajn impresojn pri Ĉinio.

Ĉi tie aparte menciinde estas, ke EPC gajnis konfidon kaj subtenon de multaj amikoj en la klopodado por nia komuna afero — Esperanto. Nia belga leganto s-ano Charles Ghiselin malavare heredigis sian bienon al nia redakcio cele al disvolvado de Esperanto. Ni solene promesis observi lian volon kaj pli bone uzi la monsumon por antaŭenpuŝi E-movadon.

Alia kortuŝa afero estas, ke en la lastaj jaroj iuj legantoj “adiaŭis EPC kun larmoj” pro nepagipovo. Por tio ni speciale starigis “Fondaĵo EPC-abono” kaj ricevis pozitivan reagon de iuj bonkoraj legantoj. Dank’ al tio nombro da nepagipovaj e-istoj povas denove ricevi la revuon. Mi sincere esperas, ke pli da legantoj partoprenos en tiu signifoplena aktivado.

Iu itala amiko skribis al ni: “Estas neneigeble, ke EPC ludas pontan rolon en la E-movado de Ĉinio kaj tiu de aliaj landoj. Ĝi devas daŭre servi kiel ligilo inter la ĉinaj kaj alilandaj e-istoj, kaj pere de ili fariĝi ligilo inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.” Lia opinio bone montras la komunan volon de ĉiuj laborantoj de nia redakcio.

## KAMPO DE LA LINGVA STUDO

EPC ne estas revuo sole por E-movado, ĝi ĉiam prenas lernadon, utiligon kaj disvastigon de Esperanto kiel sian gravan taskon. Krom freŝaj informoj pri la ĉina kaj eksterlanda E-movado, ĝi ankaŭ ofte aperigas artikolojn pri Esperanto. En la pasintaj 15 jaroj la revuo starigis sinsekve la rubrikojn “Jubilea Jaro de Esperanto”, “Libera Forumo de Eminentaj E-istoj” kaj “Voĉo de E-istoj”, kiuj kun multaj belaj artikoloj funkcias kiel la propra verda kampo por niaj legantoj.

Dum multaj jaroj ni kontinuigis la rubrikon “Por Komencantoj”, kiu regas niajn legantojn per facilaj legaĵoj. Nun la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis libron ekskluzive el artikoloj en la rubriko.

Sub la rubriko “Sur Nia Libroreto” legiĝas novaĵoj pri novaj E-libroj kaj recenzoj. La ĉi-jare starigita

“Originale Verkitaj” estas rubriko por literaturo-amatoroj publikigi sian verkon.

Nia srilankaa leganto skribis en sia letero: “Por mi EPC ĉiam estas Esperanta lernolibro, ĉar mi ne nur akiris el ĝi sciojn pri la ĉina kaj internacia E-movado, sed ankaŭ ellernis Esperanton.” Nia danlanda samideano diris: “Nun mia Esperanta nivelo multe levigis, tion mi ŝuldas al la helpo de EPC.”

Ni bone scias, ke nia lingvonivelo de Esperanto ne estas alta, tamen EPC kiel Esperanta revuo kuraĝigas nin per sia influo kaj rolo, eĉ tre malgranda.

## ĈINIO KAJ LA MONDO AL LA 21-A JARCENTO

Okaze de la 45-jariĝo de EPC s-ro Bakin, honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris por ĝi surskribon: “Ĉinio kaj la mondo al la 21-a jarcento”.

La 21-a jarcento estos epoko, en kiu sciencoj kaj teknikoj rapide disvolviĝos, ekonomio prosperos kaj kontaktado plioftiĝos. En la 21-a jarcento Ĉinio strebos por efektiviĝi sian modernigon, kaj Esperanto, kiel internacia helpa lingvo, ludos pli grandan rolon. Kuraĝigate de tio, ni nepre devas pli bone labori por EPC.

Ni bone scias, ke EPC ankoraŭ ne povas kontentigi la postulojn de la legantoj. Ekz. La enhavo de nia revuo ne estas sufiĉe ampleksa; iuj problemoj ne estas tiel profunde analizitaj kaj eĉ kun unuflankeco, ne estas stabila nia preskvalito, koloroj kaj klareco de iuj bildoj ne estas sufiĉe bonaj; nia lingvonivelo devas esti plue levita...

Ni bezonas pli da junaj e-istoj por garantii pluan disvolvigon de nia afero. Kun tempopaso laborantoj de malnova generacio jam emeritiĝis, iuj el ili jam adiaŭis nin por eterne, tamen ili postlasis al ni valoran spiritan riĉaĵon. Tio estas fideleco al la patrio kaj popolo, amo al Esperanto, persistemo en la Esperanta afero. Ni devas disvolvi tiun spiriton por subigi ĉiujn malfacilojn en nia laboro.

Ni esperas, ke la nombro de niaj legantoj kaj abonantoj duobliĝos, kiam ni celebros la 50-jariĝon de EPC.

La 21-a jc. alproksimiĝas al ni. Kun nobla idealo kaj pli granda energio kaj kuraĝo ni pli bone laboros subtenate de niaj karaj legantoj. ■

\*La aŭtoro estas vicestro de la redakcio de EPC.

# Varmaj gratuloj

*Okaze de la 45-jariĝo de "El Popola Ĉinio", multaj Esperantaj organizoj kaj niaj legantoj sendis al ni gratulajn leterojn kaj telegramojn. Pro tio ni kore dankas ilin.*

*La ĉi-numere ne aperigitajn leterojn kaj telegramojn ni publikigos en la sekvanta numero.*

**La Red.**

Estas al ni granda plezuro esprimi al vi niajn plej elkorajn gratulojn okaze de la 45-jariĝo de "El Popola Ĉinio". Al tiuj gratuloj aliĝas la tuta laborantaro de la Centra Oficejo de UEA.

Dum la pasintaj jardekoj "El Popola Ĉinio" faris grandegan kontribuon al la diskonigo de la historio, kulturo, politiko kaj socia vivo de la Ĉina Popola Respubliko inter alilandaj legantoj. Por miloj da esperantistoj ĝi estis kaj daŭre estas fenestro, donanta rektan rigardon en vian landon, kiu havas tiel riĉan pasintecon kaj kiu nun vere laboregas super modernigo kaj ĉiufanka plibonigo de la vivo de sia popolo. Via lando, kiu por multaj estis malproksima kaj fremda, dank' al via revuo fariĝis proksima kaj pli konata.

Ni volas aparte gratuli vin pro la alta grafika kvalito kaj redakta nivelo, kiu lastatempe eĉ pli boniĝis. "El Popola Ĉinio" estas unu el la plej reprezentaj Esperantaj revuoj, kaj estas tial tute ne mirinde, ke ĝi mankas en neniuj ekspozicioj pri Esperanto. Al multaj esperantistoj "El Popola Ĉinio" estas ankaŭ grava rimedo por perfektigi sian scion de la Internacia Lingvo, ĉar vi ĉiam zorgis pri la modeleco de ĝia lingvaĵo. Jes, por miloj da esperantistoj via revuo estas simple E-Po-Ĉo, ĉar ĉiun bonan amikon oni nomas per karesnomo!

Okaze de la 45-jariĝa festo ni gratulas al la Ĉina Esperanto-Ligo kaj tute aparte al ĉiuj viaj laborantoj, kiuj ĉiujmonate donacas al ni novan belan numeron. Ni deziras al vi sukcesan laboron ankaŭ en estontaj jaroj — kaj multe da novaj abonantoj!

**Simo Milojević, ĝenerala  
direktoro de UEA  
Osno Buller, direktoro de  
la Centra Oficejo de UEA**

Multaj koreaj esperantistoj, same kiel multaj esperantistoj en aliaj landoj, ĉiam ĝuas legi la revuon.

"El Popola Ĉinio" eble ne estas la plej malnova Esperanta periodaĵo, sed certe ĝi estas la plej luksa, plej ampleksa kaj plej enhavriĉa revuo en la mondo. La revuo montras al la mondo ke Esperanto estas praktika kaj viva lingvo. Ĝi ankaŭ ludas ponton de komunikado inter esperantistoj en diversaj landoj en la mondo.

Mi sincere deziras ke la revuo pli kresku kaj daŭre ludu la kernan rolon en la monda Esperantujo, kaj mi esperas ke la ĉina registaro daŭrigos sian subtenon al la revuo.

**Lee Chong-Yeong, prezidanto  
de la Korea Esperanto-Asocio**

Per via altkvalita Esperanto-revuo vi ne nur prezentas gravajn, ĉiutagajn aspektojn pri viaj vasta lando kaj popolo al legantoj tra la mondo, sed ankaŭ konstante kuraĝigas starigon de Esperanto-grupoj kaj en via lando kaj eksterlande, kie estas abonantoj de EPĈ.

EPĈ ĉiam ludas gravan rolon cele al la Esperanto-koncepto de reciproka komprenado inter la diversaj nacioj de nia mondo.

Gratulojn kaj bondezirojn je la okazo de via jubilea festo, en majo 1995.

**Ray Ross, sekr. de la Aŭstralia Esperanto-Asocio**

“El Popola Ĉinio”, per sia bela aspekto kaj granda amplekso, estis envio de l’ tutmonda esperantistaro, kio estas ebla per la apogo de l’ registaraj instancoj. Estis kuraĝigo, ke tia magazino daŭre eldoniĝis ie sur la tero, dum multaj similaj iniciatoj fiaskis post kelkaj provoj. Mirigas, ke vi eltenis ĉiajn obstaklojn kaj konstante daŭrigis la aferon, eĉ sub la superrego de l’ Bando de Kvaropo. Ni omaĝas al tiu via peno.

Kiam la azia movado faras epokfaran paŝon sekve de l’ decido dum la seula Universala Kongreso, via rolo pligrandiĝas. Ni deziras al vi prosperon.

**YAMASAKI Seiko, prezidanto de la estraro de JEI**

Malmultaj revuoj en Esperanto havas tiel longan historion kaj altan profesian nivelon kiel “El Popola Ĉinio”, kies 45-an datrevenon ni nun festas. En sia longa vivo “El Popola Ĉinio” atestis pri la landaj sinsekvaj politikaj evoluoj en la brila kadro de jarmila civilizacio, kiu nomiĝas Ĉinio. Dank’ al la revuo, la legantoj en dekoj da landoj pli bone komprenis la kontribuon de Ĉinio al la ĉiufanka progreso de la homaro kaj tial ili ricevis grandan intelektan kaj spiritan pliriĉiĝon.

“El Popola Ĉinio” meritigas pli ol gratulon, — admiron.

**ADA FIGHIERA-SIKORSKA, ĉefredaktoro de “Heroldo de Esperanto”**

Nome de s-ro Georges Sossois, prezidanto de la belga esperantistaro, kaj de ĉiuj esperantistoj el Belgio (Flandrio, Bruselo, Valonio) mi salutas ĉiujn ĉinajn geesperantistojn.

Via revuo “El Popola Ĉinio” estas la plej interesa por ni, ĉar ĝi pritraktas multajn kaj interesajn temojn. Por la komencantoj ĝi atestas ne nur la valoron, sed ankaŭ la uzeblecon de la Internacia Lingvo Esperanto.

Mi supozas, ke nia samlandano Ghiselin, leganto de “El Popola Ĉinio”, testamentis nur post

konstato de la alta valoro de la revuo. Eble sen la revuo ne estus tia heredigo.

Bonvolu transdoni al ĉiuj, kiuj laboras por la revuo, niajn elkorajn kaj kuraĝigajn bondezirojn. Persone ankaŭ miajn amikajn kaj neforgeseblajn sentojn.

**Marcel DELFORGE**

Kun granda plezuro ni skribas al vi pro tio, ke ni taksas tre grava por la tutmonda Esperanta movado la 45-jaran jubileon de “El Popola Ĉinio”, okazonta en majo.

Dum preskaŭ duonjarcento EPĈ kontentigas milojn da legantoj pere de tre interesaj artikoloj kaj allogaj fotoj.

La brazilaj EPĈ-abonantoj konstante laŭdas la revuon, ĉar pere de ĝi ili ne nur praktikas la Internacian Lingvon, sed ankaŭ pligrandigas siajn konojn pri la tradicio, kulturo, moro, historio kaj arto de Ĉinio, lando kie Esperanto trovis fekundan grundon.

Kun plej sinceraj bondeziroj je konstanta sukceso, la estraro de la Brazila Esperanto-Ligo, nome de la brazila esperantistaro, gratulas la administrantojn, redaktorojn kaj ceterajn oficistojn de “El Popola Ĉinio”.

Ni gratulas ankaŭ la estraron de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la registaron de Ĉinio pro la saĝa apogo al la revuo, kiu estas vera ponto por la ĉina kulturo al la tuta mondo.

**Francisco Mattos de Oliveira, prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo**


Ni, la estraro de AEF, gratulas al la redakcio de “El Popola Ĉinio” pro la jam nun 45-jara apero de via revuo.

Ni jam dum multaj jaroj el ili ĉerpas interesajn faktojn kaj raportojn pri ĉinaj cirkonstancoj diversflankaj kaj ankaŭ pri la Esperanto-vivo en Ĉinio. Ni ankaŭ alte taksas la kvaliton de la artikoloj por ekzercado en Esperanto, multaj legantoj uzas vian gazeton kiel lernilon. Aparte menciinda estas la bona kvalito de enhavo kaj aspekto, precipe la preso de fotografiaj kaj artaj reproduktoj kaj grafikoj.


Ni denove gratulas kaj esperas, ke ankaŭ estonte via revuo ĝojigos kaj informos same bone.

**Aŭstria Esperantista Federacio**

# Gratulaj skriboj



"La mondo konu Ĉinion, Ĉinio sin malfermu al la mondo", vortoj skribitaj de Lu Jiayi, vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso kaj honora prezidanto de la Esperanto-Asocio de la Ĉina Akademio de Sciencoj



"Prenu Esperanton kiel komunikilon por konigi Ĉinion al la mondo", vortoj skribitaj de Hu Sheng, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj kaj vicprezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto"



面向二十一世紀的中國和世界  
賀中國報道創刊四十五周年

巴金



"Ĉinio kaj la mondo al la 21-a jarcento", vortoj skribitaj de Bakin, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo

報道中國

增進友誼

周光召




九四年十一月廿一日

"Diskonigi Ĉinion, plifortigi amikecon", vortoj skribitaj de Zhou Guangzhao, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj


# Gratulaj

"Vinberoj" (Ĉinstila pentraĵo)

de LIU CHIQING



# pentraĵoj




"Pino kaj umefloroj" (Ĉinstila pentraĵo)

de **WANG WENYU**



"Salikokoj" (Ĉinstila pentraĵo)

de **QI BINGHUI**



"Lijiang-rivero en nebulo" (Ĉinstila pentraĵo)

de **CHEN HONGJUN**

"Kortobirdoj" (Ĉinstila pentraĵo)

de **SHAO GE**






"Lotusfloroj" (Ĉinstila pentraĵo)

de ZHANG ZHIZHONG


"Somerumado" (Ĉinstila pentraĵo)

de ZHAO JUNSHENG





"Fiškaptado sur Lijiang-rivero" (Ĉinstila pentraĵo)  
de YAO ZHIHUA



"Umefloroj" (Ĉinstila pentraĵo)  
de MIN XUELIN

"Knabinoj kaj persikoj" (Ĉinstila pentraĵo)

de TONG ZHENGANG






"Palaca knabino" (Ĉinstila pentraĵo) de LI MING



"Verda stelo prilumas la teron" (Kaligrafiaĵo) de ZHANG SHUFAN

"Peonioj" (Ĉinstila pentraĵo) de ZHANG JIE



# Ni povos helpi plenigi tiun vakan spacon

de DONALD J. HARLOW\* (Usono)

**E**STAS nun malfacile por multaj usonanoj memori, ke dum longa periodo — ĝis 1972 — usonanoj sciis absolute nenion pri la aktuala Ĉinio. Estas ankaŭ malfacile por multaj usonanoj scii, ke dum alia periodo — ĝis 1980 — usonanoj sciis preskaŭ nenion pri la aktuala Ĉinio. Kaj estas hodiaŭ malfacile por multaj usonanoj konfesi, ke eĉ nun ili scias tre malmulte pri la aktuala Ĉinio.

Tamen estas — bonŝance! — kelkaj esceptoj. Temas pri tiuj usonaj esperantistoj, kiuj legas la monatan revuon "El Popola Ĉinio". Jam dum 45 jaroj — eĉ dum malfacila periodo, kiam ricevantoj de tiu revuo devis registri siajn nomojn ĉe la registaro! — usonaj esperantistoj povas lerni pri la moderna Ĉinio el tiu revuo. Kia estas la ĉina poezio? La usonaj esperantistoj povas citi el "El Popola Ĉinio"; la ordinaraj usonanoj eĉ ne scias (eble eĉ ne povas kredi), ke ĉinoj verkas poeziaĵojn. Kiom da civilaj aŭtoj estas en Ĉinio? La usonaj esperantistoj legis la ciferon en "El Popola Ĉinio"; la ordinaraj usonanoj dubas, ke oni eĉ havas civilajn aŭtojn en Ĉinio. Kie troviĝas Xinjiang? La usonaj esperantistoj jam legis en "El Popola Ĉinio" multajn artikolojn (kaj vidis multajn buntajn kolorfotitaĵojn) pri tiu bela regiono, kaj kelkaj verŝajne jam ŝparas monon por iam viziti ĝin; la ordinaraj usonanoj eĉ ne scias, sur kiu kontinento ĝi troviĝas, aŭ, sciante, supozas, ke temas pri nevizitinda dezerto. Kion pri la ĉina programo de kosma esplorado kaj ekspluatado? La usonaj esperantistoj rimarkis en "El Popola Ĉinio", ke Ĉinio lastatempe lanĉis usone produktitan sateliton de la Hughes-kompanio en orbiton pere de sia transporta raketo Changzheng n-ro 3; la ordina-

raj usonanoj povas supozi, ke subevoluinta triamonda nacio kiel Ĉinio tute ne povas lanĉi sateliton en orbiton. Ktp, ktp, senfine.

Kompreneble, ekzistas aliaj revuoj en aliaj lingvoj, precipe (por ni) la angla lingvo. Mi foje vidis tiajn revuojn — en librobutikoj, kies aĉetantoj venas nur de la ĉina komunumo en Usono kaj certe ne bezonas anglalingvajn revuojn por legi pri Ĉinio. La ordinaraj usonanoj tute ne vidas tiujn revuojn en sia propra lingvo — nek, vidante ilin, atentus ilin. Ili scias ĉion, kion ili devas scii pri Ĉinio, el la artikoloj kaj opiniesprimoj (ĉefe politikaj, kaj ĉiam tendencaj), kiujn ili legas en la tagjurnalo aŭ vidas en la televidilo. Sed antaŭ 45 jaroj iu tre saĝa ĉina esperantisto rimarkis, ke kvankam usonanoj ne atentis ĉinojn, eĉ se tiuj lastaj parolas angle, tamen esperantistoj atentis esperantistojn, eĉ se la unuaj estas usonanoj kaj la lastaj estas ĉinoj. Se ne menciis la multajn aliajn esperantistojn en multaj aliaj landoj, kiuj atentis aliajn esperantistojn...

Jam 45 jarojn kelkaj bonŝanculoj inter ni povas lerni pri Ĉinio — laŭ ĝia loĝantaro, preskaŭ kvarono de la mondo! — el la paĝoj de "El Popola Ĉinio"; sen tiu revuo, ĝi estus por ni vaka spaco sur la mondmapo, same kiel ĝi ankoraŭ estas por la plimulto el niaj samlandanoj. Espereble, tra la venontaj 45 jaroj ni usonaj esperantistoj, vartate de la diligentaj kaj konsciencaj fotistoj, ĵurnalistoj kaj redaktoroj de "El Popola Ĉinio", povos helpi almenaŭ iom plenigi por niaj samlandanoj tiun vakan spacon... ■

\*La aŭtoro estas prezidanto de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.

# EPĈ kaj mi

MORI SINGO\* (Japanio):

**M**IAN unuan renkontigon kun nia revuo "El Popola Ĉinio" mi ne bone memoras.

La plej malnova numero de EPĈ sur mia librobretaro estas de januaro 1967, kies kovrilo montras foton de prezidanto Mao Zedong staranta sur Tian'anmen-pordego.

Mi do sendube vidis unue nian revuon eble je la fino de 1966. Ĉar mi komencis memlerni nian lingvon en 1965 en mia 40-jara aĝo. Mia lingvonivelo estis tute ne taŭga por kompreni la enhavon. Tamen mi, ŝajne, kun grandega emocio decidis fariĝi leganto senhezite. Estis ankaŭ mia granda feliĉo, ke EPĈ afable kaj vastanime akceptis tian neniellidindan neĵunan komencanton kiel novan samideanon. De tiam kaj ĝis hodiaŭ EPĈ daŭre don-

adis al mi intiman gvidon, instruon kaj kuraĝigon por mia tasko dumviva labori kiel interpontanto amikeca per Esperanto kun diverslandaj verdaj geamikoj. EPĈ estas ankaŭ respektinda instruisto, kiu donis nekalkuleblan influon al mi kiel eseo-verkisto (japanlingva) per sia mondskala vidpunkto. Mi ŝatas ĉi tie konfesi kun miaj mil dankoj.

Dum niaj nemalmultaj jaroj kaj monatoj de interkontakto, mi akiris tre multe da neforgeseblaj rememoroj, kiujn eble nur mi mem kore sentis emociaj. Jen mi ŝatas peti permeson ĉi tie prezenti unu el ili, etan eseon verkitan januare de 1981, kiu poste estis enmetita en mian esearon "Dumtaga Dormeto de Pandoj" (japanlingva eldonaĵo). La titolo de la eseo estas "El Popola Ĉinio":

Lastmonata numero de la Esper-

anta gazeto "El Popola Ĉinio" redaktita de la Ĉina Esperanto-Ligo prezentas per sia duonpaĝo koloran foton, en kiu mi kaj Baoling, pandino el la Kantona (Guangzhou-a) Zoologia Ĝardeno, salutas unu la alian. La klarigo de la foto estas kompreneble en Esperanto, la internacia lingvo. Ĝi legiĝas jene:

"Por memori pri la unua datreveno de la fondiĝo de amikaj rilatoj inter la ĉina urbo Guangzhou kaj la japana urbo Hukuoka, direktoro de la Hukuoka Urba Zoologia kaj Botanika Ĝardeno s-ro MORI Singo, nia malnova leganto en Japanio, speciale venis al Ĉinio je la fino de marto kaj reportis per aviadilo pandojn Shanshan kaj Baoling de Guangzhou kiel gastojn al Hukuoka.

Dum aprilo kaj majoj la du pandoj intervidiĝis kun pli ol 870 000 japanoj, bone plenumante sian mision. Post ilia reveno al Guangzhou oni trovis, ke ili eĉ iom plipeziĝis dank' al bona prizorgo de japanaj amikoj."

Fakte, aŭtune de 1979 mi unuafoje vizitis Ĉinion, kiel unu el la membroj de amika vizitgrupo de Hukuoka-urbanoj al Ĉinio. Post la hejmenreveno mi eksciis, ke EPĈ-samideanoj pagis egan klopodon serĉi nian vizitgrupon en Pekino por kontakti kun mi... sed vane. Mi tuj skribis al Pekino pardonpeton pro mia malsufiĉa informo pri nia vojaĝa plano kaj per sekvanta dankletero raportis pri la sukcesa evento de la amikaj pando-senditoj, kun la foto de mi kaj mia kantona amikino Baoling.

Tamen estis tute ne supozeble, ke nia kunlaboro estus prezentita per tiel serioza artikolo de nia revuo EPĈ, ĉar, malkaŝe dirate, ĝis tiam mi estis prefere nekontenta kaj eĉ malgaja pro la fakto, ke ĉi-foja amikeca evento de pando-senditoj ŝajne estis ne akceptitaj de ĵurnalistoj aŭ aliaj diversaj kulturaj rondoj kun alte taksita signifo (krom en la regionoj najbaraj de ambaŭ urboj Guangzhou kaj Hukuoka), malgraŭ ke ni pagis tiom da klopodo kun komuna kredo, ke la kunlaboro estus sendube unu el la plej

La aŭtoro kaj lia amikino pandino Baoling





seriozaj kaj historiaj amikaj eventoj neniam plenumitaj. Ĉu tio estus, post ĉio, neniu sed sensignifa eventeto de simplaj lokaj urbanoj? Malegale al la oficialaj interfluaĵaj eventoj de la centraj registaroj, ĉi tia neluksa sed unika provado de lokaj urbanoj ne estas tiel alte taksita de la ĵurnalismo hodiaŭ... ĉu? Pripensante tion, mi fakte estis ne mal multe senespera kaj negaja.

Tiam venis el nenie sed el la ĉefurbo de Ĉinio, jes el Pekino, plej bonvena kuraĝigo, kiu prezentas mondscale la sukceson de nia amika kunlaboro de ambaŭ urboj. Mi do tuj fariĝis plene trankvila, forlasante ĝistiaman senesperecon pro la troa konsidero.

Esperanto estas la lingvo de modernaj tagoj, kiu nun estas lernata en preskaŭ ĉiuj lokoj tra la mondo, precipe en la nuntempa Ĉinio, de tiuj, kiuj arde deziras realigi la mondan pacon kaj amikecon per la komuna lingvo.

El Pekino, hodiaŭ nemalmultaj informiloj en diversaj lingvoj estas eldonataj. Inter ili, nur Esperanta eldonaĵo estas redaktata ne por legantoj en fiksitaj landoj aŭ difinitaj nacioj, sed por legantoj en diversaj lokoj tra la mondo, malegale al eldonaĵoj en la japana aŭ angla lingvo. Tiu ĉi fakto ankaŭ havas gravan signifon, mi kredas.

Mi do individue akceptis tiun ĉi amikecplenan artikolon kiel plej dankindan donacon ĉe la fino de la neforgesebla jaro, sentante ke mi fine povas delasi la pezegan ŝarĝon de mia ŝultro.

Post 3 jaroj, en 1983, mi kun tiom da hezito jesis fariĝi peranto de nia revuo EPC, bone sciante mian povran taŭgecon. ■

\*Krom peranto de EPC, s-ro Mori Singo estas ankaŭ honora membro de la Guangdong-a Esperanto-Asocio kaj honora ĉefdirektoro de la Dalian-a Esperanto-Asocio de Ĉinio. Per sia granda kontribuo al la ĉina-japana popola interamikiĝo pere de Esperanto kaj eldonado kaj japanigo de la libroj de s-ino Spomenka Štimec li gajnis Premion Ossaka, la plej altan premion de la japana Esperanto-movado en 1994.

WILLIAM R. HARMON\* (Usono):

## 45 ne estas magia cifero



S-ro William R. Harmon (la tria de maldekstre) kaj ĉinaj amikoj en Hangzhou

**M**I vidas nenion magian en la cifero 45; eble ĉar mi ne estas aziano, aŭ ĉar mi jam delonge preterpasis tiun nombron da jaroj mem. Kio gravas, kaj tre gravas, estas ke "El Popola Ĉinio" ekzistas, kaj informas, kaj belas, kaj edukas, kaj interesas, kaj daŭre pliboniĝas.

Nur tre malgranda nombro da personoj ekster Azio havas la rimedojn viziti Ĉinion; tio estas fakto. Kaj tiuj bonŝanculoj, kiuj povas, kutime havas nur unu-du semajnojn disponeblajn por sondi landon kontinent-vastan kaj senfine varian; ankaŭ tio estas fakto. Kiel, do, konatiĝi kun Ĉinio kaj la ĉinoj? Kelkaj centimetroj da kondensitaj, sekaj raportoj en la tagĵurnaloj ne multe helpas, ĉar tio venas tra filtriloj. Pli buntaj kaj bildoplenaj artikoloj en la dimanĉa gazeto iom helpas — sed verkitaj de ne-ĉinoj, jen tiuj filtriloj refoje.

"El Popola Ĉinio", legata zorge ĉiun monaton tra la jaroj, donas nesupereblan ekvidon en la ĉinajn vivon, penson, arton, sciencan, planadon, historion kaj futuron. Mi tre ofte citas el numeroj de EPC parolante al grupoj aŭ kolegoj pri ĉinaj aferoj; ke tiu informo venas per la internacia lingvo, tio kompreneble ankaŭ menciindas. Mi rekomendis al preskaŭ tuta generacio da studentoj en Esperanto-klasoj, ke ili abonu, studu kaj ĝuu EPC.

Ne, 45 ne estas magia. Sed tiuj 45 jaroj pruvas, ke EPC ne povas esti efemero. Ĝi daŭre valoras al Ĉinio kaj ĉiuj ĉinoj, ne nur al esperantistoj, sed certe al Esperanto. (Demandu al mi refoje, kiam EPC atingas 75-jaraĝon; eble tiam mi vidos ion magian en la numero.) ■

\*la aŭtoro estas ĉefdelegito de UEA en Usono kaj estrarano de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.

# De l' Arĝenta al

de LI SHIJUN

**E**N majo de 1950 "El Popola Ĉinio" venis en la mondon. En 1975 ni festis ĝian Arĝentan Jubileon, kaj kredeble en 2000 celebros ankaŭ ĝian Oran Jubileon. Kion do nun mi pensas irante de l' Arĝenta al la Ora?

Por mi, amanto de la lingvo Esperanto kaj ĝia nobla idealo, majo de 1950 estis belega, ĉar en tiu monato naskiĝis ne nur la dezirata revuo "El Popola Ĉinio", sed ankaŭ mia unua infano, kiu same havigis al mi multajn esperojn. Kaj en la duobla ĝojo mi ricevis invitan leteron de mia kara instruisto de Esperanto s-ro Venlo Fon, ke mi tuj aliĝu al la redakcio de EPĈ. Mi do forlasis la urbon Chengdu, kie mi gvidis du E-kursojn, unu libertempan en la Knabina Mezlernejo de Chengdu kaj la alian oficialan en Huayang-mezlernejo, kiu eble estis la unua lernejo kun tia kurso en nia lando, kaj hastis kun mia edzino kaj bebo al Pekino en distanco de pli ol 2 000 km. Tiam ankoraŭ ne ekzistis la Baoji-Chengdu-a Fervojo kaj ni, senspertaj gepatroj kun bebo, devis veturi per kaduka aŭtobuso tra valoj kaj ravinoj de la majesta kaj pitoreska montaro Qinling. Pri tiu iom malfacila vojaĝo nun mi tamen memoras preskaŭ nenion, ĉar tiam mia koro estis plenplena de la deziro baldaŭ vidi kaj helpi la estimatan Majstron Venlo Fon, kiun mi neniam vidis, kvankam mi jam tiel bone konis lian personon per liaj leteroj kaj verkoj. Sed nenio povos forviŝi el mia memoro la afablan kaj bonkoran rideton, kun kiu mia kara instruisto min akceptis en la ĉefurbo Pekino.

45 jaroj forflugis! Mia fileto jam fariĝis forta kaj sperta viro, kaj nia EPĈ renoma revuo en Esperantujo. Se vi komparas la unuajn numerojn de la revuo en formo de modesta bulteno kun tiu ĉi kolora periodaĵo, vi tuj klare vidas ĝian progreson. Same kreskis kaj progresis nia popola respubliko.

Kiom da ventoj kaj eventoj, fataloj kaj bataloj okazis intertempe! En ĉi momento mi rememoras la unuajn jarojn de nia revuo: Venlo Fon, Honfan kaj mi en la redakcio kun Ĉ. Ĉen staranta apude

por gvidi nian laboron. Tri viglaj viroj sed senspertaj kaj en malfaciloj! Ni estis ĉiam plene okupitaj. Ni devis zorgi la redaktadon, tradukadon, tajpadon, kontrollegadon, korespondadon, eĉ ankaŭ ekspedon de ĉiu ekzemplero de la revuo. Se iu sukcesis havigi al si la jarkolektojn de EPĈ de 1950-1953, li do jam posedas ankaŭ niajn fingrosignojn. Por plenumi la diversajn taskojn, ni devis streĉi nian tutan forton kaj plene apliki nian energion. Foje mi zumis Esperantan kanton en la redakcio, kaj Honfan tuj severe avertis min, ke tio ĝenas la pensadon. Vere! Sed mi ja devis tajpadi por la gazeto!

Proverbo diras: "Tri fostoj necesas por plektbarilo kaj tri helpantoj necesas por brava viro." Nia redakcio bezonis dekojn da helpantoj kaj milojn da legantoj. Kaj ni trovis, ke la esperantistaro estas solidara. Enlande ni ricevis helpon de S. J. Zee, Pandiŝo, Ĝolabio, Censinio kaj multaj aliaj, kaj eksterlande de E. Adamson (Svedio), N. Kavenius (Finnlando), Miyamoto Masao kaj Jui Ĉunoŝin (Japanio), Kovaĉev (Bulgario), F. Paraige (Britio), A. Balague (Aŭstrio), B. Rudolf (Ĉeĥoslovakio), T. Jung (Nederlando)... Povras mia memoro por enlistigi eĉ la plej altan parton de niaj geamikoj!

Kaj sub la komuna zorgo kreskis la gazeto, tra fortostreĉoj kaj stumbloj, flugoj kaj faloj. Dank' al helpoj de la en- kaj eksterlandaj kunlaborantoj, nia revuo akiris ne nur milojn da esperantistoj-abonantoj, sed ankaŭ cent milojn da neesperantistoj-legantoj, ĉar multaj el la artikoloj en la revuo estis tradukitaj en naciajn lingvojn far diverslandaj esp-istoj kaj aperigitaj en lokaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Statistiko montris, ke pli ol 50% de la enhavo de la unuaj numeroj estis tiel utiligitaj eksterlande. Tiu fenomeno estis unika inter la gazetoj tiutempe eldonataj en la Ĉina Popola Respubliko.

Fine de 1953, EPĈ devis paŭzi. Kial? Pri tio oni povas legi publikan klarigon de la redakcio en la decembra n-ro de 1953. Sed la nepublikigita kaŭzo estis, ke GDR kaj Ĉeĥoslovakio malfavoris Esperanton kaj rifuzis akcepti nian revuon. Kvankam ni

# la Ora



La aŭtoro (maldekstre) kaj alilanda esperantistino

bedaŭris la ĉesigon, sed ni ne povis fari aliel. Tiu evento tamen havigis al mi ŝancon labori en la Nordoriento kaj fondi Esperanto-kurson en la Kvara Mezlernejo kaj la unuan E-rondeton en la urbo Shenyang post la Liberiĝo, kune kun d-ro Xiang Quanshen.

Sed post la malapero de la revuo, multaj el ĝiaj eksterlandaj legantoj kaj kunlaborantoj skribis al ni, ke ni daŭrigu la eldonadon de la gazeto. Kaj en 1956, s-ro Hujucz kontaktis esperantistojn en socialismaj landoj kaj vidis eblecon restaŭri la E-movadon en nia lando. Mi estis revokita al Pekino, kaj en 1957 EPC rekomencis aperi kiel organo de la Ĉina Esperanto-Ligo. "Pli da saĝo post damaĝo." Ĉi-foje pli rapide kreskis nia perantaro kaj legantaro. En la sesdekaj jaroj ni akiris legantojn en pli ol 500 urboj de USSR, kaj la eldona kvanto de la gazeto superis 20 000 ekzemplerojn. En 1963 ni aranĝis malgrandan ekspozicion pri la gazeto, kiu tiel forte impresis gvidantojn en la popola registaro, ke marŝalo Chen Yi, kiu tiam funkciis kiel vicĉefministro respondeanta pri eksteraj aferoj, proponis enkonduki Esperanton en superajn lernejojn kaj okazigon de UK en Pekino. Tio kompreneble multe kuraĝigis la dekelkajn laborantojn en nia redakcio. Do ni laboris kumule kiel instruistoj por elbaki instruistojn kaj laborantojn por funkciigi Esperantan sekcion en Radio Pekino (nun Ĉina Radio Internacia). Ni eĉ devis helpi la Esperantan Sekcion de Radio Pekino per tradukado en ĝia komenca periodo ekde 1964. En tiu periodo mi deziris havi 48 horojn en ĉiu tago, kaj ofte laboris ĝis profunda nokto. Tagoj ŝvitsaturaj, tagoj tre plezuraj!...

La vojo de EPC same zigzagis kiel tiu irita de la popola respubliko. EPC vidis serenajn tagojn kun sunbrilo kaj malhelajn tagojn de fulmotondroj. Pro siaj mispaŝoj ĝi stumblis kaj falis, restariĝis kaj brave daŭrigis sian marŝon. Se oni foliumas la paĝojn de la aperintaj 439 numeroj de nia revuo, oni povas klare vidi preskaŭ ĉion travivitan de la redakcianoj kaj la ĉina popolo.

Pluraj E-gazetoj en la mondo havas pli longan historion ol EPC kaj ludis gravan rolon en la movado. Tamen neniu alia tiel profunde penetris en la aktualan vivon de iu popolo. La jarkolektoj de EPC riĉe ilustritaj per fotoj kaj desegnoj koloraj kaj nigra-blankaj estas vera malgranda enciklopedio pri Ĉinio. Ĝi prezentas al la mondo solidan ekzemplon pri praktika uzo de Esperanto en internacia komunikado, kaj elokvente montras al la publiko la nedisputeblan uzeblecon kaj taŭgecon de la internacia lingvo iniciatita de la genia d-ro Zamenhof. Kaj dank' al la Esperanta gazeto EPC, ni atingis komprenon kaj akiris amikecon de dekmiloj da gesamideanoj en pli ol cent landoj.

Celebrante la 45-jaran ekzistadon de la revuo, ni celebras ankaŭ partan efektiviĝon de la revo de la bonkora doktoro, kiu tiel multe zorgis pri la paca kunvivado de la homaro kaj ĝia progreso, por kio li oferis siajn plej belajn jarojn kaj plejparton de sia energio. La atingoj de nia revuo ja signifas ankaŭ atingon de la movado Esperanta.

Celebrante la jubileon, ni, amantoj de la gazeto, devas refreŝigi nian memoron pri niaj pioniroj Hujucz, Ĵelezo, Venlo Fon, Honfan, Tikos k.a., al kiuj la revuo ŝuldas multan dankon. Hodiaŭ jam ne plu disponeblas iliaj personaj prizorgoj kaj helpoj. Tamen la redakcio ja disponas sufiĉe da daŭrigantoj junaj kun sperto kaj lerto kaj amason da kunlaborantoj en- kaj eksterlande. Cetere, prezentigas en Ĉinio tiel multaj novaj stimuloj kaj novaj ŝancoj, novaj eblecoj por ke la revuo eniru en tute novan periodon. Por komenci ion nespertitan, kompreneble oni devas iom pli streĉi sian forton kaj fari novajn strebojn. Se la revuo sukcesis progresadi en la pasinta preskaŭ duona jarcento, kredeble ĝi sukcesos ankaŭ daŭrigi sian marŝon eĉ per pli grandaj paŝoj en la estonto. Mi esperas, ke niaj novaj kaj malnovaj amikoj en- kaj eksterlandaj ĉiuj strebados kune kun la redakcio por konduki la revuon en novan Oran Epokon. Mi esperas, ke vere grandiozan Oran Jubileon EPC ĝuos en la jaro 2000, por komenci la trian jarmilon, en kiu eble triumfos finfine nia bela lingvo Esperanto! ■

# Li ĉiam staras en la antaŭa vico de E-movado

## — Pri Zhang Qicheng, eksĉefredaktoro de EPC

de WANG HANPING

**E**N Esperantujo s-ro Zhang Qicheng, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj honora membro de UEA, ĝuas altan reputacion. Dum la pasintaj pli ol 60 jaroj li ĉiam staris en la antaŭa vico de nia movado, kaj li estas elstara aktivulo kaj organizisto en la ĉina E-movado.

### NEFORGESEBLAJ JAROJ

Zhang Qicheng naskiĝis en 1913 en Wuxing de Zhejiang-provinco. En 1928 li lernis Esperanton en koresponda kurso. De tiam li ĉiam klopodis por la ĉina E-movado.

En 1931 la Evento de la 18-a de Septembro ekflamigis indignon de la ĉina popolo kontraŭ la japana invado al nordorienta Ĉinio. En decembro de tiu jaro Zhang Qicheng, Hujucz, Lou Shiyi, Ĵelezo kaj aliaj pioniroj de la ĉina E-movado iniciatis en Ŝanhajo la Ĉinan Proletan Esperantistan Union (ĈPEU).

En decembro 1932 ĈPEU okazigis Esperantan ekspozicion kaj samtempe eldonis Esperantan gazeton "La Mondo". La ekspozicio altiris multajn vizitantojn, kiuj ĉiuj ricevis la unuan numeron de la gazeto, kiu estis preparita de Zhang Qicheng kaj Ĵelezo dum

pluraj tagoj kaj noktoj. Ili ambaŭ prenis la respondecon pri artikoloj de unuaj numeroj de la gazeto. Zhang Qicheng skribis por la gazeto multajn artikolojn longajn kaj mallongajn, subskribitajn kaj nesubskribitajn, ĉefe en Esperanto. Ĉ. Ĉen estis lia pseŭdonimo en tiu periodo. Krome, ili devis iri al presejo por enpaĝigo kaj korekto de presprovaĵo kaj mem faris distribuadon. Tiam la gazeto havis legantojn tra la lando.

Tamen ĈPEU estis sekreta organizo kaj ne povis fari publikajn aktivadojn. Por ŝanĝi tian staton, en januaro 1933 ili fondis la publikan organizon Ŝanhaja Esperantista Asocio. Ili luis domon kiel sidejon de la asocio kaj funkciigis E-kursojn. Multaj junuloj venis lerni Esperanton. Ĉiun dimanĉon la loko estis vivoplena: estis kaj E-kurso kaj diversaj kunsidoj, kaj krome, ili ankaŭ ofte ekskursis.

Sekve de la graviĝo de la nacia krizo, ili prezentis tre aktualan sloganon "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio". "La Mondo", sur kies kovrilo estis presita la slogano, fariĝis standardo de ĉinaj esperantistoj.

Ili multe kontaktiĝis kun alilandaj esperantistoj. Krom korespondi, ili ankaŭ aperigis la subteran mimeografitan "Ĉinan PEK-bultenon" (PEK — Proleta

Esperanto-Korespondado), poste eldonis publike la informilon "Ĉinio Hurlas" kaj sendis ilin al aliaj landoj. Ĝis nun iuj veteranaj esperantistoj de aliaj landoj ankoraŭ memoras ilin. Cetere, Zhang Qicheng kaj aliaj ankaŭ ĉinigis artikolojn el alilandaj E-gazetoj por publikigi ilin en ĉinaj gazetoj. Tiel ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj subtenis unu alian en la kontraŭfaŝisma batalo. Tiam la sidejo ĉiam plenis de tia internacia atmosfero.

De sia fondiĝo en 1931 ĝis 1937, kiam eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĈPEU ekzistis nur iom pli ol 5 jarojn, tamen ĝi malfermis novan etapon de la ĉina E-movado. Rememorante tiun periodon, Zhang Qicheng diris: "Tia patriota fervoro kaj internaciisma sento ankoraŭ estas tiel intimaj, tiel varmaj kaj tiel sopirataj."

### POR "EL POPOLA ĈINIO"

Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito Zhang Qicheng venis al Wuhan, Chongqing kaj Singapuro por sin okupi pri la progresema ĵurnalismo. En 1949 li venis de Hongkong al Pekino.

Tiam la Ĉina Popola Respubliko ĵus fondiĝis. Li invitite eklaboris en la Internacia Informa Buroo sub la Ŝtata Informa Administracio, kies tasko estis eldoni fremdlingvajn revuojn kaj librojn por



S-ro Zhang Qicheng

Foto de LI CHUNGENG

konigi Ĉinion al alilandanoj. Tutage venis en lian kapon la ideo, ke la buroo eldonu Esperantan revuon. Tiutempe, dank' al la favorado de la registaro ĉinaj esperantistoj havis ŝancon pliprogresigi E-movadon. Tial li prezentis la ideon al s-ro Hujucz, estro de la Eldona Administracio, kaj interkonsiliĝis kun li. Ĉi tiu tute aprobis lian ideon kaj afable promesis subteni lin por ĝin efektiviĝi. La tiama estro de la Informa Administracio estis s-ro Hu Qiaomu, kun kiu Zhang Qicheng konatiĝis, kiam li aktivis esperantiste en Ŝanhajo en la 30-aj jaroj. S-ro Hu legis lian planon kaj senhezite aprobis.

Zhang Qicheng komencis diversajn preparajn laborojn. La plej urĝa tasko estis varbi altnivelajn Esperantajn redaktorojn. Poste Venlo Fon kaj Honfan venis al la redakcio. Kaj tiel naskiĝis en majo 1950 la simpla Esperanta revuo "El Popola Ĉinio".

Komence de 1953, Zhang Qicheng forlasis la buroon kaj eklaboris en alia institucio. Tamen li ĉiam zorgis pri Esperanto kaj EPĈ.

EPĈ iam misiris dum la Kultura Revolucio. En 1978 Ĉinio ek-

praktikis la politikon de reformado kaj pordmalfermo. Ankaŭ la enhavo de la revuo bezonis reformadon. Tial kiel kunfondinto de EPĈ Zhang Qicheng revenis al ĝia redakcio en junio 1979. Li laboris kiel ĝia ĉefredaktoro ĝis 1983.

Dum la pli ol 3 jaroj Zhang Qicheng faris renovigon al la revuo. En ĝi publikiĝis multe da artikoloj, kiuj multflanke konigis Ĉinion, kaj samtempe pliiĝis raportaĵoj pri ĉina kaj alilandaj E-movadoj kaj artikoloj pri Esperanto mem. Pro tio niaj legantoj povis pli multe koni la ĉinajn historion, kulturon, morojn, E-movadon kaj aliajn. La revuo fariĝis ne nur fenestro por koni Ĉinion, sed ankaŭ ilo por disvastigi Esperanton. De tiam la novaspekta EPĈ gajnis pli da legantoj.

## AKTIVULO KAJ ORGANIZANTO

La fondiĝo de la popola respubliko favoris ankaŭ fondon de tutlanda Esperanta organizo. En januaro 1950 Hujucz kunvokis kunsidon de ĉinaj esperantistoj, en kiu oni diskutis pri starigo de landa organizo. Kaj Zhang Qicheng estis

rekomendita al la prepara laboro por tio. En marto 1951 ĈEL fondiĝis en Pekino. Zhang Qicheng estis elektita kiel ĝia konsilanto. De tiam li ĉiam laboras kiel ĝia gvidanto kaj faris grandan kontribuon por perfektigi ĝin, progresigi la ĉinan movadon kaj plifortigi la interŝanĝon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.

En 1956 Ĉinio unuafoje sendis E-delegacion el Zhang Qicheng, Ĵelezo kaj Chen Yuan al UK, t.e. la 41-a UK en Kopenhago. De 1978 ĝis 1987 Zhang Qicheng ĉiujare gvidis E-delegacion al UK. Dum la kongresoj li multe kontaktiĝis kun UEA, diverslandaj E-organizoj kaj esperantistoj. En la 65-a UK en 1980 ĈEL estis akceptita kiel landa asocio de UEA. Li kaj Chun-Chan Yeh estis elektitaj kiel komitatanoj de UEA.

En 1980 Zhang Qicheng fariĝis ĝenerala sekretario de ĈEL kaj, en 1981, ĝenerala sekretario de la societo "Amikoj de Esperanto", kiun iniciatis ĉinaj eminentuloj. Poste en diversaj partoj de Ĉinio fondiĝis lokaj E-organizoj kaj aperis multe da E-kursoj. En 1986 okazis en Pekino la 71-a UK. Estis la unua fojo, ke UK okazis en Ĉinio, kaj ĝi akiris grandan sukceson. Ĉio tio estas nedisigebla de la klopodo de Zhang Qicheng, Hujucz, Ĵelezo, Chen Yuan kaj aliaj gvidantoj de ĈEL.

En 1981 "La Mondo", organo de ĈEL, fondiĝis. Kiel gvidanto de ĈEL li ofte aperigis artikolojn en la gazeto por konigi UK kaj en-kaj eksterlandajn movadojn kaj por trakti kiel progresigi lokan movadon. Tiuj artikoloj bone influis la ĉinan E-movadon.

Zhang Qicheng estas maljuna, tamen li ankoraŭ funkcias kiel vicprezidanto de ĈEL kaj ĉefredaktoro de "La Mondo". Li ĉiam zorgas pri la ĉina movado. Okaze de la 45-jariĝo de EPĈ, li kore deziras, ke nia revuo pliboniĝu kaj fariĝu ponto de amikeco inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. ■



S-ro Zhang Qicheng kaj aliaj ĉinaj samideanoj gastis ĉe s-ro Erich Sandner en Germanio en 1985.


S-ro Zhang Qicheng kaj liaj familianoj





S-ro Zhang Qicheng (maldekstre), s-ro Bakin (la dua de maldekstre), s-ino Isobe Yukiko (la dua de dekstre) kaj s-ro Chun Chan Yeh (dekstre) dum la UK en Svedio

S-ro Zhang Qicheng vizitis la Kroatan Internacian Kulturajn Servojn en akompano de s-anino Spomenka Štimec en 1983.



S-ro Zhang Qicheng (dekstre) kaj ĉinaj esperantistoj s-ro Liu Ren (maldekstre), s-ro Ĵelezo (la dua de maldekstre) kaj s-ro Tikos (la dua de dekstre) en Wuhan en 1938

# Gratulon al vi, d-ro Reinhard Selten



S-ro Reinhard Selten

**L**A 11-an de oktobro 1994, post butikumado kun sia edzino, s-ro Reinhard Selten, profesoro de la Universitato de Bonn, revenis hejmen kaj tuj ricevis telefonan informon: La Reĝa Sveda Akademio pri Sciencoj anoncis, ke la Nobel-premio pri ekonomiko de 1994 estis aljuĝita al li pro lia kontribuo al la ludo-teorio en ekonomiko, kune premiigis du usonaj profesoroj: John C. Harsanyi de la Kalifornia Universitato kaj John F. Nash de la Princetona Universitato.

Post kiam la Nobel-premio pri ekonomiko stariĝis en 1969, estas la unua fojo, ke germano premiigis, kio vekis grandan atenton en la akademia kaj politika rondoj de Germanio.

Same forte reagis la internacia e-istaro, ĉar s-ro R. Selten estas ankaŭ e-isto, nia samideano. S-ino Elsbeth Bormann, prezidanto de la Germana E-Asocio, kaj Dr. Prof. John Wells, prezidanto de UEA, gratulis la Nobel-premiiton. S-ro Ulrich Lins, vicprezidanto de UEA, kaj s-ro Istvan Ertl, redaktoro de "Esperanto", kune intervjuis s-ron R. Selten. E-periodaĵoj multe raportis pri tio.

S-ro R. Selten estas la 4-a Nobel-premiito-esperantisto. La aliaj estas: Joseph J. Thomson, en 1906 pri fiziko; Wilhelm Ostwald, en 1909 pri kemio; Alfred Fried, en 1911 pri paco. Pli multaj Nobel-premiitoj estas simpatiantoj de Esperanto, inter kiuj estas mondfama sciencisto Albert Einstein kaj hispana verkisto Camilo José Cela premiita en 1989 pri literaturo.

S-ro R. Selten naskiĝis en 1930. El la Frankfurta Universitato li

diplomiĝis pri matematiko en 1957 kaj doktoriĝis en 1961. Poste li trovis sin ne interesiganta pri la nura matematika instruado kaj studado. Do dum sia asistado al ekonomika profesoro Sauermann, Selten komencis studadon pri matematiko kun ekonomiko, iom post iom starigis sian akademian pozicion en la ludo-teorio de ekonomiko. En 1967 li estis vizitanta profesoro en la Universitato de Berkeley kaj en 1969 profesoro en la Libera Universitato de Berlino, en 1972 en la Universitato de Dielefeld. Ekde 1984 li profesoras en la ekonomi-teoria fakulo de la Universitato de Bonn.

La studkampo de Selten estas apliko de ludo-teorio en ekonomiko. La ludo-teorio, kiel branĉo de matematiko, estas unue verkita de usonaj profesoroj John von Neumann kaj Oskar Morgenstern en la 40-aj jaroj. La teorio per matematika rimedo studas pri la problemoj: ĉu ekzistas la plej bona taktiko por la konkuranto venki sian rivalon, kiel trovi tiun taktikon, ktp. En sia perfektigo, ludo-teorio etendiĝas al la ekonomi-teorio kaj estas aplikata en analizado pri la revoluo de ekonomio.

Laŭ ludo-teorio, la ludanto de ŝako aŭ pokero devas uzi taktikon por venki la rivalon. Same, la konkurantoj en ekonomio ankaŭ faras sian taktikon por sia celo. Tamen, fine oni atingis ekvilibrantan situacion, kvankam ili estas rivalaj unu al la alia. La iniciateca analizo de Selten kaj aliaj du premiitoj pri "La ekvilibro en la nekoopera ludo-teorio" starigis ilian gvidan pozicion en tiu kampo.

Kiel specialisto de ludo-teorio, ĉu s-ro Selten estas ankaŭ spertulo

pri pokero kaj ŝako? Fakte li neniam ludis pokeron, eĉ ne konas la regulojn. Li opinias, ke se iam li konus la regulojn, li ankoraŭ ne povus bone ludi ĝin, ĉar la ludo-teorio nur montras la ĝeneralajn leĝojn, kaj la ludo mem estas variaĵo.

17-jara, Selten komencis lerni Esperanton kaj antaŭe li kontaktis E-on pere de sia patro, kiu aktivis en blindula E-movado. Selten membriĝis al UEA en 1958 kaj en 1969 fariĝis dumviva membro. Vere li indas je la titolo de aktivulo: ĉ. 1960 li estis vicprezidanto de la E-klubo en Frankfurto, li gvidis E-kurson, kaj tiam la kursfinintoj renkontiĝis ĉiun jaŭdon en lia hejmo, per E-o li konatiĝis kun sia edzino, kaj li instigis sian pli junan fraton en Esperantujojn. Li estas ankaŭ membro de la Germana Esperanto-Asocio kaj Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. En 1982, kun alia persono Selten publikigis "Ĉu mi lernu Esperanton? Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj".

Post premiigo s-ro R. Selten fariĝis centro de la publika atento. Tamen li ne volas esti publika figuro, sed intencas vivi sian vivon kiel antaŭe. Neniam li kaŝis kaj kaŝos sian e-istecon, li eĉ serĉas okazon paroli pri Esperanto en intervjuoj. Li opinias, ke lerni E-on ĝenerale evoluigas la intelektan vivon de persono kaj junaĝe lernita Esperanto donas grandan avantaĝon por alproprigi aliajn lingvojn.

Nia samideano Selten havigas ankaŭ al Esperanto renomon.

Gratulon al vi, d-ro Reinhard Selten. ■



## ESP-NOVAĴOJ

● La 21-an de januaro 1995 la Dandong-a E-Asocio de Liaoning-provinco okazigis jarkunvenon de 1994 por memori la 135-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. En la kunveno oni ekspoziciis kaj vendis Esperantajn eldonaĵojn. Intertempe okazis ferma ceremonio de la 7-a elementa E-kurso funkciigita de la asocio oktobre de 1994, kaj 22 lernantoj sukcese finis sian lernadon.

(Ma Fengchen)

● La 24-an de decembro 1994 la Changchun-a E-Asocio de Jilin-provinco okazigis Esperantan kolkvon kiel sian jarkunvenon, kiun ĉeestis pli ol 40 esperantistoj el Pekino, Jilin kaj Shenyang. Dum la kolokvo funkciis konversacia kurso, kiun gvidis aŭstraliaj E-aj geedzoj John Macleod kaj Macleod Haidi.

(Li Liang)

● Memore al la 135-a datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof la Shenyang-a E-Asocio de Liaoning-provinco kunsidis la 25-an de decembro 1994. Oni faris resumon de la laboro en 1994 kaj prezentis la laborplanon de 1995.

● Memore al la 135-a datreveno de la naskiĝo de D-ro L.L.Zamenhof la Changsha-a E-Asocio de Hunan-provinco okazigis aktivadon en la 18-a de decembro 1994. Membroj de la asocio kolektiĝis en parko por kanti, distriĝi ktp. Tio altiris al si dekojn da gejunuloj, kiuj partoprenis en dimanĉa lernado de fremdaj lingvoj. Ili montris

Partoprenantoj de la aktivado okazigita de la Changsha-a Esperanto-Asocio



intereson por lerni Esperanton. La asocio funkciigis E-kurson en la Laborista Universitato de la Malpeza Industrio de Hunan-provinco, kaj en la kurso lernis pli ol 20 lernantoj.

(Song Yande)

● De la 1-a ĝis la 7-a de julio, 1995, Hungaria Esperanto-Asocio organizos internacian konferencon pri turismo kaj medio-protektado. La konferenco konsistos el 2-tagaj prelegoj, ekskursoj kaj kulturaj programoj en la ceteraj tagoj. Aligkotizo: de 28 gld ĝis 38 gld por individuoj. Grupoj ricevos rabaton. La aliĝon sendu al: Hungaria Esperanto-Asocio, H-1368 Budapest Pf. 193.

● La 29-an de septembro, 1994 en Skopje de Makedonio, okazis kunveno por fondiĝo de la Makedona-Ĉina Societo por amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj de la du landoj. Pri la signifo kaj celo de la societo parolis s-ro Pero Korobar, prezidanto de la iniciativa komitato. Parolis ankaŭ reprezentanto de la Ĉina Ambasadato en Skopje. La kunsidon ĉeestis multaj anoj de la loka Esperanto-societo.

● De la 4-a ĝis la 7-a de novembro 1994 en Niĵnij Novgorod okazis la 16-a Ruslanda Esperanto-Kongreso, kiu unuigis la du asociojn landajn: Ruslanda Esperanto-Asocio (REA) kaj Rusia Esperantista Unio (REU), kiuj provizore uzos la statuton kaj nomon Rusia Esperantista Unio. Al la kongreso venis salutletero de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (KEK), sendita de ties

sekretario k-do Vincent Charlott, kiun en la ferma kunveno laŭtlegis novelektita REU-prezidanto Nikolao Gudskov. En la letero k-do Charlott informis, ke en Sanpeterburgo (Leningrado) okazos la 11-a Internacia Konferenco de KEK de la 1-a ĝis la 5-a de aŭgusto 1995. Jen REU-estraro: prezidanto — Nikolao Gudskov; vicprezidantoj — Andreo Ananjin kaj Halina Gorecka, estraranoj — Viktoro Aroloviĉ, Irina Gonĉarova. La kongreso decidis okazigi la sekvan Ruslandan Esperanto-Kongreson en Tumen, rezerve Krasnojarsk, aŭtune 1995.

● La 14-an de decembro 1994, en Hanojo okazis solena jubileo por du verdaj eventoj: la 135-a datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof kaj la 38-a datreveno de la fondiĝo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) (1956-1994). En salono de la Amikeca Domo ankoraŭfoje troviĝas la verda flago, la rubandoj jubileaj kaj la portreto de Zamenhof, kiu kvazaŭ kun ĝojo bonvenigas la hanojajn e-istojn, la reprezentantojn de Unio de Vjetnamaj Amikecaj Organizaĵoj, de enlandaj ĵurnalistoj kaj de Vjetnama Inform-Agentejo. La sekvantan matenon, longa artikolo pri la 135-a datreveno de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof estis elsendita tra la ondo de Vjetnama Radiostacio, dufoje en tiu tago. Kaj la ĵurnalo "Sajgon-liberigo" en Ho-Chi-Minh-urbo aperigis tiun artikolon en la sama tago.

Vjetnamaj esperantistoj festas en Hanojo la 135-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.





# Feriado de EPC-anoj


Fotoj de LIU SIGONG


En la Pendanta Templo



"Plaĉas al mi ĉio, kion  
mi vidis."


EPC-anoj interesataj  
de antikvaĵoj en tem-  
plo en Wutai-  
montaro





EPĈ-anoj antaŭ giganta budhostatuo de Yungang

Aŭguste de 1994 stabanoj de EPĈ havis plezurajn feriadojn. En la tritaga feriado ili vizitis la faman budhisman kavernaron Yungang en Datong, la Pendantan Templon sur rokmuvo de la monto Hengshan kaj la budhisman sanktejon Wutai-montaro. Ĉiuj estis ravitaj de la superbaj pejzaĝoj kaj la imponaj antikvaj konstruaĵoj.



EPĈ-anoj absorbitaj de rakontado de ĉiĉerono



En paŭzo dum longa veturado

# Adiaŭ al la malnova sistemo

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de HAN HONG kaj LIU SIGONG

**L**A regiono ĉirkaŭ Bohai-marĉo estas tre grava, ĉar tie estas fortaj la bazaj industrioj kaj troviĝas nombro da famaj entreprenoj. Ekzemple, en Shenyang, ĉefurbo de la provinco Liaoning, vice staras Kabla Fabriko, Transformatora Fabriko, Mulda Fabriko kaj Ilmaŝina Fabriko, la plej grandaj en Ĉinio, kaj aliaj sume pli ol 100 grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj. Post vizito iu japana entreprenisto diris, ke la loko povas esti nomata "Ruvalo en la Oriento".

Sed en la granda tajdo de la ekonomia reformado de Ĉinio, tiuj ŝtataj entreprenoj, kiuj ludis la ĉefan rolon en la ĉina ekonomio, falis en embarason. Tro longe uzitaj ekipaĵoj, manko de kapitalo kaj pezaj ŝuldoj tiel ŝarĝis ilin, ke ili ne povis facile fari eĉ unu paŝon antaŭen. Sekve, malembarasi la grandajn kaj mezgrandajn ŝtatajn entreprenojn, inkluzive tiujn de la regiono ĉirkaŭ Bohai-marĉo, fariĝis interesa paroltemo tra la tuta Ĉinio.

Dum mia vizito en la nomita regiono mi ankoraŭ rimarkis diversajn malfacilojn alfrontatajn de la entreprenoj. Tamen mi ankaŭ klare sciis, ke ĉiuj tiuj entreprenoj penas por liberigi sin el la embaraso kaj jam atingis certan sukceson. Plirapidigi la reformadon de la entreprenoj estas la komuna celo.

En la pasinteco la ĉinaj ŝtataj entreprenoj ĉiam praktikis la planizitan ekonomion, laŭ kiu la ŝtato planis kaj respondecis pri la krudaj materialoj, produktaj taskoj kaj produktoj. Tial en la reformado de la ekonomia sistemo la unua problemo alvizaĝata de ili estas, kiamaniere direkti sin al la merkato kaj starigi konkurencon sistemon konforman al la merkata ekonomio. En la Kabla Fabriko de Shenyang inĝenierino Zheng Limin konigis al mi la staton de la fabriko.


"Nia fabriko estas malnova entrepreno kun 17 600 laboristoj. Ĉiujare ĝi bezonas grandan kvanton da kupro kiel krudan materialon. Nia najbaro la Metalurgia Fabriko de Neferaj Metaloj produktas grandan kvanton da kupro. La du fabrikoj estas apartigitaj nur per muro kaj atingeblaj per la respektivaj specialaj fervojoj. Sed dum longa tempo la kupro produktita de la metalurgia fabriko estis transportita aliloken laŭ la ŝtata plano, dum la kupro bezonata de nia fabriko estis transportita el la malproksima limregiona provinco Yunnan. Tiel ambaŭ fabrikoj mal-

ŝparis multege da homfortoj, materialoj kaj mono. Krome, la ŝtato ellaboris la produktan planon por nia fabriko, havis la ekskluzivan rajton vendi niajn produktojn kaj senrezerve prenis la profiton de nia fabriko. Sub tia sistemo nia fabriko havis nenium memstarecon kaj sekve ne povis esti vivoplena. Antaŭ 1984 la jara vendovaloro de nia fabriko ĉiam fluktuis ĉirkaŭ 300 milionoj da juanoj. Iom post iom reduktiĝis la ŝtataj instrukcioj, kaj ekde 1992 la ŝtato ne plu asignis al nia fabriko kupron, nek respondecis pri la vendado de niaj produktoj. Tiam en Ĉinio la nombro de kablaj fabrikoj jam multiĝis de 8 al 3 000, kaj la vilaĝaj entreprenoj funkciigataj de kamparanoj faris al nia fabriko defion per malalta prezo de kablo. Sub tia situacio nia fabriko, kiu atentis nur la produktadon sen zorgi pri la vendado, unuafoje ekkonis la gravecon de la merkato."

"La merkato ne konas geografian diferencon. Kie estas la bezono, tie devas esti la produktoj de nia fabriko," diris Huang Zhaochun, fabrikestro kaj supera ekonomikisto. Kun tia konkludo li decideme kondukis la fabrikon en la merkaton.

Iun profundan nokton kliento petis telefonistinon de la fabriko trakonekti fabrikestron Huang Zhaochun. "Pardonon, la hejma telefono de nia fabrike-

## Skema mapo de lokoj de la regiono



## REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO


tro estas konfidenca.” La telefonistino fidele observis la regulon de la fabriko kaj ne faris trakonekton. Informiĝinte de la kliento pri la afero, la fabrikestro tuj sciigis la telefonistinojn: “Ekde nun, vi devas ekskluzive trakonekti, se estos telefonvokoj al la estraranoj de la fabriko, tute egale ĉu tage ĉu nokte.” Por pligrandigi la vendosumon de kablo, la fabrikestro trifoje vojaĝis al la provinco Shandong. Prenante Shandong kiel akson, li disvastigis la vendoreton kaj finfine ekhavis sian lokon en la merkato de orienta Ĉinio, kie troviĝas multaj konkurantoj.

Nun la Kabla Fabriko de Shenyang ne nur nomumis du vicestrojn pri la vendado, sed ankaŭ starigis ene de la fabriko kompletan garantian sistemon de mendoplenuo, pagigo, transportado kaj postvenda servo. El tio rezultis, ke la fabriko firme staras en la intensa merkata konkurenco.

Reformi la sistemon de la ŝtataj entreprenoj estas ŝlosilo de ilia radikala ŝanĝiĝo. Pro tio la ĉina registaro faris la projekton starigi modernan entreprenan sistemon, t.e. iri la vojon de akcia kompanio. Tiurilate la ŝtataj entreprenoj en la regiono ĉirkaŭ Bohaimaro faris utilajn provojn. Ekzemple, en la urbo Yantai de la provinco Shandong 226 ŝtataj entreprenoj provpraktikis akcian sistemon. En Yantai multaj ŝtataj entreprenoj estas profunde influitaj de la planizita ekonomia sistemo. Serioza deficitado iam estis granda problemo malfacile solvebla por nemalmultaj el ili. Post praktikado de la akcia sistemo la ŝtato, entreprenoj kaj individuoj ĉiuj fariĝis akcianoj kaj ricevas sian parton el la superprofitoj. Sekve de tio, reduktiĝis la rekta interveno de la registaro kaj solviĝis la longe malfacile solveblaj kontraŭdiroj de nedistingo de la registara gvido kaj entreprena administrado kaj de neklara aparteno de la proprietaĵo. La akcia sistemo mobilizis la aktivecon de la laboristoj kaj oficistoj, kiuj aĉetis akciojn de la entreprenoj, ĉar la funkciado de la entreprenoj rekte koncernas iliajn interesojn. Krome, iuj ŝtataj entreprenoj de Yantai ankaŭ faris reformadon de la entreprena strukturo kaj formis 69 novajn grandajn kaj mezgrandajn entreprenajn grupojn, surbaze de entreprenoj kun superaj avantaĝoj kaj produktoj kun famaj markoj. Post sia formiĝo la Kompanio de Entreprenaj Grupoj de Neferaj Metaloj de Yantai rapide ekspansiis kaj disvolviĝis en 23 entreprenajn grupojn transprofesiajn kaj transregionajn kun multspecaj posedantecoj. La totala kapitala valoro rapide kreskis kaj la ekonomia efiko multe altiĝis.

Dum la reformado de la malnova sistemo kaj starigo de la nova la ŝtataj entreprenoj alfrontas la alian ŝlosilan problemon, t.e. pliigi siajn ekonomiajn fortojn. Kiam mi faris intervjuojn en Tianjin, Shenyang, Taiyuan kaj aliaj urboj, iuj ekonomikistoj diris al mi, ke enkonduki internacie progresajn teknikojn kaj instalaĵojn kaj havigi eksterlandan kapitalon por fari teknikan reformadon al entreprenoj estas profitodona vojo. Dum pluraj jaroj la Krucoplakaja Fa-

briko de Tianjin suferis de deficitado de 5 milionoj da juanoj kaj sin trovis ĉe la rando de bankroto. Post enkonduko de investaĵoj de Hongkong-a kompanio en 1990, la fabriko faris la produktadon laŭ




En la Dalian-Brollo-a Limigita Kompanio de Ŝtalaj Tuboj

la postulo de eksterlandaj produktoj, aplikante la kvalitan administradon en la tuta produkta procezo. Konforme al la nova produkta metodo, la fabriko reformis ankaŭ la sistemon de enpostenigo kaj salajrado kaj starigis la sistemon de konkurenco kaj stimulado interne de la fabriko. En la unua jaro post la komuna investado la fabriko gajnis la profiton de dek milionoj da juanoj. Ĝis nun 418 ŝtataj entreprenoj de Tianjin, t.e. 38% de la ŝtataj entreprenoj de la urbo, plenumis sian reformadon, utiligante eksterlandajn investaĵojn. Nun nemalmultaj el ili jam eniris en la periodon de “rikolto” kaj fariĝis ĉefaj donantoj de profito kaj imposto.

La Yongxin-Shenyang-a Kemiindustria Akcia Kompanio Limigita estas unu el la entreprenoj de Ĉinio, kiuj plej frue enkondukis kapitalon el Hongkongo por fari teknikan reformadon. Antaŭe ĝi estis kemiindustria fabriko. Fraŭlino Zhao, asistanto de la ĝenerala direktoro de la nomita kompanio, diris, ke post la komuna investado la kompanio enkondukis el Japanio ekipaĵon kun jara produktokvanto de dekmil tunoj da glueca polivinilklorido. Poste la kompanio levis la produktopovon al dudekmil tunoj. En la lastaj 4 jaroj la kompanio elspezis ducent milionojn da juanoj por teknika reformado, kaj tio tute ne eblis pasintecce. Kaj rezulte de la teknika reformado, la malnova fabriko kun kadukaj instalaĵoj, postgintaj teknikoj kaj tre malbona profito fariĝis entrepreno, kiu okupas la 5-an lokon en la kemiindustriaj entreprenoj de Ĉinio.



S-ro Chen Jizhuang, ĉin-flanka direktoro de la Dalian-Brollo-a Limigita Kompanio de Ŝtalaj Tuboj, ne povis deteni sin de emocio, parolante pri sia kompanio. La kompanio estas entrepreno investita de Ĉinio kaj Italio kune. Unuavide, ĝi ne estas granda, tamen la de ĝi produktitaj specialformaj ŝtaltuboj ĉiuj atingis la internacian normon, kaj pli ol 70% de la produktoj estas eksportataj. Pro tio la kompanio fariĝis unu el la grandaj entreprenoj de specialformaj ŝtaltuboj de Ĉinio. Sed antaŭ 10 jaroj ĝi estis filio de iu fabriko de fajrorezistaj materialoj, kaj en la ko-

(Daŭrigo sur p.66)





En la Kabla Fabriko de Shenyang

En laborejo de la Kompanio de Entreprenaj Grupoj de Neferaj Metaloj de Yantai




# REGIONO ĆIRKAŬ BOHAI-MARO



Transformatoro, farita de la Transformatora Fabriko de Shenyang por Pakistano, estas kontrolata.

En la Pekina Popola Presmaŝina Fabriko



En la Transformatora Fabriko de Shenyang



# Komunikado, lingvo kaj la 4-a Monda Virina Konferenco

de HANS ERASMUS<sup>1</sup> (Nederlando)



La aŭtoro (maldekstre) kaj raportistino de la Ĉina Radio Internacia dum la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto

## ENKONDUKO

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV<sup>2</sup>) lingvo havas tri signifojn:

1. Sistemo de vortoj, uzata de unu gento, unu nacio aŭ unu grupo da nacioj, por interkompreniĝado;
2. Tiu sistemo, rigardata kiel karakterizaĵo de speciala grupo da individuoj aŭ de aparta fako;
3. Ĉio, kio servas por esprimi pensojn aŭ sentojn.

Kiel ekzemplojn de la unua signifo la vortaro mencias la hispanan lingvon, patrinan lingvon ktp. Ekzemploj de la dua signifo estas: la scienca kaj teknika lingvoj, ankaŭ ĵargono, dialekto ktp. La lingvoj de la surdmutuloj, de la bestoj, kaj figurasence la lingvo de la koro, de la rigardoj estas ekzemploj de la tria signifo laŭ PIV. Fakte, la tria signifo havas pli vastan signifon de lingvo.

Multaj opinias lingvon ununura vehiklo aŭ instrumento por efektiviĝi interkompreniĝadon. Ili forgesas, ke vortoj ofte malmulte kontribuas al tiu interkompreniĝado. Laŭ kelke da spertuloj pli multe gravas "lingvo" de korpo aŭ komunikado sen vortoj kaj la cirkonstancoj aŭ kunteksto de komunikado.

## LA UNUA MONDA KONFERENCO DE LA INTERNACIA JARO DE VIRINOJ

Jam okaze de la Unua Monda Konferenco de la Internacia Jaro de Virinoj en Meksiko en 1976 Universala Esperanto-Asocio (UEA) rekonis la

gravecon de tiu konferenco kaj uzis sian rilaton kun Unuiĝintaj Nacioj, specife Unesko, por informi mondscale pri la aktivecoj de UEA sur tiu ĉi tereno.<sup>3</sup> UEA starigis komisionon, gvidatan de Elisabeth Bormann el Germanio. Ĝia tasko estis: iniciatado de novaj agadoj kadre de la virina movado, instigi la aktivecojn de virinoj en la delegita reto de UEA kaj kunordigadon de la diversaj agoj, kiuj rezultos el tiu Internacia Virina Jaro. Pro tio la 60-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago en 1975 dediĉis sin tute al la temo "virino". Per multe da kunvenoj ene de la Esperanto-movado la partoprenantoj estis informitaj pri la pozicio de virinoj, dum Esperanto-aktivuloj ankaŭ en ne-Esperanto-rondoj donis informojn pri la rolo, kiun Esperanto povus ludi tiurilate. Pere de Esperanto pli mondskala komunikado inter virinoj eblas, kaj la komisiono emfazis la neceson informi virinajn asociojn pri la avantaĝoj de Esperanto kiel taŭga rimedo por tiu celo.

Fine de la kopenhaga kongreso rezolucio atentigis pri la valoro de Esperanto kiel instrumento je mondskala diskuto pri sociaj problemoj, kiel ekzemple la problemoj de virinoj. La rezolucio substrekiis la neceson, ke esperantistoj daŭre strebu al egaleco de virinoj.

## AGU POR EGALCO, PROGRESO KAJ PACO

Faciligi la internacian komunikadon estas la plej grava celo de la Esperanto-movado. Ni klopodas



uzi nian lingvon kaj klarigi niajn ideojn el niaj vidpunktoj ene de nia kunteksto. Alia maniero estas aŭskulti la lingvaĵon de specifaj grupoj, funde kompreni la pensmanieron de tiu grupo aŭ movado. Kiamaniere uzo de komuna internacia lingvo povus kontribui al realigo de specifaj celoj de tiu grupo aŭ movado? La religia movado Oomoto celas uzadon de unu lingvo internacie kaj elektis Esperanton kiel internacian komunikilon (“interlingvo”). Bahaa Kredo ankaŭ proponas uzon de unu lingvo internacie, tamen ankoraŭ ne elektis tian specifan perilon de internacia komunikado (“Universala Lingvo”). “Rotary International”, mondorganizo, kiu strebas al specifa vivsinteno, nombras ĉirkaŭ unu milionon da membroj. Se oni pristudas la celojn<sup>4</sup> de ĉi tiu grupo, la konkludo estas, ke uzo de vere internacia lingvo (Rotario uzas nacian lingvon: la anglan/usonon kiel internacian komunikilon) nepre povus kongrui pli profunde kun la ideoj de ĉi tiu organizo. Ankaŭ Humanistoj kontraŭas diskriminacion pro lingvo, tamen ankoraŭ ne diskutis mondscale, ĉu neŭtrala universala lingvo pli bone povus realigi la ideojn de la Humanista movado. Koncerne la politikon en Eŭropo la Verduloj same kiel la transnacia Radikala Partio akceptis Esperanton kiel internacian helplingvon. Antaŭ nelonge la Brita Liberalula Partio akceptis proponon oficiale subteni la internacian lingvon Esperanto.<sup>5</sup>

Ni konsciu, ke lingvo ne estas nur vehiklo, ni konsideru ĝin en pli larĝa senco. Ni klopodu identigi nin kun la konceptoj de aliaj. Ni klopodu kompreni la lingvaĵon de grupo aŭ organizo kaj traduku niajn ideojn en la lingvaĵon de tiu grupo aŭ organizo.

Agu por egaleco, progreso kaj paco estas la ĉeftemo de la 4-a Monda Virina Konferenco en Pekino de la 4-a ĝis la 15-a de septembro 1995. Mi ne priskribos la agadojn kadre de Esperanto-movado depost la Unua Monda Konferenco de la Internacia Jaro de Virinoj en 1976. Mi rememorigas nur la aktivecojn de la Esperanto-movado kadre de la Nordia Forumo pri la temo “Vivo kaj laboro de virinoj — ĝojo kaj libereco”, kiu okazis en Turku (Finnlando) lastsomere.<sup>6</sup>

Komence de ĉi tiu jarcento la socialista movado bone komprenis, ke lernado de Esperanto povas kontribui al unuigo de socialistoj kaj plibonigi la pozicion de homoj, kiuj ne havis okazon lerni fremdajn lingvojn. La pozicio de multege da virinoj estas komparebla kun tiu situacio de antaŭ 100 jaroj.

Jen interesa temo por la tuta Esperanto-movado, sed specife por la ĉina Esperanto-movado: klarigu kaj substreku dum la venonta virina konferenco en Pekino ĝuste tiujn ideojn, por ke ankaŭ la virinoj povu profiti de la uzado de relative facila, ne-nacia,

neŭtrala interlingvo por atingi pli da **egaleco, progreso kaj paco.** ■

1. La aŭtoro estas ĝenerala direktoro kaj programgvindanto ĉe la Eŭropa Komisiono de la Eŭropa Komunumo por la vivmedio en Bruselo.
2. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun suplemento, represo de la tria eldono, 1987, Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo.
3. Esperanto Documents, new series nr. 8; The Universal Esperanto Association in International Womens Year 1975, Universal Esperanto Association, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam.
4. Laŭ la statutoj: “Ĉiu Rotario-klubo estu rondo de viroj kaj virinoj de bona volo, kiuj klopodas vivi kiel lojalaj, honestaj kaj bonvolaj homoj, kiuj volas esti inter siaj proksimumoj, pretaj helpi, apogi kaj servi ilin. Ĉio sen diskriminacio laŭ raso, religio aŭ politika vidpunkto. Rotary estas vivsinteno, (ne pensmaniero), bazo por servi ene de kaj pere de profesio, ofico aŭ socio. Ne por propra profito, sed favore al la proksimumo.” Antaŭ 60 jaroj kadre de la Rotario-movado komisiono oficiale proponis Esperanton kiel internacian helplingvon. Post diskuto la Rotario-movado ne akceptis la proponon kaj decidis unue atendi la respondon al la ĝenerala demando ĉu Esperanto, ĉu alia lingvo iĝos la universala helplingvo kaj ĉu la registaroj instruigos tiun lingvon liberevole aŭ devige.
5. Rezolucio, adoptita ĉe la 109-a Jarkunveno de la Liberalula Partio, en Morecambe (Britio), je 22-25 septembro 1994
6. Heroldo de Esperanto 14-01-1995

#### ABONTARIFO DE EPĈ POR 1995

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1900,00	1600,00	3500,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
<b>TARIFO A:</b> Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
<b>TARIFO B:</b> Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
<b>TARIFO C:</b> Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
<b>Rim.</b> Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.				

# Buji-nacianoj sub ardezoj

Buji, unu el la nacimalplimultoj de Ĉinio, nombras 2.54 milionojn da membroj. Ili loĝas en la suda kaj sudokcidenta partoj de Guizhou-provinco, kaj parteto el ili en Yunnan, Sichuan kaj Guangxi.

En la lokoj loĝataj de buji-oj estas abundaj riĉfontoj kaj famaj turismaj vidindejoj, ekzemple Huangguoshu-akvofalo kaj la karsta kaverno "Draka Palaco". Iliaj domoj estis tegmentitaj per ardezaj tegoloj. La vakstinkturita ŝtofo de buji-nacio ĝuas altan renomon. El tia ŝtofo la virinoj faras kaptukojn, vestojn, jupojn kaj antaŭtukojn. El tia ŝtofo oni faras ankaŭ murornamaĵojn.

Buji-nacio havas multajn festojn kaj la plej solena estas la kanto-festo en julio. En la festotagoj kolektiĝas dekmiloj da naci-anoj kaj alinacianoj. Ili gaje amuziĝas en arbaro aŭ sur montodeklivo, kaj la gejunuloj neniam preterlasas la ŝancon por rendevui sian amaton.



Knabinoj en nacia kostumo

Domoj kun ardeza tegmento

Foto de XU XIANGJUN



Teatraĵo de buji-nacio

Foto de LI SHUA





Foto de **LI CHUNSHENG**




Virinoj kun sia infano sur la dorso

Foto de **XU XIANGJUN**

**NDE**



Rivero ekster vilaĝo Foto de **XU XIANGJUN**



XIAO HAN:

# Agrikultura ekologia eksperimento sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo



En eksperimenta kampo de la Tibeta Agronomia kaj Brutobreda Instituto

**L**A Qinghai-Tibeta Altebenaĵo estas aparta geografia unuo de Ĉinio. Ĝi evoluis de tropika kaj subtropika medioj de malalta situo super la marnivelo al la nuna frosta medio de alta situo. Pro ĝiaj riĉaj naturaj pejzaĝoj kaj granda influo sur la najbarajn lokojn kaj homan aktivadon oni rigardas ĝin kiel “naturan eksperimentejon” de tera scienco, biologio, scienco pri riĉaĵoj kaj mediologio.

Jam en la 50-aj kaj 60-aj jaroj la Ĉina Akademio de Sciencoj faris esploradon en Tibeto. En la 70-aj kaj 80-aj jaroj, observante la Planon pri Scienca Disvolviĝo de Ĉinio, la akademio faris longatempan kaj grandskalan sciencan esploradon en Tibeto, montregiono de Hengduan kaj tiu de Kekexili-Karakorum en tri stadioj. La spuroj de ĉinaj sciencistoj vidiĝis preskaŭ sur la tuta Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Pli ol 400 geofizikistoj, geologoj, geografoj, biologoj, agronomoj kaj aliaj sciencistoj el 14 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj partoprenis la esploradon kaj akiris riĉajn rikoltojn. Ili fundamente konstatis la tieajn naturan medion, specojn de vegetaloj kaj animaloj kaj naturajn riĉfontojn.

En 1993 la akademio faris esploradon pri formiĝo, media evoluo kaj ekologia sistemo de la altebenaĵo. La esplorado strikte rilatis al la disvolviĝo de la tieaj socio kaj ekonomio. En la esplorado oni devis respondi, kiamaniere la loko fariĝis tero, kiamaniere ĝi leviĝis kaj kio estas la trajtoj de ĝia medio kaj kiel ĝi ŝanĝiĝos en la estonteco, kaj krome, oni devis bone koni la vojon pri daŭra aplikado de la tieaj arbaroj, herbejoj, kampoj kaj aliaj riĉaĵoj. La agrikultura esplorado sin limigis en la basenoj de la riveroj Yarlung Zangbo, Lhaso kaj Nianchu. Pro tio la Ĉina Akademio de Sciencoj starigis tie agrikulturan ekologian eksperimentejon, la plej altan super la marnivelo en la mondo, por plenumi la taskojn starigi modelon de ekologia sistemo de kampoj, akceli transformadon de la tiea tradicia agrikulturo en altproduktan, bonkvalitan, benefikan kaj modernan agrikulturon, esplori la teorion pri pliprodukto de altebenaĵaj vegetaĵoj, akumuli fundamentajn datenojn kaj doni sciencan

bazon por ellabori la ŝtatan politikon de agrikulturo.

Dum longa tempo Tibeto kun malgranda herbejo prenis gren-produktadon kiel sian ĉefan laboron en agrikulturo. La basenoj de la supre menciitaj tri riveroj estas kovritaj de arboj nur je malpli ol 1%. Ja estas tre malfacile bone reguligi la agran strukturon, racie aranĝi la procentaĵojn de agrikulturo, forstumado kaj brutobredado, starigi modelon de la ekologia sistemo de kampoj kaj plenumi la taskon ekspluati la basenojn.

La eksperimentejo estas en Daz-farmo kun totala areo de 300 hektaroj, kie oni ĉefe entreprenas grenproduktadon kaj kulturamas malmulte da legomoj. Por starigi la modelon oni pririgardis la vastan teron parcelo post parcelo kaj faris sintezan planon laŭ la kondiĉoj de grundo, kaj donis grandan atenton al brutobredado kaj forstumado, malpliigis la gren-kulturan teron kaj levis la procentaĵojn de ekonomiaj plantoj kaj tiujn de brutonutraĵo.

En la basenoj de la riveroj Yarlung Zangbo, Lhaso kaj Nianchu la kulturataj grenplantoj, arboj kaj paŝtherboj estas malmultspecaj kaj por reguligi la agrikulturan strukturon oni nepre devas selekti specojn taŭgajn por la tiea ekomedio. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la eksperimentejo oni enkondukis 7 specojn da arboj kaj 50 specojn da paŝtherboj. Post selekto oni trovis printempan tritikon, maizon kaj kolzon, kies hektara produktokvanto estas 7.5-9 tunoj respektive, kaj elektis ankaŭ iujn bonspecajn arbojn kaj paŝtherbojn.

Post la struktura reguligo oni duonigis la kampon de greno, sed ĝia hektara produktokvanto leviĝis de 2.625 tunoj al 5.25 tunoj. Nun oni bone bredas porkojn kaj sukcese disvolvas plantadon de kolzo kaj paŝtherboj. Jam tute ŝanĝiĝis la monotona fenomeno en kulturo de malmultspecaj plantoj kaj formiĝis la nova strukturo de kulturo de greno, aliaj vegetaĵoj kaj brutobredado.

La basenoj de la supre menciitaj tri riveroj estas frosta agrikultura ekologia regiono en Ĉinio, tamen tie la hektara produktokvanto estas plej gran-

# Arta trezorejo sur la monda tegmento

Teksto de PANG BIAN

Fotoj de DU ZEQUAN

**P**OTALA-PALACO sur la monda tegmento faris la lazuran firmamenton grandioza pentraĵo. Sed kiam oni staros antaŭ tiu ĉi “pentraĵo”, oni tuj trovos, ke la nomo “trezorejo” estas pli preciza ol “pentraĵo” por metafore priskribi la palacon.

La palaco estis konstruita pro amo. Antaŭ 1 300 jaroj regnestro Sunzamkampo de Tubo (la nuna Tibeto), kiu unuigis la tibetajn tribojn, sendis Ludongzan al Chang’an (la tiama ĉefurbo de Tangdinastio), ke ĉi tiu svatu lin al filino de la imperiestro de la dinastio. Kiam Ludongzan venis al Chang’an, tie kolektiĝis svatantoj de 5 regnoj. Imperiestro Li Shimin (627-649 sur trono) de Tangdinastio faris 5 malfacilajn demandojn al la svatantoj por ekzameni ilian inteligentecon. Ludongzan superruzis la aliajn, kaj princino Wencheng vojaĝis al Tubo kaj edziniĝis al Sunzamkampo. Li do konstruis la palacon por enloĝigi la novedzinon. Tiu historio estis registrita en freskon de la palaco.

En la palaco estas freskoj kun totala areo de pli ol 50 000 kvadrataj metroj kaj pli ol 10 000 rulpentraĵoj, la plej valoraj en la trezorejo de la palaco. La pentraĵoj, faritaj de famaj pentristoj kaj eminentaj monaĥoj en la antikva Tibeto, temas pri historio, religio, mito, socia vivo, astronomio, tibeta medicino k.a.

La pentraĵoj en Potala-palaco montras la antikvajn tibetanojn en rajdado, ĉasado, terkulturado, amuzado kaj luktado. La pentraĵoj montras ankaŭ la konstruadon de la palaco: iuj tajlas ŝtonojn, aliaj

masonas murojn, triaj transportas konstruajn materialojn per ledflosoj. En la pentraĵoj oni povas vidi ankaŭ sunumadon de portretoj de budhoj en grandaj temploj kaj kultadon fare de miloj kaj miloj da piuloj. Krome, en Potala-palaco estas du portretoj de budho, la plej grandaj en Tibeto.

Potala sanskrite signifas “budhisman sanktejon”. En la 17-a jarcento Potala-palaco fariĝis loko, kie Dalai-lamao (la plej alta viva budho en Tibeto) regadis, predikis, vivis kaj entombiĝis. Tial ĉiuj trezoroj en Potala-palaco portas misteran budhisman koloron.

En la palaco estas 8 brilegaj oraj stupaoj, en kiuj konserviĝas mumioj de la 5-a kaj 7-13-aj Dalai-lamaoj. La plej impona el la stupaoj estas tiu de la 5-a Dalai-lamao. La 14.8-metre alta stupao estis tegita per 3 721 kg. da oro kaj inkrustita per pli ol 20 000 diamantoj kaj gemoj. La plej granda perlo estas pli dika ol dikfingro, kaj formiĝis en la cerbo de elefanto laŭdire. Krom la mumio de la 5-a Dalai-lamao, en la stupao estas ankaŭ relikvo de Ŝakjamunio kaj ledbotoj uzitaj de Sunzamkampo.

Ĉie en tiu budha mondo troviĝas budhostatuo farbitaj, jadaj, lignaj kaj argentaj. Plej admirindas la statuo de Avalokitesvaro kun afabla mieno. Ĝi estis nature formiĝinta el santalo kreskinta ĉe la limo inter Hindio kaj Nepalo. Sunzamkampo venigis ĝin el Nepalo. En la pasintaj 1 300 jaroj ĝi kviete aŭskultis la preĝadon, dum la homoj kultis ĝin kiel protektanton de la neĝa altebenaĵo.

En la palaco estas sennombraj libroj pri historio, biografio, templaj analoj, arkitekturo, medici-

da. La eksperimentejo organizis fakajn laborantojn de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, akvo-mastrumado kaj meteorologio en esplorado pri la meĥanismo de rapida kresko kaj alta produktokvanto de greno, arboj kaj paŝtherboj kaj akiris iujn

sukcesojn. La esploro vekis atenton de multaj fakuloj ĉinaj kaj alilandaj. Nun la eksperimentejo pli kaj pli multe kontaktiĝas kaj kunlaboras kun sciencistoj danlandaj, svedaj, aŭstraliaj, japanaj kaj usonaj kaj tiuj de internaciaj organizoj. ■



La liturgia ilo Mandala, farita el perloj, kun ora turo inkrustita per turkiso

no, literaturo, astronomio, kalendaro k.a. El la klasikaj budhismaj sutroj la plej valoraj estas pli ol 100 ruloj da sutroj skribitaj sur folioj de *patra*-arbo. La plej malnovaj el ili estis skribitaj antaŭ miloj da jaroj, sed la skribaĵoj restas ankoraŭ klaraj kaj la pentraĵoj freŝkoloraj.

La manuskriptoj de Dangur-sutro estis valoraj pro siaj multekostaj materialoj, ekzemple oraj sutroj, arĝentaj sutroj kaj oraj-argentaj reliefaĵoj. La plej valora estas la sepkolora Dangur-sutro. Ĝi estis skribita de majstraj kaligrafoj per pulvorigitaj oro, perlo, koralo k.a. La sep koloroj ĉiam estas freŝaj.

En 1653 imperiestro Shunzhi de Qing-dinastio

oficiale instalis la 5-an Dalai-lamaon kaj la oraj aktoj kaj sigelilo fariĝis trezoro de Potala-palaco. En 1696 imperiestro Kangxi donacis al Dalai-lamao paron da kurtenoj el ora filigrano. Por fari la kurtenojn la imperiestro dekretis konstruadon de speciala teksejo. Oni forkonsumis 16 000 taelojn da arĝento kaj la teksado daŭris pli ol unu jaron.

En la palaco estas ankaŭ la liturgia ilo Mandala farita el 220 miloj da perloj kaj orumita bronza "altara urbo", la ideala lando por budhistoj. Antaŭ nelonge la registaro multe elspezis por ripari la palacon, kaj la palaco fariĝis pli impona kaj la trezoroj trovis bonan lokon por sin konservi. La palaco ĉiam fascinas la homojn per sia mistereco kaj imponeco. ■




Jada statuo de Basiba, eminenta bonzo de Sajia-sekto de budhismo en Tibeto



La orumita altaro Shilun



Orumita militisto-servisto de Budho



Bivo de Tang-dinastio (618-907), kiun kunportis laŭdire princino Wencheng, filino de Tang-dinastia imperiestro, kiam ŝi venis al Tibeto por edziniĝi al la tiea regnestro.

LIU CHONGQING:

# Nova azi-eŭropa kontinenta ponto

**E**N la fino de 1994 fervojaj aŭ trafikaj ministroj de Ĉinio, Rusio kaj aliaj 5 landoj de Mez-Azio kunvenis en Pekino, por interkonsiliĝi pri utiligo de internacia fervoja trafikado tra la pasejo Alataw en Xinjiang de Ĉinio. La temo de la kunveno estis “pliintensigi kunlaboron, glatigi la kontinentan ponton, kune disvolviĝi kaj firmigi la amikecon”.

La nova azi-eŭropa kontinenta ponto estas la dua en sia speco, kiu interligas Azion kun Eŭropo kaj Pacifikon kun Atlantiko. Kun havenurbo Lianyungang de Ĉinio kiel pontokapo, la fervojo trairas Ĉinion, Kazahstanon, Rusion, Belorusion, Pollandon kaj Germanion kaj fine atingas la havenurbon Roterdamon de Nederlando ĉe Atlantiko. La fervojo longas entute 10 837 km kaj en Ĉinio ĝi estas longa 4 143 km.

Tiu kontinenta ponto havigis plian facilan irejon por la aziaj kaj sud-pacifikaj landoj en ilia kontaktiĝo kun eŭropaj landoj. Ĝi estas je 700 km. malpli longa ol la unua kontinenta ponto, kiu

ekiras de Vladivostoko de Rusio, trairas Siberion kaj finiĝas en Roterdamo. Ĝi estas je 7 000 km. malpli longa ol la akva vojo trairanta la Hindian Oceanon kaj Suezan Kanalon, dum la bezonata tempo de la trafikado duoniĝas kaj la kosto malaltiĝas je 20-25%. Tiu ĉi nova fervojo situas en regiono kun modera klimato kaj favoraj naturaj kondiĉoj, kaj la havenoj de Ĉinio estas neglaciigantaj, kio garantias tutjaran funkciadon de la havenoj. Ĉio tio havas fortan altiron al Japanio, Koreio kaj landoj de Sud-orienta Azio. La nova azi-eŭropa kontinenta ponto pliraciigas la materialan cirkuladon inter Azio kaj Eŭropo kaj havas tre gravan signifon por disvolviĝo de la ekonomio kaj komercado de pli ol 30 landoj en la regionoj, kiujn trairas la fervojo.

La konstruiĝo de la nova azi-eŭropa kontinenta ponto kreis ege favorajn kondiĉojn por Ĉinio en la ekonomia pordmalfermo kaj ĝia partopreno en la internacia cirkulado. La 9-an de decembro de 1990 ĉina fervojo kaj kazahstana fervojo interligiĝis ĉe la

montpasejo Alataw. Tio markis kompletan malfermiĝon de la nova azi-eŭropa kontinenta ponto, malfermis la okcidentan pordon de Ĉinio, ke centra kaj okcidenta Ĉinio en la mezo de la azi-eŭropa kontinento fariĝis fronto de ekonomia pordmalfermo al la eksterlando, kaj ke la sfero de ekonomia-komerca kunlaboro kaj interŝanĝo povas disvastiĝi al multaj lokoj de Eŭropo pere de Kazahstano, Rusio kaj aliaj membroj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj. Enlande la fervojo trairas kvar provincojn Jiangsu, Henan, Shaanxi, Gansu kaj la aŭtonoman regionon Xinjiang, stimulas disvolviĝon de la lokoj ambaŭflanke de la fervojo kaj pretigis oportunecon de trafiko por eniro en internacian merkaton. La aliaj lokoj de Ĉinio povas sin ligi al la kontinenta ponto pere de aliaj fervojoj. Tiamaniere preskaŭ 4/5 de la ĉina tero povas eniri en la “altiran regionon” de la ponto. La vastaj regionoj de norda, orienta, suda kaj sudorienta Ĉinio povas importi ĉe la oriento kaj eksporti ĉe la okcidento, kio povos vigligi la en- kaj eksterlandan komercadon. Por plene utiligi la novan azi-eŭropan kontinentan ponton cele disvolvi internacian kontenerizitan transportadon, la Fervoja Ministerio de Ĉinio planis ĉiutagan ekspedon de unu kontenera ekspreso de Lianyungang al Alataw kaj ĉe la landlimo la konteneroj povos esti transportataj rekte al la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj aliaj eŭropaj landoj. Kun kresko de transportataj varoj, oni multigos ekspedon de vagonaroj.

Por sin konformigi al la bezono de la internacia interligita transportado, Ĉinio plie intensigos konstruadon de la havenoj kaj konteneraj doko, rekonstrui kaj pligrandigi la fundamentajn instalaĵojn de fervojaj staplejoj, plibonigi la servadon. Tio certe levos la fervojan modernigon de Ĉinio al nova nivelo. ■

Britaj pasaĝeroj, kiuj veturis per la unua ekspreso “Oriento”, paŭzis en la stacio Alataw junio de 1992.





### VEGETARA DIETO PREVENTAS KANCERON

Post pli-ol-centjara klinika praktiko sciencistoj de diversaj landoj konstatis, ke krom geno-genetika faktoro, ankaŭ nekonvena prenado de manĝaĵoj kaŭzas kanceron. Specialistoj certigis, ke multaj vegetalaj manĝaĵoj, kiaj fruktoj, legomoj, grenoj, herbo-drogoj kaj aromaĵoj, entenas naturan kontraŭkanceran substancon. Lastatempe medicinistoj rimarkis, ke vegetara dieto povas redukti mortokvanton de kanceruloj. Ju pli multe da fruktoj kaj legomoj estas manĝitaj, des pli malgranda estas la mortokvanto de suferantoj de kanceraj pulmo, mam-glanda, prostata kaj kojla.

Sciencistoj rimarkis, ke ankaŭ verda teo kaj glicirizo estas kontraŭkanceraj. Verda teo entenas antioksidajn substancojn, kia polihidra fenolo, kaj tiuj ĉi komponaĵoj povas reguligi metabolan enzimon de kancerogena substanco kaj regi ŝlosilan reakcion kaj ĉeloneoplazion. Glicirizo estas tradicia ĉina medikamento tre vaste uzata, ĉar ĝi entenas komponaĵojn de terpeno kaj flavono kaj pli efikas ol ajlo en malhelpo kaj regado de kancerogena procezo.

Lastatempe specialistoj de iu japana kancerologia instituto elektis el pli ol cent specoj da legomoj tiujn evidente kancerorezistantajn, kiaj batato, flor-brasiko, ajlo, ŝenoprazo, karoto, brasiko, dolĉa kapsiko, momordiko, kukumo, melongen-ŝelo kaj asparago.

### REPRODUKTAĴO DE SILKO-RARAĴO

Post kvarjara penado la Suzhou-a Silka Muzeo kaj la Muzeo de Ĉina Historio sukcesis en esplorado pri reproduktado de kvar silkaĵoj de Tang-dinastio (618-907). Tio estas la unua fojo en Ĉinio.

Tang-dinastio estis la plej prospera periodo de la disvolviĝo de silkoj kaj ties teknologio en la ĉina historio. Dank' al la kultura interŝanĝo inter Oriento kaj Okcidento, la vejno-formo de la teksaĵo estis farita en sintezo de la kulturo de Ĉinio kaj tiu de centra Azio, kun stilo originala. Sed la elterigitaj silkaĵoj de Tang-dinastio plejparte estas nekompletaj kaj kolore malklaraj, tial nepre

necesis esplori kaj urĝe savi ilin. La kvar silko-raraĵoj, elektitaj de la Suzhou-a Silka Muzeo kaj la Muzeo de Ĉina Historio, estas unuaklasaj historiaj objektoj protektataj de la ŝtato. La esplorado pri reproduktado komenciĝis en oktobro de 1990.

Esplorantoj konigis, ke estas ege malfacila la reproduktado, ĉar la kvar silko-raraĵoj jam dispeciĝis kaj perdis sian koloron kaj brilecon, kaj plie, neniu dokumento notas pri ili. Post ripetfoja eksperimentado oni akiris ĉiujn donitaĵojn pri praktika kontrolado. La strukturo, vejno-formo, koloro kaj kompaktecio jam atingis la normojn bezonatajn por reprodukti ilin en formo mirinde simila al tiu de la originalo. La sukceso helpas bone koni la antikvan silkan historion pri tekstilaj teknikoj kaj tinkturado de silkaĵoj de Tang-dinastio.

### ARGILA LUDILO

Argila ludilo estas unu el la popolaj metiartaĵoj de Ĉinio. Ĝi estas delikate farita kaj havas longan historion.

En Shandong-provinco estas la vilaĝo Xiaoguo, kie preskaŭ ĉiuj familioj povas progrande produkti argilajn ludilojn, versimilajn kaj diversformajn. Kolorigado estas la plej grava en farado. Oni ŝmiras sur la surfaco de argila modelo blankan pulvoron kiel fonon, kaj poste, laŭ la bezono, kolorilojn puncan, karminan, smeraldoverdan, flavan kaj purpuran, kaj fine per ĉina inko reliefigas ĝin. La metiartaĵo, belkolora, anime viveca, donas ardan senton kaj plene spegulas la karakterojn de la ĉina koloriga arto. Funde kaj dorse de la plejparto de la argilaj ludiloj vidiĝas argilo, kvazaŭ senzorge lasita, sed fakte intence vidigita, ĉar kiel miksaĵo de ruĝo kaj verdo, la okra koloro de argilo evidentiĝas primitivan simplecon, kaj cetere, donas ornamantan efikon kaj elstarigas la naturan karakteron de argila ludilo. Ĝenerale, la fundo aŭ dorso de argila ludilo estas garnita per fragmita fajfilo, kiu eligas agrablan sonon tuj ĉe malforta ekblovo.

La argilaj ludiloj temas pri teatra rakonto, belulinoj kaj bestoj. Ĉiuj argilaj ludiloj, ĉu homfiguraj, ĉu bestoformaj, elspiras idilian etoson.




Brokato kun de-  
segno de filigrana  
drako

Brokato kun fiŝoj sur blua fono



Brokato kun desegno de fenikso



# Brokatoj de Nankino

Fotoj de LI CHUNGENG

Brokato estas silka teksaĵo kun plej alta teknologio de Ĉinio. Ĝi havas belegajn desegnojn kaj kolorojn. Nankino komencis teksadon de brokato antaŭ mil jaroj. Unu el la elstaraj karakterizaĵoj de la nankina brokato estas, ke la desegnoj de la brokato estas faritaj el oraj fadenoj. Tial imperiestroj kaj iliaj edzinoj tre ŝatis la brokaton, kaj la brokato fariĝis tributo al la imperiestraj familioj. En tombo de imperiestro de Ming-dinastio (1368-1644) oni trovis imperiestran robon el tia brokato. La delikateco de ĝia ŝtofo vekis admiron.

Brokato havas multajn specojn, kaj la koloroj superis 30 nuancojn. Brokato produktata en Nankino per tradicia tekniko estas brila, la desegnoj temas pri variemaj nuboj, interesaj animaloj kaj aŭspiciaj drako kaj fenikso. Brokato estas valora materialo por fari ne nur vestojn, sed ankaŭ luksajn ornamaĵojn.



Teksado per tradicia tekniko



Desegnistoj en projektado

**E**N 1994 la ĉina registaro publikigis la politikon de aŭta industrio kaj difinis, ke dum certa tempo en la estonteco la aŭta industrio de Ĉinio disvolviĝos kun personaŭta industrio kiel la gravita punkto kaj aĉeto de persona aŭto far ĉinoj estos instigata. La politiko vekis grandan eĥon ĉe la ĉinaj aŭtaj entreprenoj kaj la temo, ke familio posedu aŭton, estis varme preparolata de ordinaraj ĉinoj. Al tio plej rapide reagis internacie aŭtaj fabrikantoj, inkl. de mondfamaj aŭtaj entreprenoj.

En la Ekspozicio de Personaŭtoj kaj Simpozio pri Strategio kaj Teknika Interŝanĝo de la Disvolviĝo de Personaŭta Industrio en la Nunaj Mondo kaj Ĉinio, okazintaj en Pekino en 1994, 19 mondfamaj aŭtaj kompanioj eksponis pli ol 80 personaŭtojn, inkl. de tiuj porfamiliaj personaŭtoj projektitaj speciale por la ĉina merkato. 1994 estis jaro, en kiu la Maŝinindustria Ministerio de Ĉinio akceptis plej multe da alilandaj delegacioj pri aŭtoj.

La disvolviĝo de la ĉina personaŭta industrio estas multe atentata de aŭtaj fabrikantoj en la mondo. Kia do estos la perspektivo de ĝia merkato?

La ĉina registaro ĉiam alte taksas la disvolviĝon de aŭta industrio kaj prenas ĝin kiel unu el la kvar ĉefaj industrioj de la nacia ekonomio. Dekojn da jaroj poste, precipe 15 jarojn post ekpraktikado de la reformado kaj pordomalfermo, la jara produktokvanto de aŭtoj de Ĉinio kreskis proksimume al 1.3 milionoj. Post kiam finkonstruiĝis la Unua Fabriko de Aŭtoj en 1953, la aŭta industrio de Ĉinio rapide disvolviĝis kaj nun en ĝi estas ok produktoj de personaŭtoj kaj aŭtoproduktaj bazoj, kiaj manufakturo de ŝarĝaŭtoj kaj fabrikoj de aŭtoj en Changchun, Shiyuan, Nankino, Pekino, Tianjin, Ŝanhajo kaj Shenyang. En la pasinteco estis produktataj ekskluzive kamionoj de meza tunaro kaj nun produktiĝas ĉefe mezgrandaj kamionoj. Krome, produktiĝas ankaŭ ŝarĝaj, leĝeraj kaj malgrandaj kamionoj kaj pasaĝer-aŭtoj. La procento de personaŭtoj rapide kreskas. Kaj la teknika nivelo de iuj aŭtoj jam atingis la internacian nivelon de la 80-aj jaroj.

Kadre de la tuta mondo, la posedo- kaj produktokvantoj de personaŭtoj estas multe pli grandaj ol

## EKONOMIE

# Perspektivo de la personaŭta industrio de Ĉinio

de REN XIAOQIANG

tiuj de alitipaj aŭtoj en konsisto de la aŭta industrio. Produktado de personaŭtoj estas ŝlosilo por disvolviĝo de aŭta industrio. La faktoj de evoluantaj kaj evoluantaj landoj pruvis, ke kiam la nacia ekonomio kaj la popola vivo disvolviĝos ĝis certa grado, la kvanto de privataj personaŭtoj kreskos multe pli rapide ol tiu de oficaj aŭtoj. La kresko forte akcelos la disvolviĝon de la personaŭta industrio. Nun en Ĉinio personaŭtoj estas uzataj ĉefe kiel oficaj aŭtoj aŭ taksioj, tamen malmultaj


riĉaj familioj jam posedas privatajn personaŭtojn. Laŭ statistiko, en 1993 en Ĉinio estis 1.56 milionoj da privataj aŭtoj, inkl. de 600 000 personaŭtoj k.a. Laŭ antaŭkalkulo, en 2000 la nombro de personaŭtoj estos 6 milionoj kaj la bezonata nombro en la jaro 1-1.4 milionoj. En 2010 la nombro de personaŭtoj atingos 20 milionojn kaj la bezonata nombro en la jaro estos 3.5-4 milionoj. Kompreneble, la pokapa kvanto de personaŭtoj estos multe malpli granda ol tiu en la mondo. Jen kial la grandaj kompanioj de aŭtoj en la mondo turnas sian atenton sur la personaŭtan merkaton de Ĉinio.

En sia cirkulero pri publikigo de la "politiko de aŭta industrio" la ĉina registaro postulis, ke antaŭ 2000 la aŭta industrio de Ĉinio havu firman bazon, la totala produktokvanto de aŭtoj kovru la bezonon de la enlanda merkato je pli ol 90%, la produktokvanto de personaŭtoj konsistigu pli ol duonon de la totala produktokvanto de aŭtoj kaj fundamente kovru la bezonon de familioj. La ĉefaj rimedoj alprenendaj nuntempe estas, unue, pluaŭpaŝe plivastigi la internacian kunlaboron, kuraĝigi aŭtajn entreprenojn apliki alilandajn kapitalon kaj teknikon kaj plifortigi la kunlaboron kun alilandaj entreprenoj en produktado de aŭtaj pecoj kaj ekspluatado de produktaĵoj uzablaj en Ĉinio; due, reguligi la strukturon, nome, reguligi la industriajn dispozicion kaj konsiston de la produktaĵoj, cele ŝanĝi la malordecon de la aŭta industrio de Ĉinio kaj formi skalan ekonomion; trie, perfektigi la kondiĉojn de merkato, ekspluati kaj flegi vendomerkaton de aŭtoj; kaj kvare, akceli la disvolviĝon de la industrioj metalurgia, petrol-kemia, trafika kaj maŝinfabriko por formi kompletigitan industri-an sistemon.

Por disvolvi personaŭtan industrion treege gravas elekti la tipon konvenan al privata personaŭto. Ĉinaj kaj alilandaj fakuloj opinias, ke por Ĉinio la privata personaŭto devas esti plurfunkcia, kun

ZHANG QING kaj LI LI:

## Kemi-industria urbo sur alkala marĉo



La instalaĵo por produkti jonmembranon  
natron en la Cangzhou-a Kemi-industria  
Fabriko

**L**A urboj Qinhuangdao, Tangshan kaj Cangzhou situas de norde suden ĉe Bohai-marĉo.

De la 7-a jc. Cangzhou famas en Ĉinio pro sia plej granda profito el salfarado kaj fiŝkaptado. La Sal-transporta Departemento, administracio de "Changlu-salo", kiu ĝuis bonan reputacion en- kaj eksterlande, estis translokita de la urbo al Tianjin en la mezo de la 17-a jc.

La vasta maro alportis profiton el salfarado kaj fiŝkaptado kaj samtempe dezertigis la tieajn kampojn. Pro tio la loko estis ankaŭ ekzilejo en la antikveco.

La hodiaŭa Cangzhou ne estas dezerta. Kun la pliboniĝo de akvoenergia riĉfonto, ne estas plu alkala tero. Kaj la antikva Cangzhou fariĝis nova kemi-industria urbo.

Salfarado estas tradicia industrio de Cangzhou. Tie etendiĝas vasta aluvia ebenaĵo el subargila grundo. Ĝi tre taŭgas por konstrui salejon. Nun laŭ la 95-km-longa marbordo de la urbo estas 56 salejoj grandaj kaj mezgrandaj, kun totala areo de 210 000 hektaroj kaj jara produktokvanto de 1.5 milionoj da tunoj da kruda salo. Inter la salejoj la plej granda Changlu-salejo kun plej avangardaj ekipaĵoj produktas bonkvalitan krudan salon, kiu entenas pli ol 97% da natria klorido. La produktaĵoj estis honoritaj de la ĉina Malpez-industria Ministerio kiel bonkvalita produktaĵo en sinsekvaj jaroj. La salejo estas uzata kiel ŝtata kemi-industria eksperimentejo.

Pro granda produktokvanto de kruda salo kaj vasta akvoareo la regiono liveris halogenajn riĉfontojn al la disvolviĝo de sala kemi-industrio, bioinĝenierio kaj akvoproduktado. La kemi-industriaj fabrikoj de salo, funkciigataj de Cangzhou, produktas ĉefe kalian kloridon vaste uzatan en kemia industrio; brominon uzatan por produkti eksplodimunan, brulimunan kaj fajro-estingan materialojn kaj prepari medikamentojn; magnezian kloridon uzatan por produkti asbes-

tajn kaj vitrajn tegolojn; kaj senakvan natrian sulfaton uzatan por produkti medikamentojn kaj lesivon. Iuj produktaĵoj eksportiĝas al Japanio, Sudorienta Azio, Hongkong kaj Aomen. Proksime de la urbo estas Dagang-olekampo kaj la Nordĉinia Olekampo, kiuj favoras la disvolviĝon de la petrol-kemia industrio de Cangzhou.

La Cangzhou-a Kemi-industria Fabriko, la unua tiuspeca entrepreno de Cangzhou, konstruiĝis en 1979. Ĝi estas grava bazo de kloro kaj natra industrioj kaj fajnaj kemi-industriaj produktaĵoj de Hebei-provinco kaj la unika entrepreno de Ĉinio, kiu havas internacie avangardan instalaĵon por produkti jonmembranon natron. Ĉiujare ĝi produktas 60 000 tunojn da natro, inkl. de 20 000 tunoj da jonmembrana natro. En 1993 la vendovaloro de la fabriko estis 310 milionoj da juanoj. En la lastaj jaroj la fabriko faris reformadon. Ĝi pligrandigis memdecidan rajton de entreprenado, ekpraktikis respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado kaj fondis la Kemi-industrian Limigitan Kompanion de Cangzhou. Rezulte de tio, perfektigis la administra mekanismo interne de la entrepreno, ke ĝi fariĝis pli forta en konkurenco de la merkata ekonomio. Oni taksis, ke en 2000 la jara vendovaloro de la entrepreno atingos 1.5 miliardojn da juanoj.

Krom la Cangzhou-a Kemi-industria Fabriko, en la urbo funkcias ankaŭ pli ol 40 grandaj entreprenoj, inkl. de la Cangzhou-a Kemisterka Fabriko kun jara produktokvanto de 236 000 tunoj da sinteza amoniako kaj 379 000 tunoj da ureo, la Cangzhou-a Kemi-industria Fabriko de Insekticido, la Cangzhou-a Kemi-industria Tinkturejo kaj la Cangzhou-a Rafinejo de Petrolo, kiu jam enviĝas inter la 500 grandaj entreprenoj de Ĉinio. Ekde

*(Daŭrigo sur p. 55)*

malgranda ĉevalpovo, malmulta kosto, malmulta polucio, solida sekureco kaj ŝparo de fuelo.

La aŭta industrio de Ĉinio prezentas vastan perspektivon. Eksploatado de la merkato de personaŭtoj estas ŝanco kaj ankaŭ defio al la aŭta industrio de Ĉinio kaj alportis esperon al la ĉinaj

kaj alilandaj entreprenoj de aŭtoj. La fama germana kompanio Mercedes-Benz, kiu produktas altklasajn personaŭtojn, investis grandan monsumon kaj projektis la personaŭtan sistemon FCC konvenan al Ĉinio. El tio videblas intensa konkurenco en la merkato. ■

# Sub la standardo de “Junaj Volontuloj”

**N**UN Ĉinio liberigas sin el la kateno de la malnova ekonomia sistemo kaj samtempe estas atakata de la tajdo de la komerca ekonomio. Pro tio iuj legantoj kun scivolemo demandis nin: Kiaj estas la interhomaj rilatoj en la hodiaŭa Ĉinio? Kiom da sincereco kaj amo restas inter la homoj?

La demandoj estas faritaj nenekauze. Tamen oni povas respondi resume: Sincereco kaj amo daŭre regas en la socio, kvankam ekzistas mamonistoj. Se oni legas ĉinajn ĵurnalojn kaj gazetojn, ili povas informiĝi pri multaj kortuŝaj aferoj okazintaj sur la vasta teritorio de Ĉinio. Ĉie estas justamaj volontuloj kaj helpemuloj. Junaj homoj heredas la eminentan tradicion de nia nacio kaj disvolvas ĝin. Ili per siaj praktikoj realigas sian promeson: Tutanime servi al la popolo dum sia vivo. En la lastaj jaroj aperis multaj junaj volontuloj, kiuj sin dediĉas al la publikaj interesoj de la socio kaj prenas amikecon, reciprokan helpon kaj progreson kiel normon de sia agado. Ĉie videblas iliaj figuroj.

En novembro de 1993, pormagistraj esplorantoj-studentoj de la Pekina Universitato fondis “Societo de Amo”. Ili helpas aliajn per malgrandaj aferoj tuj fareblaj. Poste en 30 altlernejoj de Ĉinio sinsekve fondiĝis la samtitola societo kaj en aliaj 50 altlernejoj oni preparis sin por starigi similan societon. En decembro de 1993, gejunuloj de la Fervoja Ministerio de Ĉinio la unuaj levis la standardon de “Junaj Volontuloj”. Dum

la Printempa Festo de 1994, miliono da studentoj-volontuloj servis en stacidomoj por la festa transportado kaj partoprenis en kvartalaj bonstatigaj aferoj. Ekde tiam disvolviĝas tra la tuta Ĉinio la agado de “junaj volontuloj” por publika bono, medio-protektado, urĝa savo kontraŭ danĝero, helpo al homoj en la plagitaj lokoj, gardo de publika sekureco kaj defendo de la rajtoj kaj interesoj de gejunuloj.

Februare de 1994, en Pekino oni organizis grupojn de junaj volontuloj kun kuracistoj kaj mezaĝaj kaj junaj sciencistoj kaj teknikistoj kiel ĉefa konsistiga parto por doni al maljunaj sciencistoj, edukistoj kaj kadroj longedaŭran servon de sanprotektado, kuracado kaj ordigo de dokumentoj.

En marto, pli ol dek milionoj da junaj volontuloj de la tuta Ĉinio, kunportante la saman insignon, aktivadis en dek miloj da hejmoj kaj konstruejoj kaj tie faris diversmanierajn servojn. En julio, dek miloj da volontulaj taĉmentoj de studentoj kaj mezlernejanoj partoprenis en sociaj praktikaj aktivadoj dum la someraj ferioj. Septembre 30 000 junaj volontuloj viglis en la Sesa Malproksim-Orienta kaj Sud-Pacifika Sportkunveno de Kripluloj. En blanka ĉemizo senkoluma kaj ruĝa volontula emblemo surbruste, ili senlace laboris en la flughaveno, stacidomoj kaj konkursejoj. Ili aŭ puŝis rulseĝojn aŭ kondukis blindulajn sportistojn al la giĉetoj por plenumi diversajn formalajojn kaj fari korpan ekzamenon. Ili estis vaste laŭdataj de la diverslandaj gesportistoj pro

entuziasmo, gastamo kaj servemo.

Kiam en la socio iuj “konsideras nur sian propran vivon, sen zorgi pri alies doloro kaj malfacilo” kaj iuj eĉ ne hezitas profiti je alies damaĝo, la junaj volontuloj per sia agado praktikas la dogmon: La vivo devas esti ne nur komforta, sed ankaŭ signifoplena. Partoprenante en la sociaj aferoj, gejunuloj ne nur plenumas sian socian devon, sed ankaŭ hardas sin kaj altigas siajn kapablojn. Tial ili tute memkonscie kaj memvole kolektiĝis sub la standardo de volontuloj kaj kondukis diversajn aktivadojn, sin direktante al la vasta socio. Krom la supre menciitaj volontulaj servoj, la alia grava enhavo estas helpi milionojn da homoj en la malriĉaj regionoj de

Junaj volontuloj purigas trolebuson.





Mezlernejoj prizorgas kriplajn infanojn.

Ĉinio, kiuj ankoraŭ ne solvis la problemon de manĝo kaj vesto.

En la provinco Shanxi, la "Taĉmentoj por Elimini Analfabetecoj" konsistantaj el volontuloj trovis varman bonvenon. Oni instruis al vilaĝanoj ideogramojn kaj disvastigis sciencajn kaj teknikajn sciojn. Ĉe la foriro la vilaĝanoj junaj kaj maljunaj forte premis la manojn de la volontuloj, ne volante ilin forlasi. Ili donacis al ĉiuj volontuloj sakon plenan de juglanda nukso, jujubo kaj arakido.

Tra la tuta Ĉinio troviĝas 15 000 similaj taĉmentoj. Ili profundigis en malriĉajn vilaĝojn kaj montregionojn, popularigas sciojn pri la merkata ekonomio, plivastigas novajn teknikojn, donas kuracajn servojn kaj instruas kulturajn sciojn. 200 000 plenkreskuloj kaj lernoĝaj infanoj estis klerigitaj je legado kaj kalkulado. Iu taĉmento de la provinco Shanxi eĉ konstruigis elementan lernejon per sia mondonaco kaj pretas daŭre servi al la lernejo por 5 jaroj. Por altigi la nivelon de la lokaj instruistoj, tiu taĉmento starigis por la lernejo kompletan normalan sistemon de instruado kaj administrado kaj trejnigis la instruistojn donante lekciojn pri la ĉina lingvo, matematiko kaj muziko.

La volontuloj de la provincoj Shandong, Henan kaj aliaj lokoj metis sian gravitan punkton de siaj servoj en ŝtatajn kaj vilaĝajn entreprenojn kaj agrikulturajn produktadon. La Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj la provinco Fujian estis atakitaj de serioza inundo, kaj la tieaj volontuloj sin ĵetis en la batalon kontraŭ la inundo kaj multe helpis la tieajn popolanojn restarigi la produktadon kaj rekonstrui la hejmlokon. En la inunditaj lokoj la volontulaj kuracistoj estis ofte dense ĉirkaŭitaj de malsanuloj kaj laboris de mateno ĝis nokto.

La helpo de la junaj volontuloj al maljunaj gevidvoj, handicapuloj kaj aliaj personoj kun apartaj malfaciloj sentigis al la lastaj la varman zorgon de gefiloj kaj familianoj.

En la urbo Tangshan junaj volontuloj donas longdaŭran servon al la orfoj kaj handicapuloj, kiuj fariĝis malfeliĉuloj en la forta tertremo okazinta antaŭ 18 jaroj. Volontuloj kuracas ilin hejme, alportas al ili vivbezonaĵojn kaj faras por ili hejmajn laborojn. Ili per sciencaj kaj teknikaj scioj helpas bonstatigajn fabrikojn de handicapuloj, kiuj suferas de serioza deficiito, nebona administrado kaj malalta profito, plibonigas ilian

produktan strukturon por ekspluati novajn produktojn kaj levi la vivnivelon de la fabrikanoj.

En la domo de instruistino Hu Manli pendas foto de "la tuta familio": ŝi kun bebo en la sino sidas apud la edzo, kaj ĉirkaŭ ili estas 15 ridetantaj infanoj kun malsamaj aĝoj. En 5 jaroj ŝi adoptis 20 orfojn. Por la sana kresko de tiuj infanoj ŝi venkis ĉiujn malfacilojn. En decembro de 1993, helpe de aliaj junaj volontuloj, ŝi starigis "Verda Infana Vilaĝo". Pro tio ŝi ricevis subtenon de ankoraŭ pli multaj volontuloj.

Iu viro eĉ ne songis, ke lia 7-jara filo, kiu ne povis viziti lernejon pro handikepeco, finfine sukcesis esti klerigita. Tion li ŝuldas al la agado de junaj volontuloj "ĉiu helpu unu handicapulon". Tiuj varmkoraj junuloj prenas lian hejmon kiel klasĉambron kaj alterne donas al lia filo lecionojn. Tio ebligis al la infanoj, kiuj havas malfacilon en piedirado, esti klerigitaj kiel la samaĝuloj.

En 1994, en la daŭro de unu semajno kelkcent urbanoj de la antikva urbo Nankino sin anoncis ĉe la giĉeto de volontuloj. Inter ili estis laboristoj, kadroj de registaraj instancoj, instruistoj kaj lernantoj. En Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj lokoj, multaj aliĝis al la volontula vicaro.

Juna patrino venis kun sia 4-jara filo al la "Protekta Centro de la Rajtoj de Malfortuloj" funkciigata de la volontuloj de la Wuhan-a Universitato. La knabo, amputita je la supraj membroj, ne povas zorgi pri sia vivo. Li nomiĝas Xiao Xionggang. Foje dum ludado li hazarde eniris en la elektroprovizan domon tute senpordan de la vilaĝo kaj estis elektre ŝokita. Pro tio ili akuzis la vilaĝan administrantaron. Post enketado la nomita centro akceptis la komision de la akuzanto. Du profesiaj advokatoj faris ĉelokan enketadon kaj fine donis fortan racian paroladon en la juĝejo kaj havigis al la akuzanto kompencon de 33 000

## Por varmigi ilian koron

**M**IAJ geavoj diligente prizorgis farmejon dum la tuta vivo. Ili bredis bovojn, kokojn kaj porkojn kaj kultivis diversajn legomojn. Ili kun ĝojo vivis el tio. Eĉ en la jaroj de malprospero ilia vivo restis senŝanĝa. Sed en tiu tempo multaj homoj perdis sian laboron en urboj kaj fariĝis vagabondoj, kaj iuj eĉ migris en ilian farmejon malproksiman de urbo.

Mia avo memoris, ke la unua gasto de la farmejo estis

ĉifonulo kun ĝentila konduto. Li, demetinte sian ĉapelon, riverencis antaŭ mia avo kaj diris, ke li nenion manĝis jam tri tagojn kaj volas tie labori. La avo pririgardis lin kaj diris: “Bone, estas amaso da brulligno ĉe la muro de la korto. Transportu ĝin al alia flanko de la korto. Mi pensas, ke vi povos tion fari.” Li etendis sian grandan kalan manon kaj forte premis tiun de la viro.

Mia avino rememoris, ke en tiu momento la okuloj de la viro tuj ekbrilis kaj li hastis al la korto por labori. Kaj ŝi al-



donis seĝon ĉe la manĝotablo kaj bakis plian pomtorton. Dum la tagmanĝo la fremdulo parolis tre malmulte. Kiam li estis forironta, lia talio fariĝis multe pli rekta ol antaŭe. “Nenio estas pli dolora ol perdo de memrespekto,” diris la avo al mi poste.

Kelkajn tagojn post la foriro de la viro venis al la farmejo alia gasto en kostumo kaj kun malnova valizo, kiu petis de la avo manĝaĵon. Tiam la avo estis falĉanta herbojn. Li viŝis siajn manojn kaj manpremis kun la fremdulo: “Estas amaso da brulligno ĉe la muro de la korto. Mi volas, ke vi helpu min transporti ĝin en alian flankon de la korto. Kaj estos granda ĝojo por mia tuta familio tagmanĝi kune kun vi.” Demetinte sian kostumon, la fremdulo tuj eklaboris...

Mia avino diris, ke ŝi jam ne povas memori, kiom da fremduloj tiam vizitis ilian farmejon kaj manĝis kune kun ili, kaj des pli ne povas memori, kiom da fojoj estis transportita tiu amaso da brulligno en la korto. Tamen miaj geavoj bone scias, ke en tiuj tagoj tiu amaso da brulligno povis varmigi la koron de homoj kaj alportis al ili esperon. ■

juanoj.

La nomita centro oficiale ekfunkciis en majo de 1993. Ĝi konsistas el 12 mezaĝaj kaj junaj profesoroj kaj vicprofesoroj kaj 10 junaj instruistoj, advokatoj kaj studentoj de la Juroscienca Instituto sub la Wuhan-a Universitato. Plej eminentaj advokatoj de la centro senpage donas jurajn konsilojn kaj peras proceson de la homoj kiuj pleje bezonas helpon. La centro senpage servas ankaŭ al virinoj, neplenkreskuloj kaj handi-

kapuloj de la tuta Ĉinio. La volontuloj de la centro jam akceptis 250 homfojojn, ricevis pli ol 1 600 leterojn el diversaj lokoj de la lando, oficiale traktis 50 kazojn kaj jam sukcesis en 40 kazoj. Tiuj junaj intelektuloj per sia saĝo kaj peniga laboro konigis al pli multaj malfortuloj la justecon kaj seriozecon de la leĝoj.

Kompare kun la antaŭa agado “fari bonaĵojn”, la agado de la junaj volontuloj karakteriziĝas per memedukado, emfazo de memvo-

la partopreno, konstanteco kaj praktikemo, tial la agado estas tre ŝatata de nuntempaj gejunuloj. Per la memstara kaj memvola partopreno en la volontulaj servoj al la socio la vasta amaso de gejunuloj ankaŭ vidis sian propran valoron kaj hardis sin mem.

Je la 5-a de decembro, 1994 oficiale fondiĝis la Asocio de Ĉinaj Junaj Volontuloj. Tio markas, ke la agado de junaj volontuloj de Ĉinio fariĝos pli konstanta, regula kaj grandskala. ■



# Muzikludo sur la vangoj



S-ro Cui Wenping ludanta muzikon sur la vangoj

**J**E frapetado per fingroj sur liaj vangoj oni aŭdis tre konatan gajan muzikon “Hispana Taŭristo”. La sono similas al tiu de ksilofono, sed iom pli milda.

“Se mi ne vidus propraokule, mi ne kredus, ke oni povas ludi muzikon sur la vangoj,” mi diris.

“Ne nur sur la vangoj, rigardu!” Tion dirinte, la junulo ekludis sur dentoj, mentono, glabelo kaj frunto, kaj belaj melodioj “Marŝo de Radetzky”, “Uverturo de Carmen”, muzikopeco “Gajaj Soldatinoj” el ĉina baletto kaj “Polko de Bierbarelo” eksonis ĉe niaj oreloj.

“Kio estas la principo de muzikludo sur la vangoj?”

“Kiel vi eltrovis tion?”

“Kiom longe vi ekzercis vin en tio?”

...

Oni bombardis lin per demandoj. Li nomiĝas Cui Wenping kaj laboras kiel elektristo en nia oficeja domo.

S-ro Cui respondis al ni: “Simple dirite, uzante la pasivan prononcmetodon, mi ludas muzikon sur la vangoj je la plej bonaj resonancpunktoj de la buŝo kaj nazkavo.”

Dimanĉe antaŭ 15 jaroj, por partopreni konkurson de buŝharmoniko-ludo, li sin ekzercis la tutan antaŭtagmezon. Pro laco je la vangoj, li ilin frapetis per fingroj

kaj neatendite eksonis malsamaj tonoj. Dank’ al sia bona muziksento, s-ro Cui ekkonsciis, ke oni povas ludi gamojn sur la vangoj. Li do sin ĵetis en esploradon de muzikludo sur la vangoj.

“Ĉu sonigi sur la vangoj muziknotojn do, re, mi?”

“Jes. Mi serĉis ilin ĝis kiam la fingroj doloris al mi, la gingivo kaj vangoj ŝvelis pro troa frapetado. Kvankam mi ne multe sukcesis, tamen tio tute absorbis min...”

Sur muzikiloj la gamoj bonorde viciĝas, sed sur la vangoj la notoj mistere kaŝis sin. Kiun konsulti? Kiu scias “vangoharmonikon”? S-ro Cui embarasiĝis.

Foje, en frapado de lignaj fiŝoj (budhisma liturgia ilo), li subite iluminiĝis, ke ĝuste pro malsamaj grandecoj de la kavoj, tiuj lignaj fiŝoj en tute sama formo sonas en malsamaj tonoj. Finfine, li malkovris la sekreton de la gamoj sur la vangoj, t.e. la sinteza akustiko produktita en harmonia frapetado per fingroj sur la vangoj, reguligado de la lango, kaj larĝaj kaj mallarĝaj fermado kaj malfermado de la buŝo. Kompreneble, estas malfacile ludi tiamaniere belsonan muzikon, ĉar ofte estas komplika la melodio de iu muziko. S-ro Cui senlace sin ekzercis en muzikludado sur la vangoj. Imitante la ludmanieron de bivo kaj aliaj ĉinaj kordmuzikiloj, li perfekte kaj subtile esprimis la senton de muzikopecoj.

“Tuj diris, ke mi havas eksterordinaran funkcion. Tion mi ne konsentas. Ĉiuj havas vangharmonikon, sed ili ne rimarkis ĝin,” diris Cui.

“Kaj nur vi eltrovis ĝin.”

“Mi amas muzikon, ŝatas ludi instrumentojn...”

En 1970 s-ro Cui eklaboris en fabriko kaj aliĝis al amuza trupo de la fabriko. En la trupo estis multaj muzikaj instrumentoj, kiuj tre plaĉis al li. Kelkajn jarojn poste li sciopovis lerte ludi per klarneto, orgeno, violono k.a. Foje li ludis por kamaradoj du muzikaĵojn per vico da boteloj kun akvo, kaj la kamaradoj laŭdis: “Saĝa estas juna Cui. Ĉio en liaj manoj povas fariĝi muzikilo.”

“Eble tiu vorto iluminis min. Ekde tiam mi revis sonigi ĉion kiel muzikilon. Eĉ kiam mi estis aĉetanta biciklon, mi frapetadis sur la bicikloj laŭvice. Fine mi aĉetis tiun, kiu plej agrable sonis.”

Pro la “vangharmoniko” li fariĝis famulo. Li ludis en televizio kaj radio. “Pli kaj pli multiĝas homoj kun aparta kapablo, tio estas kultura fenomeno,” diris Cui. “La sciencistoj kaj entreprenistoj faros grandajn aferojn. Kaj ni ordinara homoj ne volas resti sendistingiĝaj...”

Li adiaŭis nin kaj foriris en gaja zumkanto. ■

LI BING:



Dueto

# Denove sonis la voĉo de Volgo



Solkantado

*Ni laboras ne nur por riĉa  
rikolto, sed ankaŭ por gran-  
da gloro...  
Adiaŭ, mia amata urbo!  
...Trembrilas post poŭpo  
konata tuko blua...*

Kiam la bela melodio ŝvebis en la Muzika Halo de Pekino, profunde emociigis ĉiuj spektantoj, ĉu maljunaj, ĉu mezagaj, ĉu junaj. Ŝajne ili ne aŭskultis kantojn, kantatajn en dekoj da jaroj, sed belan rakonton. Ili estis ravitaj.

Tiam ravigis ankaŭ la kantantoj sur la scenejo. Ili ne nur energie kantis “Katjuŝa”, sed ankaŭ melankolie kantis “Trio”, “Tiru forte”... Tiuj kantoj fervoraj kaj melankoliaj estas multe sopirataj. Ili esprimas esperon, kredon, amon, solecon kaj doloron, kiujn akompanas la varma koro kaj sango.

La koncerto “Voĉo de Volgo”, kiu unufoje okazis en iu ordinara tago de la pasinta vintro, akiris grandan sukceson. Fine de la koncerto levigis en la halo longdaŭra aplaudado, kiu refoje sentigis al la aktoroj senmortan vivopovon kaj sanktan mision de la arto. La Centra Filharmonio, plej fama filharmonio en Ĉinio, ne faris tian sensacion dum longa tempo. Tion ne atendis la organizantoj de la koncerto. Ili planis aranĝi prezentadon nur unufoje, sed petate de la publiko, la aktoroj turneis 19 fojojn en aliaj lokoj kaj la kantoj fariĝis rezervita programo en duonjaro.

La kantoj prezentitaj en la koncerto estis elektitaj de la Ĥoro de la Centra Filharmonio. Ili plejparte estis klasikaj kantoj de Sovetunio, furorin-

taj en Ĉinio en la 50-aj jaroj. Nemalmultaj kantistoj de la ĥoro prezentis tiujn kantojn sur la scenejo. Hodiaŭ la malnovaj kantoj impresis ilin per neeldirebla intimeco. Kantante, ili sentis ian maturigon en la fervoro kaj montris ian fortecon en la melankolio. S-ino Feng Wanzhen, membro de la ĥoro, diris: “Tiuj estas kantoj tre vigligaj, beligaj por nia vivo. Nia amo estas plena de la melodio de ‘Oj, floras viburno’. Ankaŭ ni eklaboris kun tiuj kantoj. ‘Kanto de Komunista Junulara Ligo’ animas nin per la spirito timi nek doloron nek lacon. Mia edzo kun la kanto partoprenis en la patriota batalo kontraŭ agresantoj.”

Tio eble ja estas la ĉarmo de la muziko, kiu venas el la resonanco de la homa konkordo.

La rusa popolkanto “Ne ripro-  
ĉu min, panjo” konigas knabi-  
non forgesitan de amo. Ŝi pe-  
tas indulgon de sia patrino kaj  
daŭre amas sian amaton ŝin  
perfidintan. Ŝi povas forbruli-  
gi sin mem en la amo tute sen  
bedaŭro. Ja estas vere emociaj  
la sincereco kaj oferemo.

La kortuŝa melodio de la  
rusa popolkanto “Tiru forte”  
kvazaŭ trarompis la halon kaj  
sin ĵetis rekte al la ĉielo. Dum  
jarcentoj la diligentaj rusaj  
haŭlistoj ripetis la kanton ĉe  
la patrino-rivero Volgo, kon-  
sumante sian vivon, por ke  
aperu super la rusa tero blua  
ĉielo. Tio estas ne nur la voĉo  
de la haŭlistoj, sed ankaŭ tiu  
de la rusaj intelektuloj, revolu-  
ciistoj kaj ordinara laboristoj.  
Kompreneble, la spirito labori  
diligente por realigi sian belan  
idealon montras ankaŭ la vo-  
lon de la ĉina popolo.

Lirika kanto estas rigardata  
kiel la reĝino de la kantoj. La  
koncerto “Voĉo de Volgo” es-  
tis plena de lirikaj melodioj,  
tiel belaj, ke multaj aŭskultan-  
toj kortuŝiĝis ĝis larmoj. “Ves-  
pero en ankrejo”, “Vintra  
vojo”, “Vespera sonorado” kaj  
aliaj kantoj montras sentimen-  
talecon de migrantoj, malĝo-  
jon de geamantoj pri disiĝo  
kaj melankolion pri longtempa  
ekspediciado, kiuj sentigas na-  
turan elmontriĝon de la sen-  
toj. “Vojeto” montras, ke kna-  
bino tre sopiras sian amaton  
en malproksimo. Ŝi kantas:

*Laŭ zigzaga vojeto mi sek-  
vas*

*amaton mian al landlima  
regiono.*

Tiel la aŭskultantoj, sek-  
vante la melodion, laŭ vojeto  
eniras en la medion vastan  
sen konsidero pri siaj propraj  
gajno kaj perdo.

La koncerto vekas rememo-  
ron pri la pasinteco ĉe la mez-  
aĝuloj kaj maljunuloj de Ĉinio  
kaj ĝi estas tute freŝa por la  
hodiaŭaj gejunuloj de Ĉinio.  
Tamen, ankaŭ ili bezonas tiujn  
vigligajn kaj progresigajn kan-  
tojn en reformado kaj por-  
domalfermo de Ĉinio. Petate  
de ili, la Centra Filharmonio  
faris specialan presenta-  
don por pekinaj studentoj kaj  
mezlernejoj. La Muzika Ra-  
dio de Pekino elsendis apar-  
tan kurson kaj la junuloj pe-  
tis: “Konigu al ni pli multe, ke

ni daŭre kantu tiujn kantojn!”

Por la premiero de la kon-  
certo s-ro Xue Fan, fama ĉina  
tradukisto de rusaj kantoj, ve-  
turis de Ŝanhajo al Pekino. En  
la pasintaj pli ol 40 jaroj li  
tradukis 1 500 alilandajn kan-  
tojn, el kiuj 1/3 estis sovetu-  
niaj. Nun s-ro Xue ankoraŭ  
forte amas tiujn kantojn. Li  
diris: “Mi ŝatas ilin ne nur pro  
rememoro pri la pasinteco, sed  
ankaŭ pro strebo al pli nobla  
kaj pli profunda animstato.”

*Ne aŭdiĝas en ĝardeno eĉ  
susuro,  
ĉio silentiĝis ĝis mateno...*

La bela kanto pensigis s-ron  
Xue kaj ravis multajn gejunu-  
lojn de Ĉinio. Hodiaŭ ĝi anko-  
raŭ tiklas la homan koron. ■

### Horaro de Ĉiutaga Esperanta Dis- aŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.51	7405
		40.16	7470
		30.11	9965
		19.52	15370
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.65	9480
		3.17	6950
11:00-11:30	Japanio, Koreio	43.13	6955
		31.65	9480
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.75	11650
		25.34	11840

# Ĉina medicino servas al eksterlandanoj

**K**IAM oni preferas naturan terapion, ĉinaj akupunkturo, mokso, *ĉigong-o*, masaĝo kaj aliaj nemedikamentaj terapioj estas multe atentataj, dank' al sia aparta kuracefiko, kaj krome, ankaŭ la ĉinmedicina sanprotekto kaj terapio, kombinanta la ĉinan medicinon kun la okcidenta, montras sian superecon en kuracado. Ĉinaj medikamentoj ĝenerale estas kompondaj receptoj el pli ol 5 000 naturaj drogherboj kaj iliaj kombinaĵoj. Kompare kun kemiaj kuraciloj, ili estas sekuraj kaj malmultekostaj. Ĝuste pro ĉiuj tiuj avantaĝoj ili estas ŝatataj de pli multaj homoj.

Tamen ankoraŭ multaj homoj tre malmulte konas la ĉinan medicinon, tial antaŭ ol trakti pri ĝia populariĝo, mi volus iom paroli pri tio, kio estas la tradicia ĉina medicino kaj kiamaniere ĉinmedicinaj kuracistoj faras diagnozon kaj preskribon.

La maljunaj ĉinoj memoras, ke antaŭe preskaŭ en ĉiu ĉinmedicina apoteko sidis maljuna kuracisto. Laŭ la mieno, spiro, farto kaj pulso de malsanuloj, li faris diagnozon kaj preskribon kaj poste prenis diversajn drogherbojn, kiaj herbaj semoj kaj radikoj, arbaĵoj kaj folioj, ercoj kaj sekigitaj animaloj, el pli ol 100 tirkestoj malantaŭ si. La malsanuloj portis la medikamentojn hejmen por dekokto.

Nun la ĉinmedicinaj kuracistoj plejparte estis klerigitaj en superaj lernejoj. La tradicia ĉina medicino ne plu katenas sin en apoteko, sed servas en hospitaloj urbaj kaj kam-


paraj. Ĝi estas nemankigebla konsistiga parto de la kuracsistemo de Ĉinio. La serio de kuracaj principoj resumitaj de la ĉinmedicinaj kuracistoj en longatempa praktiko baziĝas sur la tuta ĉinmedicina teorio kaj distingado de simptomoj. La ĉina medicino substrekas distingadon de simptomoj, t.e., pere de rigardo, flaro, demandado kaj palpo de la pulsoj de malsanuloj, la kuracistoj konas la simptomojn, distingas la malsanojn kaj poste decidas kurac-metodon. En la pasintaj pli ol 2 000 jaroj la leĝo montris sian efikecon kaj sciencecon en praktiko.

Laŭ la ĉina medicino la malsanuloj prenas dekoktaĵon, pulvoron, pilolojn, elektuarion k.a. Krom tio, oni kuracas ankaŭ per akupunkturo, mokso, *ĉigong-o*, masaĝo, kupa-

do, skrapado k.a.

La klinika praktikado pruvis, ke la scienca enhavo kaj fundamenta teorio de la ĉina medicino konformas al la scienca teorio pri sinteza esplorado en la tuto kaj al la tendenco de la nuna scienca disvolvigo. La teorio de la ĉina medicino pri totala reguligo estas konfirmita en kuraco de malsanoj oftaj kaj malfacile kuraceblaj. La ĉina medicino estas efika ne nur por kuraci multajn oftajn malsanojn, sed ankaŭ por preventi kaj kuraci malsanojn de virusa infektado, funkcia perturbo, koraj kaj cerbaj angioj, imunpova malleviĝo, konektiva hiperplazio, maljuniĝo k.a. La ĉina medicino estas iagrade avangarda internacie en kuraco de internaj hemoroidoj, ostorompigo kaj brulvundo. Aku-

Prof. Cheng Xinnong (la dua de maldekstre) kaj la prezidanto de la Korea Akupunktura Asocio (maldekstre) en akupunktura kliniko en Koreio





Prof. Cheng Xinnong (la unua de maldekstre en la antaŭa vico), vicprezidanto de la Ĉina Akupunktura Asocio, prelegas en Usono.

punktura anestezo estas uzata en operacio je pli ol 100 malsanoj. Sole en Svedio mil kuracistoj kaj miloj da flegistinoj lernis akupunkturaron. Ankaŭ iuj dentistoj faris akupunkturaron en kuraco.

En 1986 la Nukleelektrejon Ĉernobelo de Sovetunio trafis akcidento. Pro tio Belorusio suferis plej multe. Laŭ interkonsento Ĉinio sendis grupon el ĉinmedicinaj


kuracistoj, akupunkturistoj kaj radiologoj, kiuj kuracis tie pli ol 10 000 malsanulojn suferantajn de radio-malsano, kun kontentiga efiko. Aplikante la ĉinmedicinan teorion, ili kuracis tie malsanulojn suferantajn de tiroidito pro malaltiĝo de imuneco, infana tiroida kancero, maligna ekzoftalmia tiroidismo k.a. Dank' al la kuraco, la malsanuloj reakiris la kapablon vivi, labori kaj fari fizikan ekzercadon. Multaj belorusoj sciis, ke en Minsko servas la ĉina medicina grupo. La Belorusa Televida Stacio plurfoje elsendis informojn pri resanigitaj pacientoj. Multaj lokanoj proponis, ke en Minsko estu ĉinmedicina hospitalo.

Nun aideso furiozas en multaj

landoj kaj regionoj. Ĉinaj fakuloj faris ekzamenojn pri kuracefiko de dekoj da ĉinmedicinaj receptoj kontraŭ aideso kaj elektis la plej bonajn el ili por uzi enlande. Tiu-kampe oni faris esploron ankaŭ en iuj aliaj landoj.

La morboŝkvaranto de aideso en Afriko estas granda. En 1987 la ĉina kaj tanzania registaroj faris kontrakton pri kuna kuracado de aideso per ĉinaj herbdrogoj. En la pasintaj sep jaroj Ĉinio sendis sume sep kuracistajn grupojn, kiuj kuracis pli ol 10 000 aidesulojn. La imuneco de du trionoj de la pacientoj estis levita aŭ stabiligita, kaj negativigis la sera antikorpo de iuj el ili post kuraco far ĉinmedicinaj kuracistoj. Post 10-15 monatoj la sera antikorpo ankoraŭ estis negativa. La ĉinmedicina kuraco de aideso estas malpli pagiga, precipe utila al ostomedolo. Ĉinaj medikamentoj estas evidente efikaj por mildigi la mezastadian aideson. Ili mildigas febron, tuson, ŝvinton, vomadon k.a. Kvankam oni ankoraŭ ne povas radikale forigi aideson, tamen oni povas mildigi ĝin, plibonigi la vivon de la malsanuloj kaj plilongigi ilian vivo-daŭron. Multaj malsanuloj suferantaj de mezastadia aideso povas normale labori kaj vivi post kuraco per ĉinaj medikamentoj.

Ĉina kuracistino Zhou Yunxian gvidanta alilandajn lernantojn en klinika praktiko



En la pasintaj dekkelkaj jaroj la ĉinmedicina kuracistaro faris vastan kontakton kun alilandaj kolegoj. La Ĉinmedicina Instituto de Ĉinio, plej granda en la lando, faras pli kaj pli multajn interŝanĝojn internacie. De 1978, en kiu komenciĝis en Ĉinio praktikado de la politiko de reformado kaj pordomalfermo, eksterlandaj medicinaj grupoj kaj personoj ofte vizitas ĝin kaj lernas en ĝi. Ĉiujare pli ol 3 000 eksterlandaj fakuloj vizitas ĝin kaj pli ol 4 000 eksterlandanoj kuracas sin tie. Inter ili estas politikistoj, komercistoj, turistoj kaj aliaj. En la pasintaj 15 jaroj la instituto elkulturis por 100 landoj kaj regionoj 2 000 ĉinmedicinajn kuracistojn kaj nun ili servas al pacientoj per la ĉina medicino en sia propra lando. ■



Mempotreto de Ding Cong

CHEN XIAOBO:

# Karikaturisto Ding Cong

**K**ARIKATURISTO Ding Cong mem estas kvazaŭ karikaturna bildo.

La maljuniĝinta Ding Cong kun ridemaj okuloj kaj gaja mieno aspektas kiel korpulenta oldulo tute simila al Majtrejo portanta okulvitrojn.

Sed liaj skurĝoj kaj ironiaĵoj al sociaj fiaĵoj estas akraj kaj pikaj. Multaj liaj verkoj estas ridigaj unuavide kaj plorigaj iom poste. Jen kiel forte kortuŝas liaj pentraĵoj!

## FAMA PENTRISTO SIGNATURANTA PER "ETA DING"

S-ro Ding Cong komencis karikaturredon en la aĝo de 6-7 jaroj kaj signaturis sur sia unua verko per "Filo de pentristo s-ro Ding Muqin". Ding Muqin, patro de Ding Cong, estis fama pentristo. De post tio, la nomo de Ding Cong ĉiam ligiĝas kun karikaturo.

Ĉu en la ĥaosaj militaj jaroj, ĉu en la paca periodo de ekonomia konstruado, Ding Cong ĉiam observas la socion per siaj akraj okuloj karikaturistaj kaj kaptas ridindajn, bedaŭrindajn kaj suspirigajn aferojn. Ĉar li ĉiam staras ĉe la popolo, tial liaj pentraĵoj estas ĉiam simpatiaj al la popolo, plenaj de laŭdo pri boneco kaj beleco. Jam antaŭ duonjarcento, Ding Cong kreis serion da karikaturoj kritikantaj sociajn difektojn. "Bildo de Realajo" estas unu el liaj reprezentaj verkoj. Tiu ĉi karikaturo krokizas, en la fono de imperiisma agreso, la naciperfidulan lakeadon de ĉinaj bienuloj kaj burokratoj kaj la senelirejan staton de malriĉaj kamparanoj senespere baraktantaj. Tiamaniere li malkovris la originon de longedaŭraj malriĉeco kaj malforteco de la duonfeŭda kaj duonkolonia malnova Ĉinio. Per la forta kontrasta maniero, troigitaj figuroj kaj koloroj li faris la karikaturon vere anim-skua.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, precipe de la lastaj dekkelkaj jaroj, kun ankoraŭ pli forta socia devokonscio, Ding Cong entuziasme prikantas la novan vivon kaj novajn morojn. Samtempe li faras bonvolan sarkasmon kaj humuran kritikon. Ekzemple, per pensigaj bildoj, li rimar-

kigas zorgi pri vivo kaj sano de la intelektuloj; admonas al la gepatroj ne dorloti sian sol-infanon; skurĝas mamonismon kaj profit-gajnnon per privilegio; kondamnas damaĝon al la konsumantoj fare de fals-markaj kaj malbonkvalitaj varoj...

Ju pli ŝatataj estas la pentraĵoj de Ding Cong, des pli renoma li fariĝas. Estante fama pentristo, li ĉiam signaturas sur angulo de sia karikaturo per "eta Ding" kaj ĉiam en malgrandaj ideogramoj. De longtempe, oni konas nur etan Ding, kaj ne scias, kiu estas Ding Cong. Kial s-ro Ding Cong nomas sin "eta Ding"? Laŭ lia propra ekspliko, la nomo "eta Ding" originis de tri kaŭzoj: Unue, tio relativas al la nomo de lia patro, veterana pentristo Ding Muqin. La patro estis "granda Ding", la filo, kompreneble, estas "eta Ding"; due, laŭ la paĝo-arango de la pentraĵo, malgranda signaturo povas kongrui kun karikaturo; trie, en la ĉina lingvo, la ideogramo "ding" signifas ankaŭ "homon". Pro tio, "eta Ding" aludas pri "malgrava persono". Li diris, ke kvankam li sufiĉe frue



Unu por aŭskulti flaton kaj la alia por...?

ekĝuis reputacion, tamen li ĉiam servas kiel “malgrava persono”, kaj ankaŭ lia staturo estas malalta. Nomi sin “malgrava persono” ja montras lian modestecon. Fakte, jam antaŭ dekoj da jaroj s-ro Ding Cong fariĝis fame konata en la kultura kaj ĵurnalisma rondo.

## ĈIAM JUNA “ETA DING”

La konatoj de Ding Cong ne nur ŝatas liajn pentraĵojn, sed ankaŭ amas lian personecon. Liaj denaskaj optimismo, modesteco kaj sincereco nuligis al li ĉiujn suferojn kaj ĉagrenojn de la vivo. Lia vivovojo ne estis glata, kaj iam lin trafis maljusteco. Sed li ĉiam estas grandanima, tolerema kaj ridetante priskribas, per sia peniko, la feliĉon kaj malfeliĉon de la vivo. Kiam li eklaboris kiel salajrata karikaturisto, lia aĝo jam superis 60 jarojn. Tamen li, plenverva kiel junulo, sin ĵetis en la verkadon. Li fordankis ĉiujn sociajn invitojn, rezervante por si pli da tempo por pentrado. Li faris grandan kvanton da karikaturaj portretoj por la gazetaro, samtempe li faris ankaŭ ilustraĵojn por literaturaj verkoj.

De la jaro 1979 ĝis nun, s-ro Ding Cong publikigis sume 12 karikaturajn kolektojn, kaj aliaj 4 estas en presado. Kvankam delonge li ĝuas renomon en la piktura kampo, tamen oni daŭre nomas lin “eta Ding”, malgraŭ ke li nun estas 79-jara.

## DING CONG KARIKATURATA

Estas apenaŭ kredeble, ke Ding Cong, alt-inteligenta en la kariero, estas tamen “malkapbla” en la ĉiutaga vivo. Sed feliĉe, li havas tre kapablan kaj saĝan edzinon. Kun plena respekto kaj karesa ŝerco Ding Cong nomas sian edzinon “familiestri-no”, kaj la lasta nomas sin mem “alt-klasa servistino de Ding Cong”. Dum mia intervjuo al Ding Cong lia

edzino pretervole skribis kelkajn liniojn, skizante por ni rimarkinde stultan Ding Cong en la ĉiutaga vivo:

— En la dommastrumado, Ding Cong kvankam sin okupas nur je lavado de manĝilaroj, tamen ofte grumbas: “Kial mi devas lavi multe da manĝilaroj, nia familio havas nur du homojn!”

— Ding Cong amas pentraĵojn, kaj precipe ŝatas aĉeti grandajn bildalbumojn. Ofte okazas, ke elĉerpigis lia monata salajro pro la aĉetado. Lia edzino kelkiam atentigis lin: “Bonvole sciu, ke nun estas mi, kiu vivtenas vin!” Ding Cong ne volas aŭdi tiujn vortojn, sed li povas fari nenion, krom plendi al amikoj: “Ŝi asertis, ke nun ŝi vivtenas min!”

— Sur la menuo de Ding Cong ne estas legomoj kaj fruktoj, sed nemanĝeblas viando. Rigardante la edzinon kuiri legoman pladon, li ŝajnas interesata, sed fakte pensas en si: “Kiu volas maĉi ĉi tiun verdan furaĝon!”

— Ding Cong, 79-jarulo, ofte faras malvarmakan banon, pro tio lia sanstato estas tre bona. Liaj amikoj ofte demandas lin: “Kiel juna vi aspektas! Ĉu vi prenas ‘Qingchunbao’?” Tiuokaze Ding Cong “grav-miene” respondas: “Mi prenas ‘Wahaha’ anstataŭ ‘Qingchunbao’.” (“Qingchunbao” estas kontraŭmaljuna nutraĵo, kaj “Wahaha” estas infana aperitivo.)

En la vivo de Ding Cong estas nenio sekreta. Tre laŭtas lia voĉo. La amikoj humure diras, ke eĉ lia flustrado similas al laŭta krio. Ĝuste tiamaniere li simple, facile kaj rekte sin tenas en ia distingiĝa animstato neatingebla por la aliaj. La malkaŝemo kaj grandanimeco de Ding Cong kulturis liajn karikaturojn kaj ankaŭ havigis al li sennombrajn fidelajn amikojn en la dekoj da jaroj. Ĉiam kaj ĉie, ekvidinte lin, nur je la laŭta voko: “eta Ding!” la amikoj tuj sin trovas en gajo kaj entuziasmo. ■

(Daŭrigo de p.45)

1992 la jara produktovaloro de la kemia industrio de Cangzhou konsistigas 30% de la totala industria produktovaloro de Cangzhou kaj pli ol kvinonon de la totala produktovaloro de la kemia industrio de Hebei-provinco. Kemia industrio jam fariĝis spina industrio en Cangzhou.

Post ekpraktikado de reformado kaj pordmalfermo la kemi-industriaj entreprenoj de Cangzhou importis avangardajn ekipaĵojn, tiel ke la kvalito de produktaĵoj senĉese altiĝis. Ekz., la Cangzhou-a Kemisterka Fabriko importis kontraŭ 45 milionoj da juanoj ekipaĵojn kun jara produktopovo de 60 000 tunoj da nitrata acido kaj investis 770 milionojn da juanoj por la projekto, kiu ĉiujare produktos 20 000 tunojn da toluena disocianato kaj nun estas en la unuaperioda konstruado. Hebei-provinco kaj la Kemi-industria Ministerio de Ĉinio

planas por kune ekspluati la kemian industrion de Cangzhou.

La sal-regiono kaj kemi-industriaj fabrikoj de Cangzhou havas evidentan avantaĝon en geografia situo kaj trafiko. Cangzhou situas proksime al Pekino kaj Tianjin. En la urbo araneaĵe interkruciĝas aŭtovojoj, la Pekin-Ŝanhaja Fervojo trairas ĝin kaj de ĝi oni povas ŝipveturi al Tianjin. Huanghua-haveno estas konstruata, kun investo de 2.4 miliardoj da juanoj laŭplane. Ĝi estos la ĉemara ekstremo de la dua karbotransportanta fervojo de Ĉinio, per kiu eksportiĝos karbo el Shanxi-provinco, kaj ludos pozitivan rolon en la disvolviĝo de la kemi-industria urbo Cangzhou. Bo Shaoquan, urbestro de Cangzhou, diris, ke profitante siajn avantaĝojn, la Cangzhou-anoj strebas por multe ŝanĝi la fizionomion de la urbo kaj malfermi ĝin al la mondo. ■

# Por ke knabinetoj reakiru ŝancon de lernado

de XIAO NAN

**I**U ĉina poeto diris: “Ĉiu tago de la estonteco estos festotago por la infanoj.” Li pravas kaj malpravas, ĉar en la ĉemaraj kaj iuj land-internaj regionoj la infanoj vivas pli kaj pli feliĉe, sed en la lokoj, kie ankoraŭ regas povreco, la infanoj, precipe la knabinetoj, ne ĝuas gajan vivon.

En Ĉinio ĉiujare ĉ. 10 milionoj da infanoj ne povas viziti lernejon. Pli ol 70% de ili estas knabinetoj. Tio multe malfaciligas la praktikadon de deviga edukado en Ĉinio. En iuj malriĉaj regionoj estas malfacile por knabinetoj viziti lernejon kaj patrinoj havas malaltan klerecon, kio kaŭzas ne nur povrecon kaj malklerecon, sed ankaŭ fruan edziniĝon kaj multan naskadon. Multaj politikistoj kaj edukistoj atentigis, ke klerigi knabinetojn ekstreme gravas ne nur por virino kaj familio, sed ankaŭ por la socia disvolviĝo. Ili montris, ke edukado de knabo rilatas nur al li mem, sed edukado de knabino rilatas al la tuta nacio, ĉar knabinoj estos patrinoj.

## “MI VOLAS LERNI!”

“Mi volas lerni” estas la komuna voĉo de la infanoj, kiuj ne povas plu viziti lernejon. Plejparto de la knabinetoj, kiuj ĉesigis sian lernadon, vivas en la malriĉaj regionoj de sudokcidenta kaj nordokcidenta Ĉinio kaj izolitaj regionoj de la lando. En mjaŭ-nacia regiono de Yunnan-provinco, iu kvinaklasa lernejanino devis for-

lasi la lernejon pro malriĉeco de sia familio kaj kolektis tuttage furagon por porkoj surkampe. Ŝi sopiris lerni, sed ŝi povis fari nion krom kulpigi sian malbonan sorton.

En iu izolita loko de Yunnan-provinco knabineto Bai Lanxian estas la unika, kiu finis sian lernadon en malsupera mezlernejo, inter la knabinoj de la tuta subdistrikto. Ŝi sukcese trapasis la eniran ekzamenon por la gubernia supera mezlernejo, sed ŝia familio tute ne kapablis pagi por ŝia lernado. Ŝi falis en grandan ĉagrenon kaj skribis al redakcio de ĵurnalo: “Se iu monhelpo min en mia lernado, mi povos edziniĝi al li post diplomiĝo.”

En la izolita regiono de Dabie-montaro, kiam enketantoj enmanigis saketojn da biskvitoj kaj panojn al knabineto Xiaohua, kiu perdis siajn gepatrojn kaj vivas de monhelpo de la registaro, ŝi, kiu gajnis la unuan lokon en ekzameno de la subdistrikto kaj ne povis plu viziti lernejon, plorante diris: “Oĉjo, mi ne volas mangajojn. Mi volas lerni.”

En iuj lokoj eĉ lernoagaj knabinetoj tute ne povas viziti lernejon pro malriĉeco. Ekz., en Guozhuang-vilaĝo de Qinghai neniue el la 152 knabinetoj vizitis lernejon.

Kompare kun la rapida disvolviĝo de la landinterno kaj ĉemaraj regionoj, la dezerta Leŭsa Alt-ebenajo kaj izolitaj montvilaĝoj

progresas tre malrapide. En multaj grandaj kaj mezgrandaj urboj, la socia pozicio de knabinoj altiĝas paralele kun la socia kaj civilizacia evoluo. Ili ĉagreniĝas nur pro tropeza lernado.

## ESPEROPLENA PROGRAMO

Por helpi milojn kaj dekmilojn da knabinetoj viziti lernejon, en 1989 la Fonduso de Ĉinaj Infanoj kaj Tutlanda Virina Federacio de Ĉinio decidis starigi stipendion por knabinetoj ne povantaj viziti lernejon, kaj en 1992 oni oficiale donis al tio la nomon Programo de Burgono. Sekve de tio, la provincoj Gansu, Qinghai kaj Guizhou kaj la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono faris esploradon pri la klereco de kamparaj knabinetoj, alprenis konvenajn rimedojn kaj enlistigis ĝin kiel ĉefan taskon de la ŝtata projekto de filozofia kaj socia sciencoj. Post 2-jara esplorado kaj provado oni akiris ĝojigan sukceson en plibonigo de la eduka medio por knabinetoj kaj solvado de ilia malfacileco en lernado.

Sendube, la programo alportis ĝojigan informon al la knabinetoj, kiuj ne povas viziti lernejon.

En Sichuan-provinco ji-oj loĝas en malvarma regiono pli ol 2 000 m super la marnivelo. Malgraŭ ke la loka registaro asignis kvaronon de sia enspezo kiel edukon koston, granda nombro da knabinetoj ankoraŭ ne povis viziti lernejon. Pro





Ŝi denove vizitas lernejon.

tio, la Fonduso de Ĉinaj Infanoj funkciigis tie 3 provkursojn por knabinetoj, en kiuj lernis 114 knabinetoj. Kaj la gubernia registaro sendis plej bonajn instruistojn al la kursoj.

Informiĝinte pri funkciado de kurso por knabinetoj en izolita guberni-urbo de Guangdong, la knabinetoj en la montregiono tre ĝojiĝis. Oni planis varbi 100 knabinetojn, sed fakte pli ol 600 knabinetoj sin anoncis por lernado. El ili estis ne nur knabinetoj ĉesigitaj lernadon antaŭ nelonge, sed ankaŭ 17-18-jaraj knabinoj. Iuj knabinetoj diris, ke ili volas aŭskulti lecionon ekster la lernoĉam-

bro, se ĝi estos tro malvasta por ĉiuj lernantoj.

La lernantoj de la 2 kursoj por knabinetoj estis internuloj. Ili ĉiuj senpage loĝis en la lernejo, kiu liveris al ili litaĵojn kaj kostumojn kaj pagis por ili librojn, kajerojn k.a. Tiuj knabinetoj lernis tre diligente. Iu mjaŭ-a knabineto skribis sur nigra tabulo: "Por ŝanĝi la postiĝintekon de nia hejmloko ni nepre devas lerni diligente." Tio esprimis la volon de ĉiuj knabinetoj de la kursoj. En la unua periodo por praktiki la programon oni funkciigis 14 porknabinetajn kursojn en izolitaj regionoj de la provincoj Guangdong, Hunan kaj

Sichuan kaj la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono. En la kursoj lernis entute 800 knabinetoj.

Dank' al la klopodo de la ĉina registaro kaj diversaj rondoj, pliboniĝis ankaŭ la situacio en aliaj regionoj. Ekz., antaŭe en iuj lokoj de Shaanxi-provinco, multaj knabinetoj devis ĉesi lerni 1-2 jarojn post kiam ili komencis viziti lernejon, sed en la lastaj jaroj ĉiuj gepatroj laŭeble lernigis siajn infanojn, ĉu knabetojn ĉu knabinetojn.

## HELPO DE LA SOCIO

2 jarojn post ekpraktikado de la Programo de Burgono, ĝi vekis eĥon ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en iuj lokoj de la mondo. Diversaj rondoj de la socio donis grandan subtenon, helpon kaj simpatian.

S-ino Zhou Jiebing de Hongkongo oferis milionon da Hongkong-aj dolaroj kiel stipendion por malriĉaj knabinetoj-lernantinoj. Ŝi diris: "Mi faris tion kun espero, ke diversrondaj personoj oferos sian amon al knabinetoj ne povantaj viziti lernejon."

Iu emerita ŝtatoficistino donacis 1 000 juanojn kaj ŝia 90-jara patrino, 300 juanojn. Tio esprimis la volon de la 2 generacioj.

En la aktivado la gvidantoj de la Fonduso de Ĉinaj Infanoj donis bonan ekzemplon. Ĉiu el ili monhelpas almenaŭ unu knabineton viziti lernejon. La familio de la estro de la fonduso finansas lernadon de 8 knabinetoj, ĝis ili diplomiĝos el elementa lernejo. En Pekino, Ŝanhajo, Shenzhen kaj aliaj lokoj de Ĉinio multaj kontribuas per mono kaj objektoj por helpi knabinetojn en lernado.

En majo 1994, la Tutlanda Virina Federacio de Ĉinio kaj la Fonduso de Ĉinaj Infanoj komencis serion da agoj por 1994-1995. Oni funkciigos en malriĉaj regionoj 1 000 kursojn, kio ebligos al 50 000 knabinetoj reveni en lernejon. ■

# Antikvaj ĉinaj pontoj

de WU WEN

**Ĉ**INIO estas lando kun vasta teritorio, multaj montoj kaj riveroj. Por transiri riverojn, oni konstruis pontojn, tial en Ĉinio troviĝas multaj pontoj. La itala vojaĝisto Marko Polo (1254 — 1324) skribis en siaj vojaĝaj notoj, ke Ĉinio estas pontoriĉa lando. Li alte taksis la ponton Lugou sidantan en la sudokcidenta parto de Pekino: “Super la rivero belas ŝtona ponto nekomparebla en la mondo.” Tio montras, ke en la 13-a jc. Ĉinio jam havis multnombrajn belajn pontojn.

## ŜTONAJ ARKPONTOJ

Ŝtonaj arkpontoj estas plej multe vidataj antikvaj pontoj en Ĉinio. Komence oni konstruis arkformajn kavernodomojn, poste, similajn pordojn, fenestrojn, tombojn kaj ankaŭ pontojn. La 17-spana Ponto en la Somera Palaco de Pekino estis konstruita

en 1795. Rigardate de malproksime, ĝi imponas super Kunming-lago kiel bela ĉielarko. La plej famaj el la ŝtonaj arkpontoj de Ĉinio estas Zhaozhou-ponto kaj Lugou-ponto.

Zhaozhou-ponto, la plej antikva ŝtona arkponto en Ĉinio, sidas super Xiaohe-rivero ĉe Shijiazhuang (Ŝiĝjaĝŭang), Hebeiprovinco. Ĝi, 50.82 m longa kaj 10 m larĝa, konstruiĝis ĉ. la jaro 605. Kvankam ĝi estas arkforma, tamen ĝia surfaco estas ebena, ĉar sur ambaŭ ŝultroj de la granda pontarkaĵo troviĝas po 2 malgrandaj arkoj, kiuj povas mildigi la kurbecon de la pontsurfaco. Laŭ notoj de antikva libro, ĝia projektinto estis Li Chun. Nun la ponto firme staras kiel antaŭe, elteninte multfojajn tertremojn en la pasintaj pli ol mil jaroj.

Lugou-ponto ekfamis plej flue inter la ŝtonaj arkpontoj de Ĉinio. Jam en la 13-a jc. ĝi estis laŭdata

de Marko Polo. Konstruita en 1192 super Yongding-rivero en la sudokcidenta antaŭurbo de Pekino, ĝi estas 265 m longa kaj 8 m larĝa kun 11 spanoj. La pilieroj distancas unu de alia je 16-21 m. Aparte interesaj estas la 485 diversspozaj ŝtonaj leonoj sur ĉiuj balustroj ambaŭflanke de la ponto. Tiuj malgrandaj leonoj aŭ staras sur kapo de grandaj leonoj aŭ kuŝas sub iliaj piedoj.

La kanonado de la japanaj agresantoj ĉe la ponto en la 7-a de julio 1937 markis komencon de la 8-jara Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio.


## ŜONTRABAJ PONTOJ


En la 11-13-aj jc. konstruiĝis multaj ŝontrabaj pontoj en la urboj Quanzhou kaj Zhangzhou de Fujian-provinco, sudorienta Ĉinio. En la 7-a jc. Quanzhou jam fariĝis granda komerchaveno same konata kiel Kantono kaj Yangzhou. La disvolviĝo de mara trafiko kaj ekstera komerco akcelis la konstruadon de pontoj. Famaj ŝontrabaj pontoj de Quanzhou kaj Zhangzhou plejparte sin trovas super margolfoj kaj enfluejoj de riveroj. Oni povas imagi al si, kiel grandioza kaj malfacila estis la konstruado!

Anping-ponto estas la plej longa el la ŝontrabaj pontoj de Ĉinio. Kun la totala longeco de 2.5 km. ĝi havas 331 pilierojn. Oni finkonstruis ĝin en 1152. En la loko oni diras: “Sub la ĉielo ne ekzistas ponto pli longa ol ĝi.” Por ke pasantoj povu ripozi, oni konstruis sur la ponto 5 kioskojn.

La Tigro-Transira Ponto super Jiulong-rivero oriente de Zhang-

Zhaozhou-ponto





La Deksep-spana Ponto en la Somera Palaco

zhou, Fujian-provinco, estis konstruita en 1237. Laŭ historiaj notoj, tiam la rivero estis tre profunda kun rapida fluo, kiu plurfoje detruis la pilierojn tuj post kiam oni konstruis ilin. Iutage pontistoj rimarkis, ke tigro kun ido sur la dorso transnaĝas la riveron. Trapasante torenton, ĝi plurfoje ripozis kaj finfine ĝi sukcese transiris la riveron. Pontistoj malkovris, ke en la fundo, kie ripozis la tigro, troviĝas firmaj ŝtonblokoj. Oni do konstruis pilierojn sur ili kaj transpontis la riveron. Pro tio oni nomis la ponton Tigro-Transira Ponto. Ĝi longas 360 m kun 19 spanoj, el kiuj la plej larĝa estas 21 m. Sur la pilieroj oni metis 3 ŝtonajn trabojn, ili ĉiuj pezas je pli ol 100 tunoj kaj la plej peza el ili superis 2 070 tunojn. En pontokonstrua historio de la mondo, ĝi estas fama pro la alta konstrua tekniko kaj la pezo de la ŝtonaj traboj.

La ŝtontrabaj pontoj en Quanzhou kaj Zhangzhou multe interesis ĉinajn pontistojn. En la esplorado ili trovis, ke Luoyang-ponto havas kompletan ŝtonan bazon. Por fortikigi la bazon, la tiamaj lertaj pontistoj ĵetis al la fundo ŝtonojn, kiuj formis sub akvo ŝtonan bazon. Poste la produktado de ostroj en la malprofunda maro kungluis ŝtonojn en unu tuton, fine oni konstruis sur ĝi pilierojn.

Kiamaniere oni surmetis gigan-tajn ŝtonblokojn sur pilierojn en la antikveco, kiam mankis progresaj transportiloj kaj avangardaj ŝarĝleviloj? Nun oni povas nur su-

pozi, sed ne trovis la ĝustan respondon.

Aparte mirinda estas, ke la plej granda spano de la Tigro-Transira Ponto larĝas 21 m. laŭ kalkulo de la moderna mekaniko, la kurba tirforto de la ponto en spano estas preskaŭ egala al la maksimuma kontraŭtira forto, se la spano estas iom pli granda ol la nuna, la ponto do detruigus pro sia propra pezo. Kial oni povis elfari tiel ekzaktan kalkulon en la antikveco, kiam sciencoj kaj teknikoj estis neevoluintaj? Tio vere estas enigmo.

## PENDOPONTOJ EL ĈENOJ

Sudokcidenta Ĉinio estas abunda je altaj montoj kaj profundaj valoj. Riveroj torentas inter krutaj montoj. En tiuj lokoj pendopontoj estas kompreneble idealaj, ĉar ili ne havas pilierojn. Pendopontoj en Ĉinio havas longan historion. En 399 kaj 630 bonzroj Faxian kaj Tang Xuanzang sinsekve pilgrimis al Hindio. En siaj notoj ili priskribis pendopontojn super la valoj. Lastatempe mi vizitis Sichuan-provincon en sudokcidenta Ĉinio. En aŭto veturanta laŭ Minjiang-rivero, mi propraokule vidis multajn pendopontojn super la rivero, 2 el kiuj estas aparte mirindaj.

Super Dadu-rivero majestas Luding-ponto 103 m longa kaj 3 m larĝa. Ĝi estis konstruita en 1706. La ponto el 9 ĉenoj estas fiksita al feraj kolonoj en pontkapoj ambaŭborde. Sur ĉenoj estis lignaj tabuloj. Ambaŭflanke de la ponto etendiĝas 2 feraj ĉenoj kiel

teniloj. La tuta ponto el ĉenoj pendas super la ondanta rivero. Estas timige iri sur ĝi.

Antaŭe, feraj ĉenoj estis malfacile troveblaj en la internaj partoj de la lando, pro tio aperis pontoj el bambuoj kaj lianoj. En Guanxian-gubernio, Sichuan-provinco, troviĝas kabla ponto el bambuoj super Minjiang-rivero. Ĝi longas 330 m kun 9 spanoj, el kiuj la plej granda larĝas 61 m. Ĝiaj pilieroj estis faritaj el flosoj, de kiuj pendas 10 bambuaj kabloj kun lignaj tabuloj sur si. Ĝiaj du ekstremitoj estis fiksitaj al ŝtonaj ĉeloj borde de la rivero. Kiel apogiloj 5 bambuaj kabloj sin trovas ambaŭflanke de la ponto. Ĉar bambuoj estas facile difekteblaj, oni ĝin riparas en ĉiuj 3-5 jaroj. Tiu ponto estis konstruita antaŭ mil jaroj kaj ruiniĝis poste. La ekzistanta ponto konstruiĝis en 1803.

## FLUGPONTO SUPER BIANHE-RIVERO

En la antikva Ĉinio estis multaj lignaj pontoj. Ĉar ligno estas facile difektebla, la pontoj ne vidigas nun, tamen ni povas trovi ilian noton en historiaj dokumentoj.

En 1110-1129, ĉina pentristo Zhang Zeduan faris pentraĵon "Scenoj apud Rivero en la Festo de Klara kaj Brilo". En la centro de la pentraĵo imponas arka ponto, konstruita el interkruciĝantaj lignoj kunligitaj sen subtenilo kun 5 samaj trusoj. Tiu ponto portis tiam la nomon flugponto.

Dank' al disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj, oni multe uzas feron, ŝtalon, cementon kaj aliajn novajn materialojn. La ponto-konstruado de Ĉinio atingis la avangardan nivelon de la mondo. Antaŭe super Yangzi-rivero, la unua granda rivero de Ĉinio, troviĝis nenia ponto. Nun super ĝi majestas ne nur diversformaj ŝoseaj pontoj, sed ankaŭ dekoj da modernaj pontoj ŝoseaj kaj fervojaj. Oni devas atribui tiun progreson ankaŭ al la spertoj akiritaj de antikvaj ĉinoj. ■

PANG GEPING:

# Por esplori spurojn de la homaro en la ŝtonepoko


**E**STAS du gravaj temoj en studado pri paleoantropologio. Unu el ili estas la transiro de la antropoidoj al la prahomoj kaj la alia — la transiro de la prahomoj al la modernaj homoj. Arkeologio diras, ke la lasta signifas la transiron de la paleolitika kulturo al la neolitika. Jam estas konstatite, ke la ruino de Bailiandong-kulturo ĉe Liuzhou de Ĉinio prezentas antikvajn kulturojn de la homoj de diversaj epokoj. Helpe de ĝia efektiva specimeno oni povas esplori la duan transiron, kio ekstreme gravas por arkeologia studado.

## NEORDINARA KAVERNO

Komence de la kuranta jarcento germana paleoantropologo aĉetis du dentegojn en apoteko de ĉina medicino en Hongkongo kaj supozis, ke ili estas fosiliaj dentoj de granda simihomo. Tio estis tre atentata de la internacia arkeologaro.

Ĉinaj arkeologoj konstatis post esplorado, ke la granda simihomo probable originis en Guangxi. En 1956 granda ekspedicio de la Ĉina Akademio de Sciencoj esploris en Guangxi kaj trovis ne nur la originon de la simihomo, sed ankaŭ neordinaran kavernon.

La kavernon estas sub la piedo de monto en ĉirkaŭurbo de Liuzhou. Ĉe la monto oni malkovris antaŭe fosilian Liujiang-



Ĉinaj arkeologoj esplorantaj en kavernon


anon de la malfrua periodo de paleolitiko. La kavernon, zigzaga kun ondantaj rokaj stratumoj, longas 1 870 metrojn kaj kovras 7 000 kvadratajn metrojn. Ĝi havas kvin tavolojn kaj kvin aperturojn. En la fundo de la kavernon fluas 370-metra rivero, kies akvo fluas en Liujiang-riveron. La kavernon estas abunda je sedimentoj. Suden rigardas la ĉefa halo de la kavernon, tra kiu ofte eniras kamparanoj en la kavernon. Iam oni bredis brutojn en ĝi. Sur rokmuroj de la kavernon legiĝas surskriboj faritaj de turistoj en la 18-a jc. En ĝi oni ankaŭ kultis diojn. En la mezo de la aperturo pendas stalaktito simila al burĝono de lotusfloro. La lokanoj nomas la kavernon Bailiandong (en la ĉina lingvo Bail-

iandong signifas kavernon de blanka lotusfloro).

En la kavernon ĉinaj arkeologoj elfosis kvar ŝtonajn laborilojn, unu platan ostan borileton kaj unu krudan ostan kudrilon. Post ekspertizo oni konstatis, ke la kavernon apartenis al malfrua periodo de paleolitiko.

## LONGTEMPA PRIFOSADO

Laborantoj de la Liuzhou-a Muzeo faris longtempan prifosadon en la kavernon. Prifosante bukencajn kolektaĵojn en nordorienta Bailiandong-kavernon, ili trovis ŝtonan laborilon el griznigra kvarcito, lignokarbajn grajnoj, brulbrunigitajn ostojn kaj ŝtonojn, fosiliajn dentojn de makako, cibeto, rato, cervo kaj



Ŝtonaj instrumentoj elfositaj en kaverno

ŝafo kaj ankaŭ denton de fiŝo.

En ordigo kaj tavoligo de la sedimentoj en la orienta parto de la kaverno oni trovis 87 ŝtonajn produktaĵojn kaj 11 ŝtonajn restaĵojn. Krom kvar elfositaj el la primitiva tavolo, ĉiuj aliaj venis el la malorda tavolo, faritaj ĉefe el gruzoj kaj malmulte da nigra flinto. Estas trovitaj ankaŭ fosiliaj porko, bovo, ŝafo kaj cervo. La tiea borita gruzo similas al ŝtona borita laborilo elfosita el la kaverna ruino de neolitiko de Zengpiyan de Guilin, 200 km for de Liuzhou. Tial povas esti, ke Bailiandong-ruino daŭris de antaŭ la mezolitiko ĝis la komenca periodo de neolitiko.

Februare de 1980 oni komencis prifosi la malordan tavolon en la okcidenta parto de la ĉefa halo de la kaverno kaj elfosis unu fosilian denton de homo, 150 ŝtonajn produktaĵojn kaj brulbrunitajn ostojn kaj ŝtonojn. Kaj krome, estis ankaŭ 19 fosilioj de pando, urso, rato kaj aliaj mamuloj. Poste, ĉinaj fakuloj prifosis la tavolon.

Ĝis nun oni trovis en la kaverno du fosiliajn dentojn de

homo, 500 ŝtonajn produktaĵojn, pli ol 3 000 fosiliojn de bestoj, 300 fosiliajn dentojn de bestoj kaj du fajrajn kavojn. La prifosado de la malorda tavolo estas fundamente finita kaj oni akiris bonan konon pri la kaverno.

Ekspertizinte la kolektitajn materialojn, fakuloj opinias, ke la sedimentoj en la kaverno Bailiandong enhavas kulturojn de la malfrua paleolitiko kaj frua neolitiko kaj la ruino Bailiandong estas grava spuro por studi pri la transiro de la tiea paleolitika kulturo al la neolitika.

Konsidere de la riĉa eltrovo de la kaverno en Liuzhou, en majo de 1985 fondiĝis tie la Speleologia Muzeo, unua en Ĉinio.

### **SIGNIFOPLENA MALKOVRO**

La ruino Bailiandong konigis la epokon, kiu daŭris ĉ. 30 000 jarojn kaj trapasis paleolitikon kaj neolitikon, en kiu la ekonomia formo de la homaro disvolviĝis de prenemo al produktado kaj aperis la primitiva agrokulturo. Studi pri la ekmedio de la periodo tre gravas por koni la fonon, en kiu naskiĝis la primiti-

va agrokulturo. En 1990-1993, monhelpate de la Nacia Fonduso de Naturaj Sciencoj de Ĉinio, 13 fakuloj de Pekino esploris la ruinon kaj akiris deziratan sukceson. Ili havigis al si datenojn de la aĝo de tavolo post laŭtavola mezurado, faris sporpolenan analizadon al stratumo kun kolektaĵoj kaj restarigis paleoekomedion. Per tio ili malkovris la ŝanĝigon de paleoklimato kaj paleoekomedio ekzistantaj antaŭ 35 000 jaroj kaj trovis, ke ĝi estas sinkrona kun tiu de la tuta tergloblo. La restarigita paleoekomedio servas kiel fono por esplori la evoluadon de paleoantropoj kaj primitiva kulturo en suda Ĉinio. Ĝuste en la paleoekomedio la terciara kulturo de la ŝtonepoko, kiun konsistigas la kvin kulturaj tavoloj de la kaverno Bailiandong, montras la klaran turnigon de la prenema ekonomio de paleolitiko al la produktema de neolitiko kaj atestas la ekzistadon de la mezolitiko de suda Ĉinio. La sekundara kulturo de Bailiandong estis reprezentanto de la transira periodo. Post kontrasta esplorado oni montris, ke la strukturo de la kulturosistemo de la ŝtonepoko en Bailiandong estas modelo kaj distingiga per universaleco. Oni konstatis, ke la kreinto kaj mastro de la primara kulturo de Bailiandong povas esti Liujianganoj. Rezulte de tio, la studado, kiu daŭris pli ol duonjarcenton, rimarkinde progresis.

La studado pri la kaverno estas ankaŭ atentata de alilandaj fakuloj. En 1989 en Liuzhou okazis la Internacia Simpozio pri Kavernoj Liuzhou-aj. Fakuloj el Kanado, Usono, Francio, Aŭstralio kaj aliaj tri landoj esploris la kaverton kaj alte taksis ĝin. Prof. Ford, prezidanto de la Monda Kavernologia Instituto, donis la skribon "Liuzhou estas la koro de kavernoj en la mondo". ■


# Sportemaj Zibo-anoj

**F**RUMATENE de ĉiu tago, ĉiu libera loko iom pli vasta en tiu ĉi urbo estas okupita de korpo-ekzercantoj. Ili sin ekzercas per glavludo, tajĝiĉjūan, ĉigong-o, kurado aŭ gimnastiko. Ĉie pulsas vigeleco kaj viveco.

Kiam la vespera krepusko vuas la bruan urbon, aperas en ĝi alia interesa sceno. Inter diversaj amuzaj aktivadoj troviĝas subĉiela balo spontanee okazigita de urbanoj. Eĉ en vintro oni gaje dancas malgraŭ malvarmo kaj laco.

En la urbo Zibo kun 3 milionoj kaj 850 miloj da loĝantoj, la publika sporto formis sian tradicion kaj skalon. En la pasintaj 6 sinsekvaj jaroj, Zibo estis elektita ĉiujare kiel avangarda urbo en disvolvo de publika sporto en la provinco Shandong, envicigita inter la tutlandaj gravitaj urboj de tablotenis, kaj nomata hejmloko de naĝo. Zibo-anoj diris: "Ĉe ni ne estas postsezono de publika sportado."

Zhangjia-distrikto estas tipo de publika korpo-ekzercata aktivado. Kiel ekzemplon ni prenu jenan okazaĵon: Estas kamparano entreprenanta etkomercon. Li konstruis domon por tablotenisa trejnejo el sia enspezo. Poste li invitis el la urbo kumulan trejniston, ke ĉi tiu ĉiutage trejnu lian filon kaj najbarajn infanojn en tablotenis. Kelkajn jarojn poste li denove havis sumon da mono kaj sin rekomendis al la distrikta instanco por financi la tut-distriktan familian tablotenisan konkurson. Lia fervoro kortuŝis la instancon, kaj la lasta postulis de li neniun pagon kaj nur lasis lin doni premiojn al la gajnintoj de la konkurso. Tiamaniere okazis la familia tablotenisa invita konkurso en kamparana domo.



Konkurso organizita de la Porcelanaĵa Fabriko de Zibo

Iu distrikto de Zibo invitis al si 28 famajn ŝakludistojn kaj iniciatis la tutlandan ŝakludan invitan konkurson. Al la konkurso venis ne nur lokanoj, sed ankaŭ rigardantoj el la urbo kaj el lokoj malproksimaj je dekoj aŭ eĉ centoj da km. Kaj la informo pri la nomita invita konkurso estis taksita kiel unu el la dek plej sensaciaj sportaj novaĵoj en la jaro.

En 1984, konforme al tiu spontanea postulo de la publiko pri la sporta ekzercado, la magistrato de Zibo fondis la Ĝeneralan Sportan Federacion. Sub la federacio funkcias 30 fakaj asocioj, kiuj interligas ĉiujn distriktojn, guberniojn, urbe-tojn, vilaĝojn, fabrikojn, minejojn, instituciojn kaj lernejojn, bone absorbas la popolamasojn, tiel ke en ĉiu sporta konkurso oni aktive partoprenas.

La urba Futbala Asocio fondita en 1985 aranĝis futbalan matĉon

de kvar sinsekvaj urbaj sportkunvenoj, kaj ankaŭ futbalajn konkursojn tutlandan kaj internacian. 2 500 membroj de la asocio troviĝas ĉie en la urbo Zibo, kaj dank' al ili la tiea futbala ludarto multe progresis en kelkaj jaroj. En la tut-provinca sportkunveno okazigita antaŭ nelonge la futbala teamo de la urbo Zibo gajnis la subĉampionecon. En 8 jaroj, oni jam sendis al profesia futbala teamo 10 sportistojn kaj 4 sportistinojn, kaj unu el ili estis elektita kiel membro de la ŝtata futbala teamo, alia, kiel membro de la ŝtata knaba teamo, trejnata en Brazilo.

Ĉiujare, en la gubernioj kaj distriktoj de Zibo okazas diversaj sportaj konkursoj. Krom konkursoj de tablotenis, naĝo kaj atletiko, estas ankaŭ konkursoj de bilardo, sledado, fiŝhokado ktp. La konkurso de maljunula lignopilkoludo, la familia tablotenisa konkurso kaj aliaj vaste ŝatataj konk-

ursoj fariĝis repertuaraj programe-  
roj. Unuvorte, sportaj konkursoj  
jam estas nemalhavebla enhavo de  
la vivo de Zibo-anoj.

Por fari konkursojn pli intere-  
saj, la organizantoj neniam forges-  
is spici konkursojn per distraĵoj kaj  
profesia apartaĵo. Ekzemple, en  
sia ĉiujara sportkunveno, la Kvara  
Smirg-rada Fabriko seresepte in-  
stalis konkurson de kurado kun  
smirg-radoj. Kaŭze de la granda  
labor-intenseco, relative estis alta  
la morbokvanto ĉe la laboristoj kaj  
oficistoj de la nomita fabriko. La  
fabriko ekdisvolvis 20 sportajn ak-  
tivadojn kaj postulis ĉies partoprenon.  
6 jarojn poste, pliboniĝis ĝenerale  
la sanstato de la laboristoj kaj  
oficistoj, kaj la deĵoranta pro-  
centaĵo leviĝis de 85% ĝis 99.6%.  
Dank' al leviĝo de la laborproduk-  
tiveco, la produktovaloro duobli-  
ĝis. En celebra kunveno la fabrik-  
estro diris en ĝojo: "Ni devas atri-  
bui la hodiaŭan sukceson de nia  
fabriko ankaŭ al sporto."

Por sportemaj homoj, ekzercado  
ne nur atingis la celon sin sanigi  
kaj fortigi, sed ankaŭ refreŝigas ili-  
an animstaton.

40-jara Ding Shumin estas  
komizino. Post la monotona labor-  
ado, ŝi vizitas proksiman subĉielan  
dancejon, kaj tie dancas du horojn  
ĉiuvespere. Jam tri jarojn ŝi persis-  
tis en ĉiutaga dancado. Ŝi diris:  
"La dancado estas kaj amuza kaj  
saniga. Mi sentas min pli energia,  
kaj maloftiĝis al mi malsaniĝo, kaj  
krome dancado malhelpas dikiĝon  
de la korpo."

Chen Jiangong estas mezaĝa in-  
tektulo. Li estas ĉiam okupita je  
la laboro, eĉ ofte maldormas por  
daŭrigi laboron. Lia sangpremo  
ofte altiĝis abrupte, kaj kelkfoje  
oni devis fari al li urĝan transfuzadon.  
Li sentis elĉerpigon de energio,  
dormemon kaj vertiĝon. Poste,  
li sin ekzercas per naĝo kaj ta-  
bloteniso. En sia knabeco li estis  
trejnita en postlecionaj sportlerne-  
joj. Tial ĉiufoje li povas gajni kon-  
kurson. Li diris: "Tablotenisado estas  
tutkorpa sporto. Drajvante kaj fra-  
pante la pilkon, oni povas fariĝi  
lert-movaj. Kaj mi aparte ŝuldas

mian akriĝintan vidon al tiu ĉi ek-  
zercado." Li interesiĝas ankaŭ pri  
fiŝhokado kaj montgrimpado. Nun  
li sentas, ke li reakiris la energion.

En sia disvolviĝo, la publika  
sporto de la urbo Zibo estas sub-  
tenata de la socio. Sole en la jaro  
1993, la socia mon-ofero por diver-  
saj konkursoj provinca, urba kaj eĉ  
internacia atingis 880 mil juanojn.  
Ekzemple, la Zhangdian-distrikta  
Sporta Komisiono aranĝis la Ĉinan  
Tablotenisadon Konkurson de 1994  
kaj konsumis por tio 400 mil ju-  
anojn. Pli parto de tiu monsumo  
estis socia mon-ofero. Neniu entre-  
preno de la urbo Zibo estas avara  
por disvolvi la sportan aferon.

Kompreneble, krom ludi la ka-  
talizan rolon por la ekonomia evo-

lucio, la progreso de la sporta afero  
ankaŭ kelkfoje rekte portis profi-  
ton al iuj entreprenoj. Ekzemple,  
en Zibo estis malgranda trikejo,  
kiu havis nur dekmil juanojn kiel  
kapitalon, produktis ordinarajn  
trikotaĵojn. Poste, la trikejo sin  
turnis al farado de sportistaj vestoj  
kaj multe profitis el tio. Nun ĝi  
jam fariĝis fabriko kun fiksa kapi-  
talo de centmiloj da juanoj kaj la  
jara produktovaloro de dek milionoj  
da juanoj.

La publika sporta ekzercado en  
Zibo marŝas de la spontanea perio-  
do al perfektiga, kaj formiĝis to-  
renta fluo en la alttajo de la tut-  
popola korpo-ekzercado emerĝanta  
tra la lando. ■

## Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

# Paŝoj al Pli Alta Ŝtupo



La libreto "Paŝoj al Pli Alta Ŝtupo" estas kompilita kaj eldonita laŭ la peto de esperantistoj prezentita en la 77-a UK en Vieno. Ĝi entenas 150 artikolojn pri konversacioj, fabloj, rakontoj kaj prozaĵoj. Multaj el la artikoloj estis publikigitaj en la rubriko "Por Komencantoj" de "El Popola Ĉinio". La artikoloj estas vicigitaj laŭ facileco, la vortfarado regula kaj la tekstoj enhavoriĉaj kaj interesaj. La libreto estas taŭga por komencantoj en ilia memlernado kaj ankaŭ povas esti uzata kiel helpa legaĵo por elementa Esperanta kurso.

Formato: 18.4 × 12 cm. 195 pĝ.

Prezo: 8.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fako de EPĈ, Libroservo de UEA aŭ nia peranto en via lando.

### EKONOMIO



Rikolto de tritiko sur iama virga tero de Heilongjiang

● S-ro Zeng Yuzhuang, estro de la Administracio de Virgatera Eksploatado sub la Agrikultura Ministerio de Ĉinio, konigis, ke en la lastaj jaroj oni faris serion da reformadoj al la sistemo de virgatera eksploatado de Ĉinio, kio multe mobilizis la aktivecon de la eksploatantoj kaj akcelis la disvolviĝon de produktado.

En 1994 la totala produktovaloro de Ĉinio tiuflanke atingis 35.7 miliardojn da juanoj, je 14.18% pli multe ol tiu en 1993. Malgraŭ seriozaj katastrofoj, la jara produktokvanto de



Riĉa rikolto de raraj fruktoj en Guangdong

greno ne reduktiĝis, tiu de kotonono estis rekorda en la historio kaj tiu de sukerdonaj kaj oledonaj plantoj, kaŭĉuko, viando, bovina lakto kaj akvo-produktaĵoj iom pli kreskis ol tiu en 1993.

● En 1993 Ĉinio produktis sume 30.112 milionojn da tunoj da fruktoj kaj per tio okupis la duan lokon en la mondo.

En 1993 ĉiu ĉino konsumis meznombre 25.4 kg da fruktoj, kaj fundamente efektiviĝis la interŝanĝo de fruktoj inter la sudo kaj nordo de Ĉinio. La specoj, kvalito kaj kvanto de fruktoj kontentigis la bezonon de la merkato. Precipe la raraj fruktoj, kies produktokvanto estis tre malgranda antaŭe, nun vendiĝas en la merkato de la lando.

● La unua ĉina kvazaŭekspresa fervojo kun rapideco de 160 km/h inter Kantono kaj Shenzen estis lanĉita la 22-an de decembro 1994.

● En 1994 la produktokvanto de ŝtalo de Ĉinio superis 90 milionojn da tunoj.

● La strato ĉe Huangpu-rivero de Ŝanhajo portas la nomon "universala arkitektura ekspozicio". Nun en la Eksploatata Distrikto Pudong kun areo de 518 kvadrataj kilometroj oriente de la rivero pli ol 500 ĉinaj kaj alilandaj arkitekturaj institucioj konkure faras verkojn admirindajn por ĉinaj kaj alilandaj kolegoj, kaj la distrikto fariĝis la plej granda arkitektura merkato kaj plej granda konstruejo de Ĉinio.

● La projekto pri "kondukado de akvo de la sudo al la nordo" finfine konkretiĝis en Ĉinio post pli-ol-40-jara esplorado.

Por la projekto oni planis fosi kanalon 1 241 km longan, kiu komenciĝos de la akvokonservejo Danjiangkou ĉe la limo inter la provincoj Henan kaj Hubei en centra Ĉinio, transiros la Flavan Riveron kaj finiĝos ĉe Tianjin kaj Pekino en norda Ĉinio. Laŭ takso la projekto konsumos 6.5 miliardojn da usonaj dolaroj kaj finplenumiĝos en la komenco de la 21-a jc. Tiam la kanalo 30 m larĝa kaj 7 m profunda ĉiujare povos konduki 14 miliardojn da kubmetroj da akvo, tiel ke solviĝos la longtempa akvomanka malfacilo de norda Ĉinio, inkl. de Pekino kaj Tianjin, kaj Henan-



provinco.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Ĉinio kapablas sondi la lunon per spaca tekniko kaj planas lanĉi al la luno sondilon ĉ. la jaro 2000. Nun jam komenciĝis la esplorado pri la luno, en la unua stadio oni lanĉos sputnikon al la luno, kiu, sekvante la lunon, iros ĉirkaŭ la tero kaj observos la lunon, teron kaj aliajn planedojn.

- Taihu-lago kun areo de 2 420 kvadrataj kilometroj estas la tria granda sensala lago de Ĉinio. Estis malsamaj versioj pri la formiĝo de la lago. En la 70-aj jaroj fama ĉina geologo prof. Peng Zhizhong prezentis la hipotezon, ke la lago formiĝis pro atako fare de meteoro, kio vekis grandan intereson ĉe la sciencaj rondoj.

En 1987 vicprofesoro Wang Erkang de la Geofakultato de la Nankina Universitato ekstudis pri la formiĝo de Taihu-lago. Maje de 1994, prezidanto de la Internacia Litosfera Komisiono kaj tiu de la Internacia Komisiono de Meteora Strukturo venis al Taihu-lago por fari esploron. Post kiam ili vidis en la Nankina Universitato la strukturon de kvarco deformitan pro deekstera karambolo, kiun trovis Wang Erkang, ili kaj Wang Erkang kune verkis disertajon kaj konfirmis, ke la lago estis formita pro atako fare de meteoro.

- Zhengzhou-politekniko de Henan-provinco elfaris la intelektan roboton "Henan n-ro 1", kiu havas 16 liberecojn de moviĝo, scipovas paroli en pluraj intelektaj lingvoj kaj posedas intelekto-montran povon. La tekniko proksimiĝas al la avangarda nivelo de la mondo.

### MEDICINO

- Iu virino ricevis operacion meti gameton en la salpingon per laparoskopio kaj naskis januare en Tongji-hospitalo de Wuhan inksan bebon, 2 700 g pezan, kiu kreskas normale nun.

### TURISMO

- 1995 estas ĉina turisma jaro de moroj. Por tio la Pekina Turisma Servo solene lanĉos azian semajnon de moroj en septembro ĉi-jare. Tiam artistoj el diversaj landoj de Azio kaj tiuj de Ĉinio kune faros en Pekino artan prezentadon kaj eksponadon de moroj de aziaj landoj kaj

artaĵoj, inkl. de popolaj metiartaĵoj, kolektaĵoj, ornamaĵoj, kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj, kaj ĝuigos ĉelokan faradon de artaĵoj.

- Finkonstruiĝis 1 700 m longa glitvojo en la Ok Vidindejoj en la Okcidenta Monto de Pekino, kun pli ol 50 kurbiĝoj.

Kun rapideco de 80 km/h, vertikala alto de 240 m kaj averaĝa deklivo-angulo de 15 gradoj, ĝi estas konstruita per avangardaj teknologio kaj ekipaĵoj de Germanio. Turistoj povas supreniri la monton unue per telero por rigardi la pejzaĝon de Pekino, antikvajn templojn de la Ok Vidindejoj kaj vastan arbaron kaj poste malsupreniri per glitĉaro laŭ la glitejo.

### SOCIO

- Nun la averaĝa vivdaŭro de ĉinoj jam atingis 70 jarojn kaj proksimiĝas al la meznombra nivelo de la evoluintaj landoj en la mezo de la 70-aj jaroj.



Gu Jingliang en sia radio-stacio

- Ing. Gu Jingliang de la Instituto de Mediprotekta Scienco de Changchun, Jilin-provinco, nordorienta Ĉinio, estas radio-amatoro. Lia privata radio-stacio ekfunkciis en Changchun, kio metis la finon al la historio, en kiu ne estis amatora radio-stacio en la provinco.

- En Kantono, Ĉinio, ĉiutage estiĝas pli ol 3 300 tunoj da ruĥo. Por forigi polucion, en la urbo oni konstruas elektrejon, kiu ĉiutage forbruligos 1 000 tunojn da ruĥo. Kun jara produktokvanto de 72 milionoj da kWh da elektro, ĝi estos finkonstruita en 1998.

## Varbado kore petata

Ekde 1994 ni mem prizorgas la distribuadon de "El Popola Ĉinio" kaj libroj en Esperanto eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Dank' al la helpo kaj subteno de niaj legantoj kaj perantoj, la distribuado iras glate, kaj la nombro de abonantoj iom kreskis. Ni esprimas korajn dankojn al niaj legantoj kaj perantoj.

Por garantii la daŭran ekziston de "El Popola Ĉinio" kaj progresigi la Esperanto-movadon en Ĉinio, ni deziras havi pli da abonantoj en 1995. Sekve, la reabono estas tre bonvena.

Dum la pasintaj jaroj iuj legantoj ne nur abonis nian revuon, sed ankaŭ varbis por ni abonantojn. Tio sugestis al ni la ideon, ke se ĉiu leganto sukcesos varbi por ni unu abonanton, la nombro de abonantoj duoble kreskos. Tial ni kore petas, ke niaj legantoj helpu nin ankaŭ per memvola varbado. Por ĉiu varbita abono ni donas 20% da makleraĵo de la abonprezo kiel rekompenco. La varbanto bonvolu transpigi la rabatitan abonprezon al nia konto "elpc-e" ĉe Universala Esperanto-Asocio kaj sendi la abonilon kaj kopion de la transpago al nia Distribuata Fako.

Ni multe antaŭdankas niajn legantojn pro la diversmaniera helpo!

La Red.

(Daŭrigo de p.29)

menca periodo post la kuna investado ĝiaj produktoj vendiĝis ne multe, por ne paroli pri la vendado en la internacia merkato. Ĝian nunan sukceson oni ŝuldas unue al la bona kvalito de la produktoj kaj due al la vendoreto de la itala partnero.

La ŝtataj entreprenoj de Ĉinio ĝenerale estas malgranda sendependa unuo kun kompletaj funkcioj. Kiam ili havigas al siaj membroj diversajn servojn, ili ankaŭ kovas seriozan fenomenon de superflua laborantoj. La Pekina Popola Presmaŝina Fabriko, praktikante la akcian sistemon, firmdecide igis la neproduktajn personojn okupiĝi pri terciara industrio laŭ ties kapabloj kaj la bezonoj de la merkato. Tiuj entreprenoj de la terciara industrio praktikas sendependan kalkuladon, mem respondecante pri profito kaj perdo. Post iom da tempo pli ol 20 entreprenoj de la terciara industrio povas sin vivteni, kaj iuj el ili jam havas profiton.

La ŝanĝiĝo de la planizita ekonomio al la merkata ekonomio estas granda historia reformado por la ĉinaj ŝtataj entreprenoj, kiuj vivis sub la planizita ekonomia sistemo dum sufiĉe longa tempo. La ĉina registaro jam enlistigis tiun reformadon en la programon de gravaj reformaj projektoj de 1995. Tio koncernas la sorton de dekmiloj da grandaj kaj mezgrandaj ŝtataj entreprenoj de Ĉinio. Oni atendas kun malpacienca, kia estos la rezulto. Estas certe, ke la vojo estos malfacila kaj esperplena. ■

## GALERIO

### Drako skulptita el jado


de DONG PEIQIANG

La jada drako estis trovita en 1976 en la tombo de Fuhao, unu el la edzinoj de Wuding, la 23-a reganto de Shang-dinastio (17-11-a jc. a. K.). Ŝia tombo situas en An'yang de Henan-provinco.

La drako skulptita el jado altas 5.6 cm. kaj longas 8.1 cm. La kaŭranta drako suprenlevas la kapon, malfermas la buŝon kaj montras la dentojn. Sur ĝia mal-supra makzelo estas trueto, ŝajne por ion enmeti. La drako havas viglan aspekton kaj belajn ornamaĵojn sulkojn. La lakoneco de skulptado montras la majstrecon de la farinto. La figuro de la drako jam transformiĝis el la simpla primitiva aspekto sole kun kapo kaj korpo en la nunan aspekton kun kornoj, dorsokresto, ungoj kaj skvamaro. Ĝi estas la plej tipa jada skulptaĵo el la posta periodo de Shang-dinastio. Pro la delikateco kaj malofteco ĝi fariĝis posedaĵo kaj simbolo de regantoj kaj iliaj edzinoj, kaj ili posedis la artaĵon ankaŭ post sia morto.

Jado havas fajnan rebriilon, plaĉan koloron kaj sonas agrable. De la antikveco jadaj skulptaĵoj estas rigardataj kiel elegantaj ornamaĵoj kaj luksaĵoj en ĉambro.





"Verda Monto" (Ĉinstila pentraĵo farita por la 45-jara jubileo de "El Popola Ĉinio")

de CHEN XIWEI

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九五年第五期

(本刊代号:二—九—一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2